


OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

1209 19-1-43

LA ROND



JAN. 1943

No. 4. VOL 3

ELDONITA DE F. R. BANHAM,
2 BANCHORY ST., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

TROA ŜARGADO; LA ARABA DEKSIDLOKA FORD.

Jam de antaŭhistoria tempo la sola transportrimedo en dezerto estis la kamelo kun ĝia monotone svinga paŝado, sed la Granda Milito portis la aŭton al la Araboj de la Meza Oriento kun iuj malfeliĉaj sekvoj. Hodiaŭ multo da karavana trafiko de unu oazo al alia estas farata de muĝantaj, skuaĵ ŝargovagonoj kun tropremataj risortoj kaj trovarmigitaj frotpartoj, kaj la dignoplenaj nomadaĵ ŝeĵoj, anstataŭ iri al siaj intertribaj kunvenoj sur facilpaŝaj, belselitaj kameloj, nun proze veturas en trouzitaĵ aŭtoj Ford meze de polvonuboj. La tuta romantiko de la dezerto kaj ĝia nomada Bedueno nun forvaporiĝas en aero petrolpeza; oni sentas tion, kiam, ordonita ĉeesti kortumon por decidi triban disputon kaj aranĝi pri sangmono, Ibn Jad, la ĉefa ŝeĵko de la fama Howietat, alvenas la kunvenlokon sidanta sur la genuoj de sia dumjarara malamiko kaj rivalo, Alleyan de la Lehewat. Post tio, ke du rivalaĵ ŝeĵkoj dum cent kvindek mejloj sidis premitaj unu al la alia en senrisorta Ford, estas tre malfacile alvenigi la ĝustan atmosferon de triba malamo kaj ĝismorta milito ekzistinta de post la tempo de Saladin.

Ne ekzistas troŝargado de aŭto en Egiptujo kaj la apudaj dezertoj. En la Araba lingvo ne troviĝas vorto por ĝi. La teorio estas, ke tiel longe kiel homo, besto aŭ objekto povas esti enpremita, ligita aŭ fiksita al ajna boato, aŭto, ĉaro aŭ ŝargbesto, jen pruvo, ke la ŝarĝo estas portebla. Ke akvo superfluas la flankojn de boato, ke risortoj estas plataj sur akso, ke kruroj de azeno aŭ kamelo fleksiĝas sub pezego, tio neniel gravas al la afero, ĉar troan ŝargadon oni ne atentigas en la Meza Oriento kaj ĝis nun ne aperis iu Samuel Plim-soll Paŝa.

La plata ĉaro de la terkulturisto estas mirinda portilo, ĉar malgraŭ ke ĝi havas plankspacon de nur 45 kv. futoj, kaj la Egiptoj estas iom grandaj homoj, ĝi povas facile enteni tridek personojn. Ĉe festoj eĉ pli. Ĉiu estas feliĉa, neniu sentas malkomforton krom la duonmorte malsata ĉevaleto aŭ multaĝa mulo, kiu tirante devas stumbli inter la timonoj.

Nun tiu platĉaro eksmodiĝas, ĉar la vilaĝanoj eltrovis kion Sinjoroj Ford kaj Chevrolet ne antaŭvidis, kiam ili desegnis siajn fruajn modelojn kaj modeste nomis ilin "kvarsidlokaĵoj." Tion la Egiptoj opinias ega maltroigo; ili rezonas, ke se aŭto de tiu amplekso ne ~~povas~~ porti dek pasaĝerojn, io grava mankas al ĝi. Tri povas premsidi flanke de la veturigisto, ses malantaŭe; krome, la spaceto inter la kotŝirmiloj kaj la motoro povas teni sakojn da faruno, bulbojn k.a., dum la ŝtupoj havas bestojn, kiaj grasaj ŝafoj de Bairam, laktokaproj kaj eĉ bubalidoj. Ke tiuj dombestoj povas facilerte teni ekvilibron sur rapidmova, terure skua aŭto, tio estas ankoraŭ unu el la neklarigeblaj misteroj de la Oriento.

La Arabaj vilaĝanoj, kiuj posedas tiujn aŭtojn, havas iom da neklara scio pri la meĥanismo, sed la dezerta Bedueno eĉ ne povas konjekti pri tio, kiel aŭto funkcias; kaj li ne deziras tion scii. Mi konas homon, kiu dek kvar jarojn havis respondecon pri aŭto, sed kies

scio pri ĝia meĥanismo post tiu peco da tempo estis ankoraŭ malpli ol ĉe la komenco. Li estis gardisto ĉe negrava mangana mino en Suda Sinai, kiu pro manko de kapitalo estis en laboro nur monaton en ĉiu jaro. La tasko de la gardisto estis teni okulojn sur dispeciganta Ford, kiun uzis vizitantaj inĝenieroj, kiam ili loĝis ĉe la mino. Krepuskiĝe de unu malfeliĉa, malbonokaza tago, mi trovis min senhelpa en la dezerto apud la mino. Mia aŭto malfunkciis, kaj tuj kiam mi pretsidiĝis en la dua patrolaŭto, io misiĝis ĉe ĝia magneto-maŝino. Mi ekrimarkis la minkonstruojn kaj rememoris pri la malnova Ford. Mi demandis al mi: ĉu ĝi ankoraŭ sidas tie? Mi grimpis supren de deklivo, malfermis barakpordon. La koro saltis pro ĝojo, ĉar tie staris la aŭto, kun aspekto ĵusoleita, polurita. Venis la gardisto de post angulo. "Ĉu la aŭto funkcias?" mi demandis. Li levis manojn al ĉielo.

"Tute bone. Neniam ĝi laboris pli bone. Inĝenieroj antaŭ semajno multe faris al ĝi, kaj ĝi jam iradas kvazaŭ tutnova."

"Nu, mi volas iri al Abu Zeneima," mi diris; "ĉu ĝi portus min tien?"

"Alie mi perdu la kapon. Ĝi portus vin kiel vento."

La unua tuŝo al la startilo sendis la motoron en la belan zumon de perfekta maŝino, kaj mi enpuŝis la konektilon. La motoro laŭte ekmuĝis dum mi akcelis, sed anstataŭ facilkuri komence de mia vojaĝo, mi restis senmova en la barako. "Devas esti io fuŝa ĉe la konektilo," mi koleretis.

"Ho ne, nenio misa," milde diris la gardisto. "Nur novaj radĉoj. Ili ne estas sur la aŭto. La inĝenieroj bezonas novajn partojn, tiam apoge metis la radojn kontraŭ la aŭto."

Mi elaŭtiĝis por kontroli; la gardisto ja vere diris. Efektive la aŭto staris sur kvar kestetoj, kaj la radoj, sen naboĵ (aksingoj), staris je la finoj de la aksoj. La tutan vojon al Abu Zeneima, ok laŭgajn mejlojn tra la mola sablo, mi meditadis pri la misteroj de la Oriento kaj la nekomprenebleco de la Beduena menso.

----- F.R.BANHAM (trad.)

DU FRUKTOJ de la FILIPINAJ INSULOJ.


El "A Doctor's Odyssey" de Victor Heiser."

Pro iu aŭ alia kialo, kiam mi unue iris al la Filipinaj Insuloj, mi neniam antaŭe aŭdis pri la mango. La Rohilla Maru surterigis min ĉe Manila ĉirkaŭ la sesa matene, kaj mi atingis la hotelon por matenmango je la oka. Mia tablo sidis apud tiu de Amerikana virino kiu mendis strangaspektan frukton el riĉe flava koloro. Mi avidis novajn spertojn kaj deziris kutimigi min al tiu ĉi nova lando. "Mi volus havi unu el tiuj," mi diris al la kelnero.

Ne dezirante ŝajni senscia, mi observis kiel traktis sian la sinjorino. Ŝi klinis ĝin surpinte, per unu lerta entrafo, fortranĉis la du flankojn, kaj tiam mangis tiujn per kulero. Ŝajnis esti tre simple. Mi simile klinis mian mangon, kaj klopodis tranĉi. Sed kiam ĝi ne tranĉiĝis tiel facile kiel ŝia, mi uzis forton. La suko

elliberiĝis kaj ŝprucis super miajn brakojn kaj sur la tablotukon. Kiam mi hakis ĝin malférma, mi ekuzis mian kuleron, sed ree la suko tute ne volis resti en la frukto; gejsere supren ŝprucis al mia mentono. Mi maltrankvile demandis al mi kiom da homoj rigardadis mian paraĉaĉon.

Ankoraŭ fojon kaŝe observadante la sinjorinon, mi rimarkis ŝin preni la kvarcolan renforman semon, enŝovi la forkon en ĝin, kaj delikate manĝi ĝin kun kompleta indiferenteco. Mi alprenis egalan



semo

indiferentecan. Mi premis la forkon al la semo same kiel mi vidis ŝin; ĝi tute rifuzis eniri. Mi premis pli forte, sed sensukcese. La matenmanĝantoj komencis puŝeti unu la alian, kaj mi konsciĝis pri okuloj fokusitaj sur min. Mi decidis nepre sukcesu. Per fina treege forta alpuŝo la forko glitis kaj la granda plata semo risortiĝis laŭlonge la longan manĝambon, frapis la kontraŭan muron kun krakego, kaj falis al la planko kun laŭta ekbato. Kriego de rido elvenis de mia ĝuganta vidantaro.

Baldaŭ oni informis min pri tio kion mi devus esti farita. Mia unua oraro estis, ke mi tranĉis de la trunketa ekstremo, kaj pro tio agis kontraŭ la fibroarango. Mi simile eraris kiam manĝanta la frukton ankaŭ kontraŭ la fibroarango per kulero. Fine, kiam mi provis la semon, mi ne sciis, ke mi devus enpuŝi la forkon, unu pinton je fojo inter la flankrandoj.

Post mia ne tro brila farado, mi klopodis mastrumi la belan arton de mango-manĝi kun la rezulto ke mi ricevis multajn invitojn vespermanĝi ĉe Malacanan (Government House). Kiam ajn la Gubernatoro-Ĝenerala ricevos eminentajn gastojn kiuj neniam antaŭe manĝis mangojn, oni alinvitis min. Ĉar estus nedelikate se li donus instrukcion kiamaniere trakti la frukton, li prezentis min kiel la Direktoron de Publika Sano klarigos la ĝustan metodon higiene manĝi mangojn.

Eĉ kun la plej bona zorgo mango-manĝado emas esti malpureta. La suko faras nemoveblan makulon kiu tuj nigriĝas; en la mango-sezono preskaŭ nenia blanka telertuko troviĝas en la Insuloj.

Tre stranga frukto estas la duriano, kiu kreskas sur granda arbo kaj estas pli granda ol la plej granda oranĝo. Ĝi estas protektata de dornoj kaj plena de semoj kiuj nigriĝas kiam ĝi maturiĝas. Ĝi posedas unu el la plej penetrantaj kaj malagrablaj el ĉiuj odoroj en la mondo. La putoro aŭ limburga fromaĝo treege matura de la plej naŭza odoro el sia speco kompare estas milda.

En unu okazo mi vojaĝadis kun mia ĉefhelpisto, Dro. Wilbur A. Sawyer, nun Direktoro de la Divizio de Internacia Sano sur la vagonaro de Bangkok al Penang. La vagonaro ne havis manĝvagonon kaj pro tio, ni prenis kun ni niajn lunĉojn en korbo. Ĉirkaŭ tagmezo, ĥino, la sola alia okupanto de la kupeo, aĉetis maturan durianon, ĉe stacidomo, kaj komencis lunci, tranĉante ĝin zorge en duonojn. Tiom

malbona kiom estas la duriano kiam ne malfermita, ĝi estas senlime pli malbona kiam la ŝelo estas tranĉita. Ni alvokis la gardiston, informis lin ke ni estas absolute subigataj, kaj petis lin decidigi nian kunvojaĝanton manĝi sian durianon sur la fervoja plataĵo. La ĥino kolektis siajn durian-pecojn kaj kompleze eliris.

Ni malvolvis niajn sandviĉojn kaj komencis ilin manĝi baldaŭ post nia kunpasagero revenis. Ni apenaŭ enmordis en ilin kiam li komencis fari gestojn de naŭzo, skuis la kapon kaj ekkriis "Whew! Whew! Whew!" Tiam li ankaŭ alvokis la gardiston al kiu li parolis Malaje. La gardisto turnis sin al ni kaj petis ĉu ni bonvole elirus por manĝi nian lunĉon. Ĉar la ĥino estis tiel ĝentila konsenti je nia peto, ni konstatis ke ni ne povus fari malpli ol redoni la komplezon. Kontraŭ fina "Whew!" ni ankaŭ eliris. Kiam ni jam finis niajn nekulpajn sandviĉojn kaj reeniris, la serĉema ĥino rigardis nin kun larĝa rideto sur la vizaĝo.

Mi ne povas imagi kial, sed post tio, nenio kontentigus Dr. Sawyer ĝis li ankaŭ povus havigi al si durianon. Ĉar neniu matura estis havebla por tuj manĝi, li faris kompromison per unu nematura. Ĉe Penang li forpakis ĝin en salika korbo, kiun kun la restaĵo de nia pakajaro, ni lasis en la tenejo de la hotelo ĉe Kolombo dum ni faris inspektadan vojaĝon de la provincoj de Cejlono. Dum ni revenante alproksimiĝis la hotelon, eĉ tutan straton for, ni eksciis teruran odoron. Ĝi kreskis pli kaj pli forta dum ni plie alproksimiĝis. Ni miregis vidi ke la tuta korto estas tumultplena. La servistaro de la hotelo malfermadis pordojn, enfosetis la teron, serĉante vane trovi la kaŭzon. Estis kvazaŭ cent ratoj mortis antaŭ multaj semajnoj. Kiam Dro. Sawyer demandis sian pakajaron kaj oni malfermis la pordon de la tenejo, la odoro preskaŭ malsupren batis nin. La



duriano, frukto ne konata en Cejlono, maturiĝis s kcese en la korbo.

La nevenkebla Dro. Sawyer ankoraŭ decidis nepre manĝi ĝin.

"Oni certe ne permesos vin," mi diris, "malfermi ĝin ĉirkaŭ ĉi tie, sed se vi promenos laŭlonge la digo, vi estos duonmejlon for, kaj eble neniu kontraŭos vin."

Kun sia duriano Dro. Sawyer sin retiris ĝis la ekstrema fino de la digo. Eĉ tiam, okaza bloveto de malbona odoro alfloris per la maraj ventetoj.

(La desegnoj de la fruktoj estas multe pli malgrandaj ol la fruktoj).

----- L.E.BAILEY. (trad.)

GRAFO STRALECKI ANTAAJ 100 JAROJ.

Antaŭ pli ol 100 jaroj, Grafo Stralecki (aŭ Streslecki, Streslecki, Stralaki, Strelenski, Streletski, Stlenetki, Strelenski; ĉi laste estas la plej proksima Angla fonetikaĵo de la Pola Stralecki) eltrovis en Nov-Sud-Hispanio la altaĵon, kiu hodiaŭ portas nomon Kosciuszko. Jus nominte tiun, la plej altan monton en Aŭstralio (7340 futoj), li skribas "La aganta furio de tiu ĉi altaĵo tiel forte frapis min pro ĝia simila al la vortomajlo (tumulo) en Krakovo sur la lasta vojaĝo de la patrioto Kosciuszko, ke malgraŭ ke mi sin trovis en frenda lando, sed inter libera popolo latanta la libereco kaj kies sincedulojn, mi ne povis ne doni al ĝi la nomo Monto Kosciuszko."

Grafo Stralecki, patrioto, esploristo, geologo, filantropo, verkisto kaj inĝeniero, raskiĝis en provinco Pannan en 1796. Li akcelis la universitaton de Krakovo antaŭ al li devis pro politiko fuĝi en Anglijon de la tiam subpremata Polaĵo. Li ĉian ends frendlande vagis, kaj liaj vojaĝoj inkluzivis Nord- kaj Sud-Amerikon de Ĉilio ĝis Kalifornio, Siamoj, Orientan Indion, Havajon, Sumajon, Nov-Zelandon, Oceanion kaj Aŭstralion. La "Sydney Gazette" (Aprilo 27, 1839) anoncis la alvenon de "Monsieur le Comte Trallecki, elde de la voja armo," kiel pasaĝero de la Franca barko Justine, kiu atingis la havenon antaŭ du tagoj de Sud-Ameriko, voje de Tahitio kaj Nov-Zelando.

Ĉian kun scienco sole li paŝis la nordon, kaj li verkis multajn fakajn traktatojn, kiaj portis konsiderindan profiton al la sciencaj Anglaĵ. Lia unua verko, "The Physical Description of New South Wales and Van Diemen's Land," estis prezentita en Londono 1843. Ŝi rigardas ĝin kiel la plej fidindan verkon pri Aŭstralio ĝis tiam aperintan en Anglaĵo. Sur la unua paĝo Stralecki metis la principojn de ĉiuj liaj esploroj: ĝi ne refuŝis la eksperimentojn de aliaj homoj, nek provi ilin erari, sed eltrovi la veron, la puren veron.

La libro enhavas la rezultojn de liaj topografiaj observoj en Suda Aŭstralio. Ĝi traktas pri la klimato, geologio, botaniko kaj zoologio, krom la flanka kaj socia stato de la indianoj en ĉi tio tiam nomata Terparto. Ĝi montras sur faktoj kolektitajn sur per lia eltrovado, nome, longa piedvojaĝo de 7000 Anglaĵoj maljaroj tra la plej nature ĝeneraj regionoj de Aŭstralio. Li eltrovis ĉion en du lokoj, Bartley kaj Wellington, sed ne en granda kvanto. Li havis la eltrovon de for de la publiko, pro la insistita peto de Gubernato Gippe, kiu tiam, ke akceladon de la lando ekde tiam anoncon. Li ricevis la akceptadon de la Reĝa Geografia Societo en 1846.

Li revenis al Anglaĵo en 1843 kaj farigis sono de la negranda Aŭstralio fonda en Londono. Dickens markaturo ĝin kiel Grafon Skorturk en "Penny Papers." Li mortis en Londono en 1873.

----- F. S. DANKO.

LA KULTO DE FACILISMO jam generis preskaŭ tiom da krinoj kiel la ŝtalo-
kontraŭ-facilistaj militoj de antaŭ 400 jaroj. Deveno Inge (Angl.p.148)

ESPERANTO INTERNACIA.

Post tri jaroj de milito la supra estas la sola internacia Esperanta gazeto, kiu regule aperas. "The British Esperantist", oficiala organo de la B.E.A., ankaŭ aperas dumonate. Vi povas membriĝi al la Internacia Esperanto-Ligo kaj la B.E.A., ĉar ankoraŭ estas eble sendi monon al Anglujo por tiu celo. S-ro Geo. Fillerman, Box 75, Devonport, Tasmanio, certe helpus al vi en tiu afero, enskribante paperon per kiu vi povus aranĝi la monsendon pere de la Bank de New South Wales. La sendkosto estas tre eta. Okaze de ŝipperdo via mono ne perdiĝus. Dek tri ŝilingoj ĉiujare rajtigas al vi ricevon de "E.I.", "B.E.", kaj la Jarlibron, krom la servo de la monda organizo.

D-ro FRED. WILLIAMS informas, ke lia nova adreso estas "Nambour Hospital, Nambour, Queensland." Mure fiksinte la devizon "Esperanto parolata" en la sekcio de vizitpacientoj ĉe la hospitalo en Bowen(Q.) li sukcesis vekti intereson en Esperanto, kaj kurseto formiĝis en la urbo. Gvidas ĝin S-ro Graham Shardlow, Livingstone St., Bowen (Q.), kiu danke ricevus simplalingvajn leteretojn en Esperanto.

RESPONDO PRI TRADUKO.

Al C.C. en S.M. Vi diras, ke nur Franco devas traduki el la Franca (en Esperanton). Kiel ĝenerala principo tio ŝajnas bona, sed via aserto pensigas min pri faktoj de Esperanta literaturo. Kelkajn el la plej famaj kaj admirataj tradukaĵoj verkis homoj el lingvoj ne gapatraj. Mi nur nomu (1): ZAMENHOF, kies patra lingvo estis la Rusa. Li tradukis krome el la Pola, Germana kaj Franca, (2) Grabowski, Polo, tradukis "La Neĝa Blovado" el la Rusa dum li lernis tiun lingvon, simile al "La Gefratoj" el la Germana, parton el "La Mizeruloj" el la Franca (perdiĝis), kaj poemojn el la Angla, Itala, Franca kaj supozinde ankaŭ aliaj lingvoj ("El Parnaso de Popoloj, Poemoj el 30 lingvoj"); KABE, Polo, tradukis el la Rusa, Germana, Franca, Angla (Kipling'a noveleto), kaj Itala (?). Eggleton, Anglo, bonege tradukis "Die Caravane" (Hauff), kaj Karl Minor, red. de la Germana Esperantisto kaj Esp.-Germ. vortaristo, estas ankaŭ Anglo.

Ĉu vi malaprobas tion, ke negermano, Zamenhof, tradukis por ni "Ifigenio" anstataŭ iu Germana E-isto, aŭ ke neruso, Kabe, donis al ni "Patroj kaj Filoj"? Ĉu tia ekscio deprenas de via plezuro legadi tiujn verkojn?

La granda plimulto de legantoj, inkluzive E-istoj, kontentiĝas per supraĵa impresado de teksto, sed tradukistoj, pro jaroj da ekzerco, fariĝas esplorantoj, analizantoj de la pensoj de aliaj, kaj foje devas traduki ne nur la esprimitaĵon sed ankaŭ tion, kion la aŭtoro volis, tamen ne sukcesis esprimi. El tio sekvas, ke se, ekzemple, Dr. E.J.Dillon (Suda Kruco Majo/30), Aylmer Maude aŭ Maurice Baring (int-

erpretantoj de la Rusa "animo") estas ankaŭ E-istoj, ili supozinde tradukus el la Rusa multe pli fidele ol la meza Rusa E-isto. Eden kaj Cedar Paul respektive el la Germana; Otto Jespersen resp. el la Angla. Ja vere estas, ke foje homo povas posedi lingvon ekster sia gepatra egale perfekte kiel ajna ano de tiu lingvo. Estas tamen maloftaj tiaj perfektaj dulingvoj, homoj science komprenantaj du lingvojn kaj senerare uzantaj ilin buŝe, skribe. Ili formas ekskluzivan eliton.

----- (F.R.B.)

NU TRADUKEMULOJ. (vidu Dec. No., p. 209)

- (1) La okazaĵo en la bestparko min scivoligas; (aŭ ĵetas en konjekt-
- (2) La vento krispigas la lagon (aŭ ondetigas). ojn)
- (3) prispriti iun. (4) Lia vunda punkto.
- (5) Li estas sub ŝia ŝuo (aŭ li estas sub ŝia premo).
- (6) Havi tro da elekteleblaj (aŭ embarason de riŝeco).
- (7) La donitaĵoj estas nesufiĉaj (aŭ atestaĵo...)
- (8) Vi estas aparte kompetenta por la tasko.
- (9) Jen ekzemplo de erara rezonrondo (aŭ senfine rondira rezono).

TRADUKU:

- (1) She looks down on her and tells her that she's engaged in foolish pursuits.
- (2) Then the tables are turned.
- (3) The strong light hurt his eyes.
- (4) The ideas were regarded as an infantility unworthy of attention.
- (5) When people were shown the force of steam, it didn't seem that any reasoning man could contradict it.
- (6) Every nincompoop had full licence to poke fun at them to his heart's content.
- (7) An irrelevant circumstance.
- (8) The mob-instinct gave way to nude logic.
- (9) High-sounding names and high-flown terms.
- (10) An egregious false step.

ERAROJ EN DECEMBRA NUMERO.

- p.201 linio 11 de la malsupro: atendu.
- p.203 " 5: la altebenon.
- p.205 " 4: turban-kovrita.
- p.206 " 4: Kvereloma
- p.207 " 8 de la malsupro: suferis iom; 1. 7 d.l.m. 11 montris.
- p.208 " 23: lukto nun ŝiranta; linio 4 d.l.m. nuboj.
- p.209 " 5: Ezekiel. p."1", linio 2 de la mals. pogranda.
- p.211 en Libroservo: legu "la kvaran...tenas nia peranto....."

Typing errors not corrected in this number will be listed in our next.

CITERARON. -- NI PETAS PARDONON? SINJORO BUTLER.

"S-ro F.R.Banham: Re LA RONDO (p. 118 June 1942) you have not quite got me. I said in British Esperantist (April 1934) that one class DID find the proverb "proksima kubuto" rather difficult, but that a little thought would have made it clear. I do NOT advocate the Esperantigo of things like "She has broken her elbow at the church door" (incomprehensible to me!). But I DO advocate the learning and use of Zamenhof's proverbs, which are international (more or less) and form the basis of an Esperanta Proverbaro Internacia, and which do NOT contain things internationally unintelligible.

Saluton, M.C.BUTLER. 6.10.42.

(Laŭ New Book of Quotations (Benham) la nekomprenebla de M.C.B. proverbo signifas, ke iuj virinoj fariĝas mallaboremaj post la geedziĝa soleno. Loko de origino: Cheshire. Via humile, F.R.B.).

RESPONDOJ.

Ol en De. Eliza Orzeszko (1842-1910) estis Pola romanistino, naskiĝinta en Grodno, de samregionano kun Zamenhof. Ŝi edziniĝis kun Pola patrioto, kiu ekziliĝis Siberion post la Pola ribelo de 1862. Ŝi multe verkis pri la Pola vivo kaj la Judoj en Polujo. Ankaŭ ŝi faris multon por la virina rajto. Mortis en Grodno. Zamenhof tradukis ŝian Marta (du eldonoj, 1910 kaj 1942), kaj Kabe La ~~Interrompita~~ Kanto, de kiu estas Angla traduko sub titolo "The Interrupted Melody." (Vidu Biog.Dic. de Foreign Authors, Dent's Everyman Library)

Al Kursanoj: Peco 35, "practically (virtually) trackless country." Ne uzu "praktike" aŭ "virtuale". Laŭ P.V. "virtuala" sig. "Eble sed ankoraŭ ne efektiviĝinta" (latent). "Pratika" havas tri nuancojn: (1) Rilata al aplikado de principoj aŭ reguloj. (2) Konforma al sia destino aŭ celo, facile kaj oportune uzebla. (3) Celante nur materialajn utilojn; scianta apliki la teorion kaj efektive plenumi la aferojn. La sencon redonus: "preskaŭ senvojeta regiono."

ASOCIAJ AFEROJ.

ADRESARO. Kiel antaŭe anoncita, La Asocio aranĝas duan eldonon de la Adresaro. Membroj bonvolu jam avizi la Sekretarion ĝis la 20a de Februaro pri iuj aldonoj aŭ korektoj necesaj. Se nesufiĉa informo aperas post via nomo, nun vi havas la ŝancon aldoni al ĝi. Ni aparte deziras montri pri mallongigoj la nomojn de tiuj kiuj estas diplomitoj de B.E.A., membroj de B.E.A., aŭ I.E.L.

VORTARO. Ĉu vi iam estis komencanto? Ĉu tiam vi uzis la "Edinburgh Pocket Dictionary"? Ĉu nun vi havas pli imponan vortaron kaj la "Edinburgh" ne pli utilas al vi? Se al ĉiuj tri demandoj vi povas jese respondi, ĉi tiu alvoko koncernas vin. La "Edinburgh" vortaro (provizore, ni esperas) ne estas havebla. Malgraŭ tio, novaj lernantoj

GRATULON. Al D-ro C.J.Caldera, kiu bone propogandis en Perth. Li aranĝis paroladon ĉe Radiostacio 6WH (9.12.42) sub la titolo "International Language as a Means of Understanding after the War."

LIBROSERVO. Donacoj danke ricevitaj -- S-ino H.Motteram 3/-, F-ino W.Addis 10/-, S-ro J.Eliot 1000 ekz. de broŝuro Anoncanta nom-adreson de informonto pri Esp. en ĉiu ŝtato.(metotaj en venditaj libroj). Ni esperas anonci en la sekvanta numero la nomojn kaj prezojn de la unua provizo da libroj.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de membro-abonanto Sinoj E. Dougan, E.Caldera, M.Wood, P.Byatt; S-roj A.Towsey, Crowe, E.Costa, R.Brown; D-ro C.Caldera, Pastro Rymer.

KLARIGO. Povas esti de tempo al tempo, ke iu ricevos avizon, ke kotizo nun ŝuldiĝas, en la kelkaj semajnoj post la pago de la kotizo. Tiaokaze ne maltrankviligu. La Redaktoro loĝas en Vic., la Kasistino kaj Arangistino en S.A. kaj la Sekretario en Tas. -- ĵen la kaŭzo de la neofta sed neevitebla malagrablaĵo. La A.E.A. kotizoj kaj abonoj estas:- membro-abonanto 5/-, LA RONDO al nemembroj 3/6 (afrankita). Sur poŝtbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

GEORGE HILLERMAN (Sekretasio)
Box 75, Devonport, TAS.

	£ s d		£ : s d
Konta Transprenoj.....	2.19.9	Poŝto.....	1.-.-.
F-inoj Gleadel, Kemp.....	7.-	Papero.....	16.-
S-inoj P.Byatt, Johansen, Wood,		Ŝablonaĵoj.....	11.4
Dougan, Caldero.....	17.6	Inko.....	12.6
S-roj A.Towsey, Chamberlain, Hart		Luo.....	5.-
R.Craigie, Crowe, G.Gordon, Holmes.	1. 4.6	Bindpingloj.....	1.6
D-ro Caldero, Rev. Rymor.....	7.-	Okazaj Elspezoj..	<u>3.-</u>
D-ro Williams. 3/6, S-ro Costa 8/6.	12.-	En ĉa Kaso	£3 9.4
S-ino A.Hintze 1/6,	1.6	£3.5.11	
S-ino E.M.Hill, S-ro Herschel.....	6.-		<u> £6.15.3</u>
	<u>£6.15.3</u>		

W.ADDIS (Kasistinto) 25 Greville Ave., Flinders Park, South Aus.

LINGVAJ NOTOJ BAZITAJ SUR LA DEUTSCHES-ESPERANTO
WÖRTERBUCH de KARL MINOR, L.K.

BUTONTRUO: Laŭ M. ĝi estas unu el la truoj en la butono mem; la truo en la vestoŝtofo estas butonumo. Sed mi ne trovas subtenon por tiu aserto en aliaj vortaroj, kiuj ignoras la truon en la butono. Kiel diferencigu inter "button-hole" kaj "holes in a button?" Krome, kiel nomi la agon butonumi?

AREANAĴO. Ĝenerale uziĝas por la ŝpinitaĵo de araneo. M. preferas "aranaĵo reto" (simile Kabe en Interrompita Kanto), ĉar "-aĵo", kiam kunigita kun bestnomo, donas signifon "manĝo el -viando" (bovaĵo, ŝafaĵo k.c.)

ARMILO, kiel formo por "weapon" estas laŭ M. nelogika. "Armi" signifas "provide with weapons", tial "armilo" devus signifi ilon per kies helpo oni provizas per "bataliloj".

EKZIL. La Univ. Vortaro donas al tiu radiko verban kategoriecon, ekzili (to exile), el kio sekvas ekzilo (la ago ekzili), en ekzilejo (in exile). Tamen tiu ĉi lasta formo ne estas korekta, ĉar "ekzilejo" signifas la lokon, ne kien la homo estas pune sendita, sed la lokon en kiu li ricevis la verdikton de ekzilo. M., atentigante ke ekzilo estas internacia por la loko, konsilas uzi
ekzilo....exile (the place)
(en)ekzil(ig)i....to exile

FORLASI. "Li forlasis min" signifas "li iras kaj mi restas"; "Li lasis min for" sig. "mi iras kaj li restas". Sed laŭ M. la kunmeto for-lasi (G. fortlassen) devus signifi "to let some one or thing go away" kaj li preferas ke "forlasi" havu tiun sencon, kaj ke oni uzu "foriri de", "eliri el" (G. verlassen) por la alia nocio. Mi dubas pri la eblo aŭ utilo peni ŝanĝi la nunan komunan uzadon.

FLARI. Uzis ĝin Zam. en kroma senco "flari tabakon". M. opinias la formon ne imitinda. "Snufi" kaj "ennazigi" estas alternativoj.

OKUPIĜI, SIN OKUPI. Troviĝas "okupiĝi (je, pri, per)" kaj "okupi sin (je, pri, per)". La formo kun "je" rekomendinda, laŭ M. Inter "okupiĝi pri" kaj "okupi sin per" oni povas fari negrandan sed logikan distingan: - Dum multe da tempo li okupiĝas pri Esp-o. En tiu frazo la okupiĝo pri E. ne estas distro aŭ rimedo por atingi celon -- tial, ne uzu "per".

Dum (kiam) li sidadis en la atendejo de la kuracisto, li okupis sin per legado. En tiu frazo li legadis nur por pasigi la tempon; li servis al si la legadon kiel rimedon.

SUFICE. Tiu adverbo uziĝas tre vaste en senco de "sufficiently" kaj ankaŭ de "fairly", "pretty well", "somewhat much", "moderately", sed la dusenceco akre montriĝas en frazo kia "It is fairly bright but

not bright enough." M. konsilas uzi "Ĝi estas ne malhela, sed ne sufiĉe hela", aŭ "Ĝi estas treeta hela sed..." En la unua ekzemplo mi metus "tute" antaŭ "ne". Kompreneble "treete" signifas "ete tre" (a little bit much). Tamen mi timas ke "treete" povas esti misaŭdata de homoj komprenantaj per ĝi "tre ete" (very tiny). Kial ne la klara "iom tre"?

TRE (TRO) DA. Malgraŭ ilia ĝenerala uzateco, M. opinias ke formoj kiaj "tre ĝojas", "tro hezitis", precize rigardataj, ne estas korektaj, do evitindaj. Anstataŭe oni uzu:-

(tre) multe ĝojis. (tro) forte hezitis.
tree, aŭ treege ĝojis. troe, aŭ troege hezitis.
Simile kun "pli" kaj "plej".

Li pli multe manĝis ol mi.

Kio la plej multe plaĉis al ŝi (Fund.Kr. 37)

Sed M. rigardas la "la" kiel neuzindan en tiu ĉi frazo. Kabe en Interrompita Kanto ĉiam ellasas "la" ĉe superlativo.

POSTE, TIAM. Ofta eraro estas misuzi "poste" kaj "tiam". Jen ekzemploj de korekta uzo: "Morgaŭ je la 9a mi renkontos vin, kaj poste (thereupon, thereafter, from that point onwards) ni veturos al N."

Sed, "Morgaŭ ni komune tagmanĝos, kaj tiam (during the meal, not afterwards) ni priparolos la aferon."

Mi bonvenigus kritikon.

----- F.R.BANHAM.

BASIC ENGLISH?

Per kio B.E. penas rajtigi sian ekziston? Kia estas ĝia efektiva celo? Ĉu ĝi (1) intencas servi kiel paŝoŝtono al la lernado de la aŭtentika Angla lingvo? Aŭ, ĉu ĝiaj naskintoj (2) rekomendas ĝin kiel centprocentan solvon de la internacilingva problemo?

Ĉu per sia eldono de la Nova Testamento la "Basikistoj" penadas enkonduke prezenti la Biblion al primitivuloj kaj fremduloj, kiuj scias nur malmulte aŭ neniome la Anglan? Se jes, kial ne uzadi por tiu celo la centojn da bonaj nacilingvaj kaj dialektaj tradukoj?

Aŭ, ĉu ili celas provizi eĉ pli simplan, klaran, bonan tradukon al la Angla popolo? Se yes, ĉu vere tiaj ecoj karakterizas la Basic New Testament, kun ĝia manko de precizaj terminoj kaj ĝiaj neekzaktaj esprimoj kaj nebulecaj vortbildoj? "The 20th Century New Testament", la tradukoj de Weymouth ("The New Testament in Modern Speech") kaj de Moffatt estas supermezure pli fidelaj, inspire naturaj, laŭ ĉia konsidero.

La B.N.T. abunde konfirmas konkludon, ke dum Basic eble povas helpi homon en la unua tempo lerni la Anglan, ĝia pretendo finsolvi la problemon de internacia lingvo estas tute iluzia, senbaza. Eĉ en ĝia limigita servokampo, superas ĝin aliaj studaĵoj pri relativa uz-ofteco de vortoj: kiaj ekzemple The Teacher's Word Book (Thorn-

dike), leglibroj de Michael West kaj tiu de Palmer kaj Hornby bazitaj sur ilia Thousand-Word English. (Vidu la B.E.A. folion "Basic English" (2p.) kaj "Brit.Esp." Sep-Okt.1941).

-----kompilis F.R.B.

ZAMENHOF-FESTO EN MELBURNO.

Ĉirkaŭ 45 gesam-oj ĉeestis la societan vesperon okaze de la naskiĝdatreveno de D-ro L.L.Zamenhof. La kunveno estis la fina por 1942. La Prezidanto, S-ro E. McKenzie, bonvenigis la gastojn kaj aparte menciis la nomon de S-ino Wicks, malnova anino, kiu ĉeestis unu tre fruan kongreson en Aŭstralio. S-ro Roy Rawson donis raporton pri la ekzameno por la Pyke Memoriga Atesto. Li klarigis, ke S-ro Pyke estis tre entuziasma E-isto, kiu dum jaroj dediĉis sian tempon kaj energion al la movado. Post lia morto kelkaj el liaj kunlaborintoj (kiuj alte taksis kion faris S-ro Pyke) decidis starigi kason memorige al lia nomo. La Premio de kvin gineoj estas jare destinata al tiu kandidato, kiu atingas certan gradon de kompetenteco post ne pli ol jarlonga studo de Esp-o. Homoj el ĉiuj partoj de Aŭstralio rajtas partopreni la ekzamenon. (Vidu raporton sube).

Sekvis programeroj: F-ino A.Godfrey fortepiano, F-ino Fay Grant E-aj kantoj, S-ro Lawrie Cpan (radiartisto) kantis Anglalingve. S-ro Rawson oratoris pri E-o kaj ties celo. (Tiu parolado eventuale aperos en LA RONDO). Granda aplaŭdo montris aprobon kaj ŝaton de la aŭskultintoj. Sekvis taso da kafo kaj manĝeto, kaj gaja interbabilado metis finon al feliĉa vespero. Adiaŭon ĝis 13 Januaro!

ANNA HINTZE.

PYKE MEMORIAL EXAMINATION.

Special prize won by Mr.N.V.D.BRODIE, Wembley, West Aŭstralio.

There were ten certificates -- W.A. 4, Vic. 4, NSW 2.

Only one for the prize but it was a very good paper. All others for the certificates. Certificates awarded to:-

Miss O.E.Strempel, Wembley Park, West Aust.
Mr. A.E.Chamberlain, Bassendean, West Aŭstralio. (with honour)
Miss B.J.Gleadall, Mount Hawthorn, Western Australia.
Miss H.Bostock, Thornbury, Victoria
Mr. Owen Davies, Fern Tree Gully, Vic.
Mr. K.J.Hirschel, St.Kilda, Victoria.
Mr.A.E.Boyle, Northbridge, N.S.W. (with honour).

This is the first time the examination has been held in W.Aus. It has now been held in all States of the Commonwealth.

-----e-----

RESPONDO al Bo. en Yo. Vi petas respondon al jeno, "Ĉiuj substantivoj finiĝas je o. Sekvas al tio, ke ĉiuj vortoj finiĝantaj je o estas substantivoj. Sed la vortetoj do kaj tro?" Responde: Zam. nenie skribis, ke ĉiuj vortoj en o estas substantivoj. Per o vi substantivigas radikon, per i vi ĝin verbigas. Ĉu tio ĝenas la radikvortojn do aŭ mi, tro aŭ tri?

Por variigi la sonadon de Esperanto Zam. donis kelke da vortoj en -aŭ. Neniu malpermesas al vi ilin signe adverbigi, adjektivigi, substantivigi (baldaŭe, morgaŭaŭ, antaŭo).

EL MIA JUNEKO en SKOTLANDO. de BRUCE LOCKHART.

Mi faris mian unuan viziton al Glamis Castle por rigardi kriketan konkurson inter teamo de graflando Forfarshire kaj Glamis'a ludantaro estrita de Lord Glamis, la patro de nia nuna reĝino.

Rilate al kriketo mia patro havis fundan fervoron, kaj en tiu okazo li ne permesis min turni mian intereson for de la ludo por eĉ unu ekvideto al la kastelo. Eĉ ja, multaj jaroj forpasis antaŭ ol mi tra iris ĝiajn portalojn -- por vidi al la granda barona vestiblo kun ĝia iom-malvarma moderna komforto kaj miksaĵo da antikvaj trezoroj, la malnovaj ĉambroj kun la dormejo de Reĝo Duncan, kiun nia nuna reĝo uzas kiel tualetejon, la bela Lazlo-portreto de la reĝino en la buduaro de la Grafino de Strathmore; la litĉambro, nuntempe dekoraciita de Skota tartano, en kiu dormis "Bonnie" Prince Charlie kaj Sir Walter Scott; la fantome sugestia kuirejo malnova kun preskaŭ neniuj fenestroj kaj neniom da de-ekstera lumo, kaj la granda kamentubo etendiĝanta de la keleto ĝis la supro de la kastelo -- por vidi de la paŝplato de la kvadrata turo la plej belan pejzaĝon en Skotlando, kun la montetoj Sidlaw al la sudo kaj la Grampians sternitaj laŭ montecaj ondoj al la norda horizonto.

Mi neniam ludis kriketon ĉe Glamis, sed mia frato Rufus partoprenis kelkajn konkursojn. Unuokaze, dum la vizitanta dekunu batis, eta knabino forte amuzis la ludistojn kiuj atendis sian deĵoron. Ĉiufoje, kiam falis trafite stangeto, ŝi plaŭdis per la manoj kaj ĉirkaŭsaltis pro partianeca ĝojo.

"Kiu pilktrafis?" demandis unu el la vizitanta teamo.

"Tiu estas James," gravmiene diris la knabineto; "mi edziniĝos je li kiam mi estos pliaĝa."

James estis unu el la Glamis'aj lakeoj. La knabineto estas nun la reĝino de Anglujo.


La aĝo de la reĝino estas facile memorebla. Ŝi marŝas kun la dato de la jaro, ĉar ŝi naskiĝis en 1900.

----- L.E.BAILEY. (trad.)

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

222.43

LA RONDO



FEB. 1943.

No.5.VOL.3.

ELDONITA de F.R.BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

BARILOJ DE BABELO.
La Perfekta Poligloto.

En la kampo de la lingvoj, pli malkare ol en kiu ajn alia, homo povas havigi al si reputacion pri la klereco. Homo deklamas strofon de Heine aŭ Beranger, petole vin salutas per "Buenas tardes", klarigas pri tio: kial Italoj skribas "citta" -- kaj tro ofte la aŭskultanto rigardas la paradulon kiel personon tre eruditajn en lingvoj pri kiuj li efektive scias nur kelkajn malgravajn faktetojn. La emo tro supozi, tro facile konkludi, kaŭzas ke tre multe el ni opinias poliglotojn troveblaj "sub ĉiu arbusto". Ĝi ankaŭ fortikigas en la dilettanto kredon, ke li scias pli ol efektive. Tiaj impresumuloj estas miriadaĵoj. Simile al la vagabondo en "The Vicar of Wakefield", kun lia papage dirata citaĵo el la Greka, kiun li enverŝadis en ĉian volantan oreton, estas granda nombro da ludlernantoj, kiuj "ĉeestis bankedon de lingvoj kaj ŝtelis la fragmentojn", per kiuj ili pompe imponas

Multaj homoj de modesta aŭ nenioma klerigo sukcesis lerni fremdan lingvon ĝis iom bona buŝuzado. Inter tiaj estas maristoj, kelneroj kaj homoj kies geografiaj aŭ politikaj cirkonstancoj devigas komprenon de najbara(j) lingvo(j). Sed ili restas absolute nekapablaj taksi la artritudojn de la lingvo, kaj stulte nescias pri ĝia literaturo, historio kaj disvolviĝo. Krome, tia eĉ flua languzado ne ĉiam signifas korektecon. S-ro George P. Marsh en Lectures on the English Language 1885, rimarkigas, ke en la lingva kampo facile estas trompi sin pri efektiva scio. "Mi ne povas bone paroli la lingvon, sed ĝin komprenas," ofte diras homoj, kiuj povas diveni la temon de parolado, sed misaŭdas, do miskomprenas ĝin. Viro en Itala gastejo ekscite iris al Marsh, dirante: "The fellow has attached (leĝe konfiskis) my horses...." La gastejestro efektive diris: La ĉevaloj estas attacati (jungitaj). Marsh komplimentis sinjorinon pri ŝia bona buŝuzo de la Germana. Ŝi ridetis kaj konfesis: "Jen sekreto. Mi nur povis hezitaĉe balbute paroli ĝin, antaŭ ol mi artifice decidis eviti la perplekson de Der, Die, Das k.s. kaj ties kazoj, uzante senescepte Das en ĉiu okazo. Ĝis nun ŝajne neniu rimarkis tion."

La perfekta dulingvulo estas homo, kiu ne nur bone scias pri la gramatiko kaj literaturo de lingvo alia ol la sia, sed povas konversacii kaj verki en ĝi kaj fidele traduki el ĝi kaj en ĝin. Tiaj estas D-ro E.J.Dillon, Aylmer Maude, Maurice Baring, Eden kaj Cedar Paul. La vastan supozon, ke tiaj homoj estas oftaj, ne konfirmas observuloj, kiuj, ne kontentaj je nura impresoj, iom esploras la demandon. Lord Houghton (Monckton Milne) diris, ke la edzino de iu Franca ambasadoro asertis, ke ŝi konis nur tri Anglojn, kiu povas perfekte paroli la Francan -- Sir Alexander Cockburn, la Duko de Bedford kaj supoze Lord Houghton mem. Tiu ĉi konis nur unu -- Henry Reeve, redaktoro de "Edinburgh Review" kaj tradukinto de De Tocqueville.

En 1930 Arnold Bennett konfesis en la Londona "Evening Standard", ke post 25-jara studado de la Franca lingvo kaj literaturo, li ne povis France konversacii. Li skribis: "Li parolas France sambone kiel indiĝeno" estas aserto ofte aŭdata sed preskaŭ ĉiam malvera. Oni rakontas pli da romantikaj mensogoj pri la parolado de la Franca

ol eĉ pri la kapto de fiŝoj. Jen simpla historio: Mi komencis lerni la Francan en mia naŭa vivjaro. Je 22 mi decidis pli streĉi la penojn, kaj finfine povis legadi la lingvon laŭ ĝia ĉiutaga uzado. Post ne longe la ĵurnalistoj de Fleet St. prenis min por modesta, tamen fidinda aŭtoritatulo pri la Franca literaturo. Je 36 mi ekloĝis en Parizo, kaj mi devis konstati, ke mi nek povis kompreni ordinaran Francan konversacion, nek perbuŝe komprenigi min nem tiulingve. Je tiu tempo mi jam studis la Francan dum kvaronjarcento kaj pli ol dek jarojn verkis pri la Franca literaturo."

Simile al Bennett, Hilaire Belloc en sia "A Conversation with an Angel" devis agnoski sian nekapablon bone legi Francan gazeton, kaj ke malgraŭ vasta konanteco kun la Franca literaturo li ne povis doni fidindan juĝon pri peco da Franca poezio, ankoraŭ malpli pri Franca prozo. Post longa vivo, dum kiu li renkontis multe da verkistoj, li konis nur du, kiuj sciis eĉ iom bone la kvin ĉeflingvojn de Eŭropo.

Carlyle, kiu vaste tradukis el la klasika Germana kaj sciis ne malfunde pri la historia gramatiko de tiu lingvo, tamen senriske uzis la Anglan en sia korespondo kun Goethe, kiu siavice uzis la Germanan malgraŭ sia kapablo ĝui la verkojn de la Anglaj majstroj. Ŝajnas, ke tiuj famuloj bone legis sed ne facile verkis en lingvo alia ol la patra. Carlyle lernis la Germanan en Skotlando de iu S-ro Jardine; ne antaŭ ol li 63-jariĝis li vizitis Germanujon por mallonga tempo. Ĉu la tradukoj de Carlyle estas fidindaj -- jen afero por detala analiza komparo fare de kompetentuloj. M. Philarète Chasles opinias, ke estas tute neeble, ke maturulo lernu la Germanan ĝis kompleta posedo; maturulo povas lerni ĝin kiel D-ro Arnold lernis ĝin pro simpla erudicio. Tio estas lerni la Germanan kiel oni lernas la Latinon, sed tio ne estas perfekta regado super lingvo. Kromrimarke, estas relative facile traduki (ekzemple) verkon el la Franca similan al "If Winter Comes" en la Angla, en kiu verko la voĉtono kaj aliaj konversaciaj rimedoj estas gravaj faktoroj. Carlyle ankaŭ legis montojn da Francaj paskviloj, pamfletoj, gazetoj kaj libroj prepare al sia verko pri la Revolucio, sed kiam li renkontiĝis kun Louis Blanc "estis tre amuze rigardi ilian konversacion. La Franca de Carlyle estis laŭvorta traduko de lia netradukebla Anglaĵo, eldirita en dialekta Skota. Louis Blanc ne povis lin kompreni, sed atente aŭskultis, respondante tute maltrafe."

En la kampoj de scienco, politiko kaj milito la malbeno de Babelo tra la epokoj dolore pezis sur la homaroj, kaj rabis jarojn da utila vivo for de ĝiaj bonfarantoj. John Stuart Mill nur malfacile povis legi la Germanan. Ankaŭ Faraday ne sciis tiun lingvon, kun sekvo ke li ne povis studi la laboraĵojn de Robert Mayer kaj Heilmholz. Zola, fuĝinte al Anglujo, devis resti muta. Profesoro Todhunter de Cambridge studis la Rusan por ke li povu legi unu libron matematikan en tiu lingvo. Clemenceau ĉe Versajlo akriis fatalan influon pro sia posedo de la Angla kaj la Franca. Dum la retiriĝo de Mons, Sir John French intervjuis kun Generalo Lanrezac: "Ili reciproke nesciis la lingvon de la alia, kaj la intervidiĝo fiaskis. Pri tio la armeoj devis pagi la koston." (The Age, 23.9.1930). Jam havante atest-

traduki historion troganon, tiamanĝon, sed multe malpli facile

aĵon tiel fortan, ĉu necese, ke ni serĉu plion?

Fontoj: La Suda Kruco, Aprilo 1929, Majo kaj Junio 1930.
The Intellectual Life; kaj Human Intercourse (Phil. Hamerton).

----- F.R. BANHAM.

LA PREĜO DE AVIADISTO.

La sekvantaj poemo kaj letero estis verkita de Serĝento-Observisto Hugh Brodie, kaj estis adresitaj al la studentoj de la Melburna Altlernejo, kie li estis instruisto. Ĝia revuo "The Unicorn" la poemon publikigis. Brodie perdiĝis post aerbatalo lastan Julion.

Potenco ĉieesta, ĉiopova,
Al Vi mallonga estu mia preĝo:
Ne petas mi, en hor' batale prova
Apartan ŝirmon ekster Via leĝo.

La ĉiam neŝanĝebla leĝ' eterna,
Al kiu obeadas la stelaro;
Neniam ĝi nuligis nur por ŝirmi
La koron mian kontraŭ paf' mitrala.

La povon mortigadi mi ne petas.
Venketojn tiajn maltre ŝatas mi,
Ĉar malamikoj miaj ankaŭ estas
Amataj filoj, Patro, ja de Vi.

Sed preĝas mi: Je mia flanko restu
Dum tra ĉielo muĝos flama tondro;
En tiu tempo, ho Martiro-Kristo,
Al ankaŭ mi la vojon morti montru.

Miaj karaĵ knaboj,

Mi skribas ĉar mi amas vin. Vi estas studentoj en tiu lernejo en kiu mi, kiel studento, lernis multon, kaj, kiel instruanto, lernis ankoraŭ multe pli. Nin ligas tiu ligilo, kaj pro ĝi mi petas de vi paciencon indulgon. Donu al mi por unu fojo vian kompletan atenton: mi ne povas nun minaci vin per puntaskoj.

Ne sole por mi mem mi skribas. Kredu, ke tiun ĉi leteron skribis la junuloj de la tuta mondo, de la nekalkuleblaj homoj, kiuj, naskiĝintaj je ĉia raso, profesantaj je ĉia religio, surhavantaj ĉian uniformon (aŭ nenian), kaj plenumantaj ĉian imageblan taskon, laboras, batalas kaj mortas pro la libereco de la homoj.

Niaj patroj lasis al ni bonan mondon. Tamen ne sufiĉe bona. Tial ĝi hodiaŭ estas frakasata en fragmentojn. Ni ne povas savi niajn urbojn; sed eĉ en iliaj ruinoj estas konservabla ankoraŭ la

libereco. Se ni restos liberaj, vi devos konstrui la civitojn de la estonta tempo.

La antikvaj popoloj kredis, ke homa buĉfero, farata sur la bazŝtonoj de iu urbo, certigas al tiu urbo daŭradon kaj potencon. La sango de generacio nun elverŝiĝas pro viaj urboj; ne la sango de ŝnurligitaj viktimoj, sed de liberaj homoj. Ne malŝparu ilian oferon neŝate. Bone ĝin uzu.

Fine mi skribas por mi mem sole: Se mi per maljusta vorto aŭ ago agis kontraŭ kiu ajn el vi, pardonu tion. Se mi instruis ion bonan, agu laŭ ĝi. Se mi foje instruis ion, kion mi devus ne instrui, pelu el via memoro tiun instruon, sed ne la instruinton. Ne baldaŭ min forgesu, ĉar mi ne forgesos vin.

Via amiko, HUGH BRODIE (Sergento RAAF) (Trad.F.R.B.)

La supraĵ aperis en The Herald (Melbourne) la 15 Decembro. Mi sendus la originalon al iu homo ekster Melburno, kontraŭ p.m.

PUBLIKA PAROLADO HAVITA EN LA MELBURNA ESPERANTO-KLUBO
DE SINJORO R. RAWSON la 16an de DECEMBRO 1942.

Oni petis min paroli mallonge pri iu temo inspira. Tio estas malfacila tasko, ĉar kion inspiran oni povas diri al homoj, kiuj penas fari kontribuon al internacia harmonio kiam furiozas la plej granda milito en la historio de la mondo -- milito tiel granda, ke oni vere povas nomi ĝin globa? Ĉiujn batalilojn oni uzas, materiajn kaj mensajn, ĉar oni penas detrui ne nur la korpon sed ankaŭ la menson.

Neniu plantus kreskaĵon en grundon sennutran, kaj neniu saĝa homo atendus, ke la plej delikataj sentoj de la homaro ekflorus en atmosfero de malamo. Esperanto nur povas disvastiĝi, kiam montriĝas inter la nacioj emo vivi harmonie. Hodiaŭ la kondiĉoj estas malaj. La naciismo levas sian kapon pli arogante ol iam antaŭe. Homoj blekas, ke ili solaĵ el ĉiuj mondanoj estas la elektitaj, kaj ke rajtas vivi nur tiuj kreaĵoj, kiuj subtenas tiun dogmon. Kredi, ke oni povas disvastigi internacian lingvon en tia mondo estas revo de fantaziulo, kaj Esperantistoj ne estas viktimoj de fantazioj. Ili estas realistoj -- ne nur idealon ili havas sed ankaŭ la ilon per kiu ili povas ĝin efektivigi.

Ĉu do en la mallumo oni ne povas ekvidi brileton, kiu rajtigas nin esperi, ke malgraŭ la dolorigaj sentoj, kiuj trakuras niajn korojn, kiam ni rigardas la bolantan mondon, nia laboro ne estas vana? Mi kredas, ke jes. Malgraŭ ĉiuj signoj de malharmonio mi kredas, ke la plej multaj homoj emas al trankvila kunvivado. Oni ne rajtas juĝi naciojn laŭ la raŭkaj voĉoj de la homoj, kiuj dumtempe gvidas ilian destinton. Estas mia opinio, kaj mi klare memoras la unuan mondmiliton, ke malgraŭ la furiozeco de la dua la malamo kontraŭ la individuaj membroj de la malamiko ne estas tiel forta nun kiel en la jaroj 1914-

18. La fakto ankaŭ, ke politikistoj devas fari promesojn pri nova socia ordo, internacia justeco kaj ceteraj, indikas, ke ili agnoskas, ke la homaro sopiras al regno de justeco kaj frateco. Ĉiuj homoj, krom tiuj, kies mensoj estas kripligitaj de dogmoj, kiuj gloras brutecon, atendas, ke post finiĝo de la milito komenciĝos epoko de internacia harmonio.

Post la unua mondmilito homoj, post kvarjara disiĝo, soifis fari kontakton kun alinacianoj. Mil demandoj pri aferoj personaj, ekonomiaj, kulturaj amasiĝis en iliaj cerboj kaj postulis respondon. Post la nuna milito la deziro interrilatigi estos eĉ pli forta, kaj sendube miloj denove sin turnos al Esperanto -- la plej efika ilo por efektivi tiun deziron.

Hieraŭ en ĉiaj landoj homoj honoras la elpensinton de Esperanto -- **D-ro L. L. Zamenhof**. Unu celo de nia kunveno hodiaŭvespere ankaŭ estas por honori lian nomon. Mi memoras lin kiel homon, kiu, malgraŭ la ĉarĝo, kiun li sentis sur si, kuraĝis labori espereme por atingi elektitan celon. Hodiaŭnokte ni ankaŭ memoru la aliajn pionirojn, kiuj kuraĝis akompani lin, sed precipe ni memoru niajn samtempojn, ĉu en amikaj ĉu en malamikaj landoj, kiuj parolas la lingvon Zamenhofan. Ni memoru Kalocsay, Baghy kaj aliajn Hungarianojn, kiuj tiom riĉigis nian literaturon. Ni memoru la Svisajn samideanojn, kiuj dum tiom da jaroj kunligis nian movadon; la Germanojn, kiuj ĉe kongresoj gastigis nin tiel bele -- Teo Jung, redaktoro de "Heŭoldo de Esperanto", kiu, kiam devigita forlasi sian hejmlandon, daŭrigis sian laboron en la nova. Ni memoru niajn Francajn samideanojn, kiuj ĉiam okupis antaŭan lokon en nia movado, kaj Rusajn, Skandinavajn, Hispanajn, fakte Esperantistojn ĉiulandajn kun kiuj ni estas samcelanoj. Ĉie, ni povas esti certaj, ke ili sin preparas por tiu tago, kiam la mondo ne plu militos kaj ili povos denove dediĉi sin al sia paca laboro. Hodiaŭvespere ni faru decidon, ke ni estu indaj je ilia kunlaborado. Ni ankaŭ preparu nin. Ne plu ni estu kontentaj balbuti la lingvon sed plenernu ĝin por tiu tempo kiam alvenos la tagiĝo kaj ni povos eliri memfide por propagandi Esperanton kaj helpi kuraci la resaniĝantan mondon.

LETERO.

Kara Rondo:

Miaopinie tre bedaŭrinda estas tio, ke la gazeto ne publikigas elĉerpaĵojn el leteroj de alilandanoj. Kial oni ne povas rigardi ilin kiel literaturajn, mi tute ne scias; kaj kiel oni devas limigi la verkantojn je la legantoj, jen por mi vera enigmo. Tia politiko forbaras de la legantoj la eblon vidi kaj legi la laboron de neaŭstralianoj -- alivorte, Rondano ne povas iam legi artikolojn k.t.p. krom se ili estas verkitaj de samlandanoj. Tio, laŭ mia vidpunkto, signifas nuligi la principon, kiu instigis la kreon de Esperanto. Zamenhof inventis ĝin por plifaciligi interkomprenon de homoj en diferencaj nacioj. Kiel pli bone efektivi tiun principon ol per interŝanĝo de leteroj

kaj informoj? Ricevinte interesan, konfikan leteron, Rondano alte ŝatus permesen ankaŭ al siaj samrondanoj ĝin prezenti por ties ĝuo. Sufiĉe. Mi kritikas sur kampo, kie mi ne sentas min tre kompetenta, ĉar mia sperto tiurilata ne estas granda.

----- NAIVULO.

RESPONDOJ AL LETEROJ.

S.en S. La vorto por "surŝipa, suraeroplana ĉambreto pasaĝera" ne estas "kabano" (malriĉa dometo, domaĉeto), sed "kajuto".

Al TRADUKA KURSO:

Ĉar Gordon tradukis "the shoe will begin to pinch" per "ili sentos 'la pinĉadon de la ŝuo'", tial kelkaj anoj iom miris pri la laŭvorteco. Ni ne povas ĝuste nun citi analogian frazon en E-o, sed ni rimarkigas, ke Germanoj diras: "Ich weiss am besten, wo mich der Schuh drückt" (mi scias plejbone, kie min la ŝuo premas); kaj Francoj: "être dans ses petits souliers" (esti en siaj malgrandaj ŝuoj) t.e., to be uneasy in one's mind. La baza nocio estas: estis mense maltrankvila. Eble niaj Italaj, Rusaj, Bulgaraj, Jugoslavaj kaj alilingvaj legantoj povus ĵeti ankoraŭ da lumoj? Dankon.

ASOCIAJ AFEROJ.

GRATULON al S-ro I MASEL de W.E.S, kiu gajnis la Diplomon de la B.E.A. kaj al S-ro J.COUCHE pro lia promociigo al majora rango.

DANKON al ĉiuj samideanoj, kiuj sendis festosaluton al la Sek. kaj la Asocio. Pardonu, ke mi ne respondis individue al ĉiu, sed vera superakvego da salutoj nebligis tion.

KVITANCOJ ĜIS 12.1.43. Bonvole pagis la kotizon de membro kun LA RONDO, S-roj A.E.Chamberlain, G.W.Card kaj F-ino Gleadel. (Ĉar la Sek ferias la listo ne estas kompleta.)

I.E.L. kaj A.E.A. A.E.A. fariĝis Landa Asocio de Internacia Esperanto -Ligo je 1.1.43, kaj pro tio, individuaj membroj de la ligo nun povas pagi ties kotizojn al ĉi tiu Asocio por transsendo al la Centra Oficejo. Espereble ĉiu samideano, kiu povas, aliĝos al la Ligo, por ke en la fruaj pacotagoj la voĉo de la Esperantistaro aŭdiĝas en ĉiu angulo de la mondo. La ĉefdelegito, S-ro L.E.PFAHL, 64 Brighton St., Croydon, Sydney (N.S.W.) ricevos por A.E.A. tiujn I.E.L. kotizojn. NE sendu ilin al la subskribinto) La kotizoj en Aŭstralia mono por la diversaj membrokategorioj de I.E.L. estas:-

AM (Asocia Membro, kiu rajtas uzi la servojn de la Ligo) --neniu plia pago; via kotizo al A.E.A. enhavas la kotizon de I.E.L.

MA (Membr. kun Jarlibro kaj la monata gazeto "Esperanto Internacia) 10/-

MJ (Membro kun Jarlibro de I.E.L) -- 5/-

MS. (Same kiel MA, sed pagas pli altan kotizon por finance helpi I.E.L. -- 25/-.

Individuaj membroj de I.E.L. bonvolu pagi vian kotizon al S-ro Pfahl, kiel eble plej frue por ke ni povu transsendi la monon kun minimuma prokrasto.

ADRESSANĜO: D-ro F. Williams, nun ĉe Colonial Memorial Hospital, SUVA.

A.E.A. kotizoj estas jene:- Membro kun LA RONDO, 5/-. LA RONDO al nemembroj 3/6. Ĉiukaze sur poŝtbileto NE enskribu la nomon de urbo en kiu oni kontantos ĝin.

GEORGE HILLERMAN (Sekretario)
Box 75, Devonport, TAS.

SOLDATO. Private James Rose, V250502, HQ New Guinea Forces, tre ŝatus ricevi Esperantaĵojn por sin distri en liberaj horoj.

LA RONDO gratulas al S-ro Brodie (Perth), kiu gajnis la premion Pyke, kaj al lia samŝtatano Iser Masel (Cottesloe), kiu sukcesis ĉe la diploma ekzameno de la B.E.A.

GEEDZIĜO: En Melbourne je la 30a de Decembro geedziĝis F-ino Hettie Bostock kun S-ro Owen Davies. Ambaŭ estas anoj de la Melburna Esperanto-Klubo, kie ili unue renkontiĝis. La paro loĝas en Upper Fern Tree Gully.

KASO de LA RONDO.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£ s d
En la kaso	3.5.11
S-ro J. Rose.....	3.6
	<u>£3.9.5</u>

W.ADDIS,
25 Greville Ave.,
Flinders Park,
Adelaide, S.AUS.

<u>ELSPEZOJ.</u>	£ s d
poŝto.....	19.6
bindpingloj.....	1.6
papero.....	16.-
ŝablonaĵoj.....	10.6
luo.....	5.-
ok.elspezoj.....	2.8
	<u>£2.15.2</u>
En la Kaso 14/3	<u>£3.9.5</u>

ERAROJ en Jan. Numero. p221/25 Ebla sed.
p.222/8 propagandis. 224/11 de m. jes.
in this number will be listed in our next.

p223/8 *araneaj*
P.221/26 Praktika
Typing errors not corrected

NU TRADUKEMULOJ. (Vidu Paĝon 220)

(Ĉiuj ekzemploj de Zamenhof.)

- (1) Ŝi rigardas ŝin de alte kaj diras al ŝi, ke ŝi okupas sin je malsaĝaĵoj.
- (2) Tiam la cirkonstancoj ŝanĝiĝas.
- (3) La forta lumo tranĉas la okulojn.
- (4) La ideoj estis kalkulataj kiel infanaĵo, kiu estas inda nenian atenton.
- (5) Kiam oni montris al la homoj la forton de la vaporo, ŝajnis, ke kia prudenta homo povus ion kontraŭparoli kontraŭ ĝi?
- (6) Ĉiu malplenkapulo povis spritadi, kiom li volis.
- (7) Nenion diranta cirkonstanco.
- (8) La anara instinkto cedis al la nuda logiko.
- (9) Laŭtaj nomoj kaj alteflugaj frazoj.
- (10) Krianta erarpaŝo.

TRADUKU:

- (1) What in particular has lifted mankind so immeasurably above all other animals?
- (2) Cross-breeding of races.
- (3) Their choice would remain a dead letter.
- (4) We see with full assurance what particular kind of language will at some time be international.
- (5) In the space of some few weeks.
- (6) The question will by its simplemindedness evoke a laugh.
- (7) Incontrovertible facts and verifiable matters.
- (8) I took a fancy to it.
- (9) Where's the difficulty in it?
- (10) It's positively absurd not to use them.

RIMARKO: (vidu titolon p. 231.) Sendube multaj legantoj iom miris pri la stranga formo "parolado havita/de S-ro R." Ili verŝajne preferus skribi "farita" aŭ "donita". Ni ankaŭ. Sed la uzo de "havita" estis intencita, ĉar ĝi tiel staras sur p. 256 de Fundamenta Kretonomatio, do ricevis aprobon aŭ permeson de D-ro Zamenhof mem. Bone estas, ke E-istoj funde esploru tiun verkon aŭ almenaŭ legadu ĝin pro plezuro, tiel ensorbante ĝian lingvan spiriton kiel kontraŭpezon al troa legado de Angleca E-aĵo. Ni tamen avertu, ke, laŭ opinio de multaj, tiu formo (intermulte da aliaj) ne estas tre taŭga kaj devas esti kalkulita inter la arĥaismoj en tiu antologio. Kiom ni povas juĝesplori la aferon, ĝi ŝajne estas Germanaĵo devenanta el figura uzo de verbo "besitzen" (logi en la menso, posedi la menson de iu). Ĉu Germana amiko volus klarigi?

----- REDAKCIO.

LEGISTO: profesiulo sperta pri la leĝoj kaj iliaj aplikoj.
ADVOKATO: counsel, advocate, barrister.
JURISTO: jurist, one versed in the science of law-making.

RAPORTO DE RADIA PAROLADO JE 4BK KVINSLANDO.

Jam kelke da jaroj la Kvinslanda programo de la Zamenhof-naskcelebro enhavis ankaŭ disaŭdigon. La lastajn tri faris stacio 4BK Courier-Mail. Ĉi-jare parolis S-ro S. Wanner, prez-o de la Brisbana Esper. Societo, kiu rimarkigis, ke Kvinslando kaj D-ro Zamenhof naskiĝis preskaŭ samtempe. Kvinslando fariĝis kolonio la 10 Decembro 1859. La 15 Dec. samjare la eta Ludoviko Zamenhof elpuŝis sian unuan krieton en la mondo, en kiu jarojn poste diseŝiĝis per aliaj langoj lingvo tute fabrikita de li -- lingvo, kiu espereble estos baldaŭ universale akceptita kiel ilo helpa.

En Aŭstralio, pro ĝia ĉie-sama unulingveco, E-o ŝajnas eble superflua; sed la postmilita stato de la mondo necesigos eĉ pli intensan intermikson de popolanoj, sekve ankaŭ komunan interkomprenilon. Ankoraŭ neeble estas radie alparoli ĉiujn popolojn de ĉa tero per unu lingvo. La Angla estas, el ĉiuj nacilingvoj, la plej tervaste ŝemita, sed nur relative malmulto el teranoj ĝin parolas. Nur aŭskultu paroli ĝin fremdulon eĉ longjare loĝinta ĉi-lande -- per tio vi komprenus kiom estas malfacile al multe tiaj ĝia buŝuzo. Pensu pri via kajereca Franca lingvo super kiu vi paliĝis dum jaroj; ĉu vi pro tio povas kompreni kion diras Franco?

Ankoraŭ kampo en kiu povas servi E-o -- la parolanta filmo. E-a "talkie" eble uziĝus en ajna lando civilizita. Jam en tri-kvar filmoj oni uzis vortojn aŭ frazojn en E-o tie, kie oni timis, ke uzo de nacia lingvo povus ofendi certajn registarojn.....

Unu el la plej ardaĵ E-istoj, D-ro Fred Williams, kiu nun servas ĉe Colonial War Memorial Hospital, SUVA, vizitis en 1937 Varsovion en Polujo, por ĉeesti la Universalan E. Kongreson. Granda estis la ĝojo de tiu soleca delegito de malproksima Papuo, kiam li trovis sin inter homoj tre diversnaciaj, kiuj tamen parolis unu saman lingvon. Eĉ troviĝis policianoj kaj gazetbuboj, kiuj parolis E-on, almenaŭ ĝis grado certe utila al homo nescianta eĉ vorteton da Pola. D-ro Williams belrezulte parolis E-on en privata konversacio kun homoj, kiuj simile ne sciis silabon da Angla. Sed la plej grandefika montro al la utileco de E-o kompreneble doniĝis per la Kongreso mem, kie, kvaŝaŭ en sen-Babela mondo, ĉiu komprenadis la alian, parolante la saman lingvon. Li vidis malon ĉe iu "internacia" kongreso en Kopenhago, kie la parolantoj uzis kvar lingvojn, kio necesigis tradukojn en tri lingvojn en ĉiu okazo.

E-o ne estas fantaziaĵo, malsaĝaĵo, sed efektiva komunikilo inter homoj rase, lingve, kulture malsamaj. Facile estus plu diri pri la fluuzebleco, simpleco, beleco de tiu ĉi universa helplingvo, kiu tute ne estas senviva kolekto da vortoj, sed parolmedio fluanta de la lipoj libere, bonsone kiel eĉ la patra lingvo.

Zamenhof estis pli ol kompetenta lingvisto. Li vivis plejparte en poliglota Polujo. En la tiea Babelo li, kiel knabeto, ekkonsciis, ke lingvaj malsamecoj kaŭzas sociajn, politikajn, rasajn malsimpatiojn, bredas miskomprenon, malestimon, eĉ malamon. Por disrompi la baron de lingva diverseco li finfine elpaŝis kun lingvo, kiun la

plej modesta dotita kapo povas legi -- kaj paroli.

----- Resume tradukis F.R.BANHAM.

LA ABELOJ ĈE HEMPFIELD -- de David Grayson.
el "Adventures in Understanding."

Dum la nuna printempo -- pli ol en ĉiuj la pasintaj printempoj -- mi admiras kaj amas la abelojn ĉe Hempfield, kaj ilin rigardis longe, sed ne tute komprenante. En iu estonta epoko mi tute min okupos je la studado de la Abeloj, ĉiaspece, ĝis mi bone scias iliajn saĝajn komunumojn kaj ĉiujn iliajn bone ordigitajn morojn.

De kiam ni ekloĝis sur ĉi tiu flanko de la monteto kaj kulturis la ĉi-grundon, birdoj diverspece venis al ni, ankaŭ multe da malaplombaj bestetoj, inter kiuj estis kuniklo unuokula, kaj paro de Ĥinaj fazanoj, kaj familio de grizaj sciuroj; sed antaŭ ĉiuj aliaj -- la abeloj. Tial ke ili produktas belecon kaj abundon por ni mem, nome, pomoj, persikoj, prunoj, ĉerizoj, piroj, kaj ĉiu el la malgrandaj fruktoj, krom multaj riĉaj kaj bonodoraj arbetoj, kiel la sovaĝa lonicero, ni bonvenigis amike la abelojn. Ni kreis ian paradizon por la abeloj. Mi ne volas forgesi la medikagon kaj la trifolion en la fora kampo, kiuj baldaŭ komencos flori, nek la hubano, kiu floros pli poste. Mi taksas la nombron de la abelaro sur nia malgranda bieno je sepcent miloj: tamen, iuj diros ke la kamparo estas soleca.

El la tutaro, kompreneble troviĝas, grandnombre, niaj propraj kolonioj, kiuj donacas mielon al ni, sed ni estas gastigemaj kaj ĉiam bonvenigas multe da aliaj abeloj. Guste, nun, la riĉaj florantaj loniceroj estas kovritaj per abeloj vivantaj. Tiu maljuna giganto, la burdo, estas rapida laboranto kaj tre bruema. Li atakas, meznombro unu en ĉiu minuto, duoble tiom da floroj, kiom la abeloj. Tamen, li malbone sin kondutas; li estas kruda kaj fortika, kiel unu el niaj 'petrolsindikatoj'. Li sin rulas super la floroj, disŝirante la anterojn, eksaltas kapantaŭen, inter la petaloj, puŝante per sia tuta forto tra ĉiuj baroj, kaj prenante tion, kion li volas, ne petante permeson. Mi observe rigardis lin ĉe la akvilegioj. Li estas sperta rabisto, kaj forprenas la mielon, eĉ ne pagante kutiman imposton. Anstataŭ puŝi sian langon malsupren tra la korolo kaj tiel helpi distribui la polenon -- kiu estas la prezo postulata de la Naturo el la abeloj -- li eksidas sur la eksteraĵo de la floraĵo, kaj mordas tute tra la mola kreskaĵo kiel iu domrabisto, kaj forŝtelas la mielujon entute. Jes, li agas kiel moderna komerculo! Kiel diferencas la mielabelo; kiel lerte kaj plibone konduta tiu estas! Ŝi preferas uzi la cerbon ol la krurojn. Ŝajne, ŝi studas ĉiun floron antaŭ ol malŝpari sian energion pri ĝi, svedante momenton super ĝi -- ŝi aŭ vidas aŭ flaras ĝin -- kaj faras viziton nur kiam ŝi estas certa ke iom da nektaro rekompencos ŝin. Mi kolektis multe da floroj, kiujn laŭ mia opinio la mielabeloj malakceptis; mi disŝiris ilin sed ne eĉ unu ol tiuj enhavis brilan malsekatan eron da nektaro, kiun serĉas la abeloj. Nu, kiel scias tion la serĉantoj? Ŝajne, la burdo fuŝeniras en

ĉiun el la floroj, sen distingo, kaj trovas la mielprovizon nur hazarde.

----- HO-B0. (trad.)

EDWARD BELLAMY KAJ LA MONDHELPLINGVO.

En sia romano "Equality" (Egaleco) la aŭtoro parolas pri la problemo de helplingvo. En ĉapitro "Nek sur tiu monto nek en Jerusalemo" Julian West interparolas kun la predikisto Barton pri religiaj aferoj kaj sciigas pri la disaŭdigoj de predikoj kaj paroladoj ĉiuloken. West demandas:

"....sed kiel estas imageble, ke paroladisto parolas al tiom grandega aŭskultantaro, se ne ripetigas la pentekosta miraklo? Li ja devas almenaŭ linigi sin je tiuj komprenantaj la saman lingvon."

"Ĉu D-ro Leete efektive nenion diris al vi ankoraŭ pri nia mondlingvo?"

"Mi aŭdis nur Angle paroli."

"Kompreneble ĉiu parolas sian nacian lingvon kun sarnacianoj, sed kun la ceteraj nacioj oni parolas la mondlingvon -- t.e., ni bezonas scipovi nuntempe nur du lingvojn por paroli kun ĉiuj popoloj -- nian propran kaj la tutmondan. Lerni ni povas ja tiom da lingvoj, kiom al ni plaĉas, kaj kutime oni studas kelkajn pro plezuro; sed reale necesas nur tiuj du, se oni volas mondvojaĝi aŭ rilati ĉiuloken sen interpretisto. Multaj malgrandaj popoloj tute forlasis sian gepatran lingvon kaj parolas nur la interpopolan. La grandaj nacioj posedantaj en sia lingvo trezorojn da bela literaturo, nature malinklinas rezigni ĝin; per tio malgrandaj gentoj havas ian avantaĝon antaŭ la grandaj. Tamen la emo uzadi nur unu lingvon kiel vivantan kaj konsideri ĉiujn aliajn mortintaj aŭ mortigantaj, kreskas tiom rapide, ke eble, se vi dormus ankoraŭ generacian tempon, nur instruistaj filologoj estus kapablaj paroli kun vi."

"LA SENTOJ ESTAS SAMAJ!" Avinjo, maljuna nigrulino, estis mia flegistino. Ŝia nepo -- kiel kutime sur multaj bienoj de Georgio, estis mia difinita ludkolego kaj ĉiama kunulo. Lude, la sorto de Timmy estis malfacila, malpli grava. Li devis obei ordonojn sed ne povas doni ilin.

En unu tago mi rapidis hejmen de lernejo ĉar Timmy kaj mi projektis konstrui vojon de la lavejo al la puto. Kiel kutime, ni alprenis niajn nomitajn rolojn, Timmy estis la laboranta, ŝvitanta kondamnito -- mi la malkvietega, vipsvinganta gardisto. Mia insulto al la nigra knabeto ĵus alproksiniĝis plenaĝa perfekto, kiam Avinjo alvokis "Vi, infanoj, alvenu meti mian poton sur la fajron."

Ni alkuregis, ekkaptis la poton, kaj egale rapide faligis ĝin, mirigataj ke Avinjo ordonis al ni tuŝi ion kiu estas tiom varma. Tiam, per mallaŭtaj, molaj, vortoj, tiel klare ke mi ankoraŭ povas aŭdi ilin, Avinjo parolis.

"Ĝi bruligis ambaŭ vin. Viaj haŭtkoloroj estas malsamaj, sed la sentoj estas samaj."

----- el THE READERS' DIGEST, Okt.1942.

WESTRALIAN ESP-SOCIETY NOTES.

Okaze la jaran kunvenon, membroj elektis s-ron Saar kiel Prezidanton, kaj f-inon K.Dalton kiel vicprezidanton kaj s-ron Chamberlain kiel sekretario.

Dum la pasinta jaro gajnis diplomon (D.B.E.A.) s-ro I.Masel, vigla kaj fervora Esperantisto.

Kvar geanoj partoprenis la Pyke-Memoriga-Ekzamenon, ĉiu el ili sukcesis gajni ateston, krome unu havigis al si premion, kaj alia ateston kun honoro. Ni gratulu la ekzamenitojn.

Kvankam, pro militaj postuloj, kelkaj membroj perdiĝis al nia Societo, kaj ni tre sentas ilian foreston, tamen aliĝis novaj anoj, kiuj vigle studadas nian lingvon ĝis kompetenceco. Dume, ni atendas fruktoplenan jaron kiel rezulto de nia kunlaborado.

Pro militkondiĉoj estas tre malfacile ricevi lernolibrojn Esperantajn; ni demandas al ni, ĉu la gvidantoj de nia altestimata "RONDO" konsentos eldoni unu-du paĝojn speciale por komencantoj. Plue, oni sugestas, ke eventuale tiuj paĝoj estu kunbinditaj kiel multe bezonata nova lernolibro.

HO-BO.

ANKAŬ NI SENTAS la nunan malfacilon ricevi lernolibrojn por komencantoj. Bedaŭrinde, pro registara malpermeso, ni ne rajtas pliampliksi la ĝisnunan enhavon de LA RONDO. Ni tamen provos doni en ĉiu monato simplajn notojn pri la gramatiko Esperanta laŭ nia spacdisspono. Tiujn ni prenos ĉefe el "Step by Step" (Butler). La tuto estos kernece resumita formo de tiu lernolibro.

-----LA ADMINISTRACIO.

POR KOMENCANTOJ. (1)

Not all the letters in the Eng. Alphabet are used, but there are a few extra ones formed by adding the sign ^ to the letters c, g, h, j, s. Thus c (which is pronounced like ts) becomes ĉ, and sounds like ch in child, ĝ is like g in gentle, ĥ is a very strong aspirate, and j which is pronounced like the Eng. y, becomes ĵ like s in pleasure when it has the sign over it. S with the sign sounds like sh in she.

Of the vowels, A is broad like a in father, E is short like e in bet, I is like ee as in seen, O is not like o in Eng., it is more like aŭ as in fault, U is as oo in foot, and ŭ (with the sign ^ over it) looking like ŭ, is pronounced as w in wet.

THE ACCENT COMES on the last syllable but one, in all words of more than one syllable.

Here are some words. ESTAS means is, and LI means he, so LI ESTAS means he is.

One of the simple points in Esp. is that there are no plural forms in the verbs. The one form does for both. So ILI, which means they, can be put to estas to mean they are. LI ESTAS, he is, ILI ESTAS, they are. Similarly there are no feminine forms, so, as ŜI means she, ŜI ESTAS means she is.

Now learn KAJ, and. ŜI ESTAS KAJ ILI ESTAS, she is and they are. Next LA for the. FLORO means flower, so LA FLORO means the flower. KIO asks a question. KIO ESTAS FLORO? What is a flower? TIO answers the question -- TIO ESTAS FLORO, that, or that thing is a flower. EN means in, so LA FLORO ESTAS EN LA VAZO means the flower is in the vase, and SUR means on, LA VAZO ESTAS SUR LA TABLO, the vase is on the table. KIE asks the question where? KIE ESTAS LA VAZO? Where is the vase? The question is answered by TIE. LA VAZO ESTAS TIE, or ĜI (which means it) ESTAS TIE. Now learn INTER, between, LIBRO, a book, and SKATOLO, box. LA VAZO ESTAS SUR LA TABLO INTER SKATOLO KAJ LIBRO, the vase is on the table between a box and a book.

All adjectives in Esp. end in a and all nouns in o, so RUĜA ROZO means a red rose, and if you want to make it plural you must add j because in Es. adjectives have to agree with their nouns, so we have RUĜAJ ROZOJ, red roses. The sound OJ is pronounced like oj in toy, and AJ like I in fine.

The pronouns are very easy to remember, they are, MI, LI, ŜI, ĜI, NI, VI, (for both singular and plural) ILI; I, he, she, it, we, you, they. To turn them into adjectives you add a. MIA ROZO ESTAS EN VIA VAZO, or plural -- MIAJ ROZOJ ESTAS EN VIAJ VAZOJ. De means of, so we have FOLIO DE ROZO ESTAS SUR LA TABLO, a leaf of a rose (or a rose leaf) is on the table.

As the pronoun vi can be either sing. or pl. it would be right to say VI, SINJORO, ESTAS FORTA, you, sir, are strong, and VI, SINJOROJ, ESTAS FORTAJ, You, gentlemen, are strong.

The sound AŬ is a diphthong (a vowel-glide), pronounced like ah(wh)o or like a-oo said quickly, the a being broad. It is very nearly like the sound of ow in now. By itself, aŭ means or. LA ROZO ESTAS SUR LA TABLO AU EN VAZO, the rose is on the table or in a vase.


It is most important to have a good vocabulary. Make a list in column form in a special note book of all the new words you learn and revise them constantly. Here are some to add to those already given:- DOMO, house; MURO, wall; BILDO, picture; SEĜO, chair. INKO ink; UNU PLUMO, one pen; DU KRAJONOJ, two pencils; TRI MATOJ, three mats; KVAR KURTENOJ, four curtains; KVIN TASOJ, five cups; SES BRETOJ, six shelves; SEP TAPIŜOJ, seven carpets; OK KULEROJ, eight spoons; NAU TELEROJ, nine plates; DEK POTOJ, ten pots; DRAPO, cloth.

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon W5 Vic. Price 3d.

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIIO.

2 20-3 43

LA RONDO



MAR 1943.

No. 6. VOL. 3.

ELDONITA de F.R. BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

KONTRAŬSKORPIA SERUMO KAJ "MALEAGRO".

Averturo en Alĝero de BRIAN STUART, F.R.G.S.
(Tiun ĉi sendis leganto por tradukado.)

Du tagojn post ol la sorĉistino min sukcese kuracis, mi ekvidis la servistinon Hadeŝa ludanta kun granda nigra skorpio. Teruro min frapis. Ŝi incitis ĝin per lignopeco ĝis ĝi koleriĝis preskaŭ ĝis frenezo, tiam, fingre prenante ĝin, metis ĝin sur brakon. Je tio ĝia kolero ŝajnis foriĝi, sed mi klare vidis ĝin funde enpuŝi la pikilon dufoje en ŝian karnon. La piko de kiu ajn skorpio estas infere dolora, kaj tiu de la nigra speco ofte kaŭzas morton per animskuo. Hadeŝa, tamen, ŝajne sentis nenian doloron. Fine, enuiginte, ŝi ne plu volis ludi kun la danĝera besto kaj ĝin mortigis.

Mi demandis al ŝi: Kial ŝi ne sentis doloron? Ŝi respondis, ke la sorĉistino, kiu min resanigis, iam inokulis ŝin kontraŭ kaj la doloro kaj la veneno de piko skorpia. Ĉu ŝi estis imuna kontraŭ la postefiko de ĝia veneno? Tion mi ne scias. Sed evidente ŝi ne sentis doloron. Ŝia diro pri "inokulo" tre min interesis. Mi sciis, ke inokulo kontraŭ serpentmordo estas jam ĉiutaga afero en tropikaj landoj, kaj antaŭ ol foriri de Oran mi konsultis pri kontraŭskorpia serumo tre kompetentan kaj modernmetodan kuraciston. Li certigis al mi, ke malgraŭ la laboro de la Pariza Laboratorio de Tropika Medicino ankoraŭ ne ekzistas tia serumo.

Mi demandis Hadeŝan pri la metodo, kiun uzis la sorĉistino. Hadeŝa diris, ke ŝi fortranĉis la du lastajn segmentojn de skorpia vosto (ili enhavas la pikilon). La platan parton de la antaŭbrako, tuj sub la kubutartiko, ŝi tiam ŝmiris per suko de iaj plantoj el la beladona speco. Ŝi poste enpuŝis en unu grandan, elstaran vejnon la pikilon de la skorpio, kies veneno estis enŝprucigita. Tiu operacio kaŭzis ne pli da doloro ol ordinara hiperderma injekcio, kaj la paciento estas jam de tiam tute libera ne nur de la doloro sed ankaŭ de la danĝero de eventuale sekvantaj piko. Post ol paroli al Hadeŝa, mi sciigis de miningeniero de Brita Gujano, ke certaj triboj en la internlando kaj en Brazilio uzas saman metodon de inokulo.....

Ahmet donacis al mi du perdrikojn. Hadeŝa estis for, aĉetante ovojn, legomojn en la vendplaco. Do por ŝpari tempon mi preparis la birdojn kaj zorge metis ilin sur kesto en la kuirejo en facilvidebla loko. Jam kelkan tempon mi lekadis la lipojn anticipe al perdrikoj; tial, ekvidante kion ŝi enportis por mia vespera manĝo, mi ĉagrene koleretis. Ĝi konsistis el la nauza toda ŝafviando. Mi demandis: Kie ili estas?

"Perdrikoj?" kriis Hadeŝa, "kie estas pri perdrikoj? Mi vidis neniujn."

Ni serĉis tre detale, sed krom kelke da sangmakuletoj sur la kesto kaj iuj plumoj kaj intestaĵo en la rubujo, restis eĉ ne signoto plu. Tiun nokton ankaŭ la ŝafviando formalaperis.

"Katoj!" konkludis Hadeŝa, montrante al piedeta enpremaĵo en sablo sur la kuireja planko.

Mi pruntis kaptilon de Ahmet kaj tiunokte granda katino perdis la naŭ vivojn, ricevinte rompitan kolon.

En la sekvinta vespero mi tagmanĝis bongustegan pecon da meleagro. Mi perfekte ĝin ĝuis. Trinketante mian kafon, mi demandis al mi: Kiu bredas meleagrojn en Timimoun? Mi ne povis eĉ konjekteti pri tia. Mi vokis al Hadeŝa. "Tiu estis bonega peco da meleagro. De kie vi prenis ĝin?"

"Meleagro!" respondis Hadeŝa kun brulanta malestimo; "ĉu, manĝante ĝin, vi ne rekonas la guston de katviando?"

Mi firme rifuzis kredi, ke ŝtelema kataĉo povas havi karnon, kiu, kuirita, aspektas kaj bongustas tre simile kiel la bele blanka de meleagro-kapono. Tamen Hadeŝa ne emis al ruzpetolaĵoj, kaj ŝi tre verŝajne ne ruzpetolis pri tiu kato. Tamen mi decidis fari pruvon per propra mano. Vilaĝo Timimoun estis plena de katoj, senhejmaj, senmastraj elĵetitoj. Preninte pafilon, mi kaŝrigardis tra la pordo. Granda virkato, kun kapo serĉe premata en rustiĝinta skatolo....

Jam por la lasta fojo ĝi vekis min per sia orelŝira amaĵado. Mi ĝin senfeligis, preparis, kuiris. La dolĉegusta "meleagro" sendube estis katviando. Ĝis tiu tempo mi kredis, ke ne estas bone nutri nin per viando de karnomanĝa mambesto.

----- Trad. F.R.B.

SUB GRAVA SUSPEKTO.

Antaŭ nelonge, dum mi konversaciis kun amiko, ni parolis pri ne-regulaj aferoj kaj aliaj anomaliaj spertoj. Ni ankaŭ diskutis, kiom ofte homo estas ŝajne la celo de malica koincido.

Antaŭ ol ni disiĝis, li rakontis pri travivaĵo, kiun havis unu el liaj parencoj antaŭ kelke da jaroj.

Dum la elfosado, pretigante fundamenton de nova, granda konstruaĵo en Anglujo, oni malkovris diversajn objektojn, kiuj montris per sia stato, ke ili dum multege da jaroj kuŝis sub la nuna nivelo de la tero. Inter la trovitaĵoj estis feraj iloj, malgrandaj figuroj, rompitaĵ pecoj de vazoj, kaj diversaj moneroj. Oni supozis, ke ili apartenis al iama Roma fortikaĵo, kaj laŭkutime, mi pensas, ili fariĝus propraĵo de la ŝtata fisko, kvankam pri tia leĝo mi ne estas certa. Kompetentuloj ekzamenis, purigis, konsultis kaj fine klasifikis ĉiun eron. Tiam ia apuda muzeo aranĝis, ke ĝi faros taŭgan aldonon al sia elmontrado.

Antaŭ la publika malfermo, la Direktoro de la muzeo invitis certajn kompetentulojn, por ke ili povu senceremonie ekzameni kaj diskuti pri la siatempo uzo de la diversaj objektoj. La pligranda intereso estis direktita al ia monero. Oni ekzamenis ĝin, diskutis, ekzamenis certajn gravurojn kaj fine decidis, ke la monero estas vera uniko -- kaj pro malbona hazardo iu lasis ĝin ruliĝi sur la tapiŝon! Konsternite la grupo serĉis, kaj ankoraŭ serĉis, sed ĝin ne trovis. La Direktoro tiam diris, ke estas fakto, ke antaŭ momentoj ili havis valoregan moneron -- nun ili ne povas ekvidi ĝin. Ŝajnas al li, ke

estas malhonestulo inter la grupo. Li diris, ke ĉiu devus submeti sin al serĉado. Al tio ĉiuj konsentis -- krom la parenco de mia amiko. Li diris, ke ŝtelo inter tia grupo da famuloj estas tute nekredebla. Li proponis ankoraŭ pli intensan serĉadon. Lia sinteno direktis al li gravan suspekton, ke li estas la ŝtelisto. Ĉar li ne volis fari akuzon de ŝtelo kontraŭ iu el siaj amikoj, la Direktoro konsentis, ke ili faru alian serĉon. Post nelonge ili malkovris la perditan moneron. Ĝi staris sur sia rando tre apude al lignaĵo, kie etendiĝis la tapiŝo. La rilato inter la antikvaĵistoj tuj estis malstreĉita, sed unu rimarkis: "Vi metis nin en embarasan situacion." "Ne pli granda ol mia," respondis la parenco de mia amiko. "Prezentu al vi, ke serĉo efektive estus farita; kiam oni esplorus min oni trovus tiun ĉi -- " kaj li elpoŝigis moneron, similulon al la tiel dirita uniko!

----- C.W.BALLARD.

"GEGO" DONACAS SIAN ESPERANTAN LIBRARON AL N.Z.E.A.

Alexander Turnbull Library prizorgas la kolekton.

S-ro Georgo Gordon, eminenta veterano en Christchurch, skribis en Aŭgusto al la N.Z.E.A., donace proponante sian Esperantan libraron al la Asocio kondiĉe, ke tiu ĉi prizorgu ĝin.

La Prezidanto de la Asocio, S-ro B.Potts, vizitis S-ron C.R.Taylor, bibliotekiston de la fama Alexander Turnbull Biblioteko, ŝtata institucio, kaj aranĝis en la nomo de la N.Z.E.A. restadon de la libroj subzorge de tiu organizo. La biblioteko permesos prunteprenadon al akredititaj personoj laŭ la reguloj de tiu institucio, sed la kolekto restos posedaĵo de la Asocio.

La grandioza donaco konsistas el proksimume 250 Esp-aj verkoj, inter kiuj estas ĉiu de D-ro Zamenhof, D-ro K.Bein kaj Anton Grabowski; "La Revuo" (1906-14); "La Oficiala Gazeto" (1902-22); "Lingvo Internacia" (1909-24) kaj aliaj gazetoj; "Enciklopedio Vortaro Esperanta-Germana" (Wuster), kun multaliaj vortaroj kaj lernlibroj; antologioj el ok landoj; diversaj historioj de Esp-o; multaj prozverkoj, plejparte fikciaj, kaj poemkolektoj de niaj ĉefaj aŭtoroj. Krome, la donaco enhavas ankaŭ la valoran notaron, tre ampleksan, kiun kompilis S-ro Gordon dum multe da jaroj.

La Asocio intencas aranĝi, ke la Turnbull-Biblioteko bindu la nebinditan parton por konservi la diversajn dokumentojn kaj notojn.

-----Laŭ "Interna Ideo", Wellington, N.Z.

NEKROLOGO: Episkopo R.S.Hay, kies enterigo okazis en Tasmanio la 8an de Februaro, estis tiu menciita en LA RONDO (majo 1942) sub Kvinslando en "Memore al la Pioniroj." Pastro C. Cowling sciigis nin, ke la episkopo ĉiam havis en la koro bonvolon kaj intereson al la Esperanto-movado, kaj ofte demandis pri ĝia progreso.

SOLDATA GRUPO EN NOV-GINEO.

Kara Samideano:

A boon, kind redaktor! A small group is in operation among the soldiers or some of them in New Guinea. A dictionary is not obtainable; Edinburgh is preferred. Could you put a par. in, LA RONDO stating the case and asking any samideano with one to spare to send to:-

VX.100,636

Pte. R.C.Hatfield

BIPOD. A.I.F.

New Guinea Forces.

P.S. A letter or two with addresses of sam-oj would be welcome.

Thanking you, sincerely yours,

LESLIE PFAHL.

64 Brighton St., Croydon, NSW.

RESPONDO AL NAIVULO. Videble, Naivulo ne aŭdis, ke milito furiozas, do ni nun certigas al li, ke ja estas tiel -- kaj plue, ke tiu milito estas mondmilito, portante al ni nevenkeblajn malfacilaĵojn pri fremda korespondado kaj novaĵoj. Hodiaŭ oni ne plu ricevas "interesan, konriĉan leteron" de fremdaj landoj, kaj pri gazetoj jen la faktoj: Eŭropaj novaĵoj Esp-aj venas nur de S-ro Malmgren de Stockholm per "Esp. Internacia" tre malofte kaj tre malmulte. La subigo de Vichy-Francujo fortranĉis aliajn novaĵojn. Kun la perdo de Hong-kong kaj de la Burma Vojo perdiĝis al ni novaĵoj de Ĉinujo. Kompreneble ni havas nenion nuntempe de Japanujo. De Ameriko novaĵoj estas tre malmultaj. Ni ricevas de temp-al-tempo la "Brit Esp." kaj "Esp-o Internacia," kaj "Renobasion" (Mexico), (printed almost entirely in reform-phonetic Spanish), kaj tiam ni presas iliajn novaĵojn -- vidu p. 83, 123, 138, 169, 212, 219 de LA RONDO.

Pri la represo de artikoloj el tiuj gazetoj, du faktoj aperas:- (1) Ne malmultaj legantoj de LA RONDO ricevas tiujn gazetojn, kaj ne deziras, ke ni prenu spacon por materialon kiun ili jam antaŭe legis, kaj do neutilas al ili en LA RONDO. (2) Pro la multa spaco postulata de skribmaŝin-presado kaj ĝia nevariebla grandeco, ni ne povas, ĉar artikolo estas longa, prezenti ĝin per malgrandaj literoj kaj tiamaniere okupi malpli da spaco. Do ni povas aperigi nur malmultajn artikolojn, alie ni dronigus LA RONDO per unu artikolo kiu plaĉus al ni sed ne plaĉus al aliaj. En la nuna tempo, ni opinias ke LA RONDO estas plej utila se ni provizas legaĵojn kiuj estas de malsamaj gradoj de facil-malfacileco por legantoj kiuj ne povas havigi al si novajn leglibrojn. Tiajn artikolojn plej bone provizas niaj propraj verkistoj kaj tradukistoj.

Do anstataŭ plendi pri la neapero de fremdaj artikoloj, eble Naivulo prenis la malan vidpunkton kaj estus dankema ke ni havas inter ni tiujn, kiuj per sia laboro helpas nin en nia celo fortigi

kaj daŭrigi la movadon ĉe la hejmlanko, dum ni estas tiom fortranĉitaj de Esp-aĵoj el aliaj landoj.

Kiam estos pasinta la milito kun ĝiaj limigaĵoj rilate al korespondado kaj gazetoj, sendube LA RONDO sin alĝustigos al la novaj kondiĉoj de tiu feliĉa tempo, kaj, ni kuraĝas esperi, kontentigos eĉ al Naivulo.

----- LA ADMINISTRACIO.
ASOCIAJ AFEROJ.

LIBROSERVO. La Perantoj nun havas kelkajn stelojn -- 1/3 kaj afranko (Ponda broĉo kaj butono) bonvole donacitaj de S-ro G.W.Card -- Edinburgh Vortaro, La Faraono kaj Stranga Heredaĵo (la 2 lastajn tenas la Sek. kiu vendos ilin afrankite po 8/- kaj 3/6 respektive) -- de S-ro P.Clark, Edinburgh Vortaro, kaj Concise Course (ĉi lastan tenas S-ino A.C.Hintze (Vic.), kiu vendos po 1/3 kaj afranko) -- de S-ino A. Douglas 2/6. Dankon al ĉiuj!

GRATULON al D-ro C.J.CALDERA (W.A.), kiu gajnis la Diplomon de la B.E.A. Al HOB0 kaj C.W., kiuj bone uzas la kolonojn de "The Broadcaster" (W.A.) por propogandi. Al blinda, 16-jara JOHN HENSHAW, juna Esperantisto kiu sukcesis je la "Junior" Ekzameno. Al S-ro F.R.BANHAM pro artikolo en "Queensland Woman", kiu rapide varbis almenaŭ unu leganto de LA RONDO. Al D-ro C.CALDERA, kiu aranĝis, kaj S-ro MASEL kiu parolis en disaŭdigo de Nacia Radiostacio 6WN la 15an de Feb. Plia okazos en Marto aŭ Aprilo, kiam S-ino Wood parolos. Al P-ro R.R. MACARTNEY-NOAKE, kiu bone laboris por nia afero inter aviadistoj. Ni ĉiuj devus pli forte labori inter la armeanoj, tio multe helpus la postmilitan propagandon.

LETEROJ RICEVITAJ (pri Adresaro ĝis 13/2/43) S-ino Langtree, S-roj I.Masel, Macartney-Noake, Schwerin, F-inoj V.Cox, P.Worden, Deaconess M.Magery.

JARLIBRO. La nova eldonaĵo, kiu enhavos la Adresaron, kaj plenan informon pri la Asociaj Servoj atingos membrojn en Aprilo aŭ Majo. Ĝi estos por la uzo de membroj.

KVITANCOJ. (Ĝis 13.2.43). Bonvole pagis la kotizon de (1) Aliĝinta Grupo -- Brisbane Esp. Societo (2) Membro kun LA RONDO, S-inoj D. Breakspear, J.Langtree, J.Couche, F-ino E.B.Carrick, S-roj J.Couche, R.R.Macartney-Noake.

KOTIZOJ. Individuaj membroj de I.E.L. bonvolu senprokraste pagi kotizojn al la ĉefdelegito. La kategorioj kun kotizoj en Aŭst. mono aperis en Feb. numero. La A.E.A. kotizoj estas :- Membroj kun LA RONDO 5/-, LA RONDO al nemembroj 3/6 (afrankita). Sur poŝtbileto NE enskribu nomon de urbo en kiu oni kontantos ĝin.

GEORGE H.HILLERMAN (sekretario), P.O.Box 75, DEVONPORT (Tas.)

KASO DE LA RONDO. Feb. 1943.

ENSPEZOJ.....£..s..d	ELSPEZOJ.....s..d
Kont. Transpreno.....14..3	Poŝto.....19..6
Sino C.E.Stope, D.Breakspear..7..-	Papero.....17..6
Gesroj Couche.....7..-	Sablonaĵoj.....12..6
Sino Langtree.....3..6	Inko.....12..6
Sroj G.Card, T.Porter, F.Pitt...10..6	Luo.....5..-
Finoj A.kaj E.Godfrey, Carrick..10..6	Bindpingloj.....1..6
Finoj K.Crawford, Telfer.....7..-	Okazaj Elspezoj..2..8
Fino A.Bailey.....3..6	£3..11..2
Sroj E.M.Johnson, R.Lechmere...7..-	En la Kaso £1/7/-
Sroj Cohen, Mathews.....7..-	£4..11..9
Pastro M.Noake.....3..6	W.ADDIS
Pte E.Hogan.....3..6	Kasistino.
Vendoj.....7..6	
£4..11..9	

NU TRADUKEMULOJ! (vidu paĝon 235)

- (1) Kio propre levis la homaron tiel neatingeble alte super ĉiuj aliaj bestoj?
- (2) Kruciĝado de rasoj.
- (3) Ilia elekto restus nur malviva litero.
- (4) Ni antaŭvidas kun plena precizeco, kia lingvo iam estos inter-
- (5) En la daŭro de iaj kelke da semajnoj. (nacia.)
- (6) La demando per sia naiveco elvokos ridon.
- (7) Nemalkonfeseblaj faktoj kaj (tra)kontroleblaj aferoj.
- (8) Mi ekdeziris ĝin.
- (9) Kio da artifika tie ĉi estas? (aŭ, En kio kuŝas la malfacilo?)
- (10) Ne uzi ilin estus rekta absurdo.

TRADUKU.

- (1) She wears her heart on her sleeve.
- (2) He tore along the racetrack for all he was worth.
- (3) He said he was up against it.
- (4) She moons her time away building castles in the air.
- (5) He can readjust his mind to changing circumstances.
- (6) He was a tartar for physical punishment.
- (7) He flew off at a tangent.
- (9) That's where he's got the pull over us.

Knabeto eniris viandvendejon. "La patrino malakceptis vian biftekon; ŝi diris ke ĝi estas tiel malmola, ke ĝi povus servi kiel ŝuplandledo. "Pro kio do ŝi ne per ĝi riparas ŝuplandojn?" "Neeble! La najloj ne povis ĝin penetri."

ERAROJ EN LA FEBRUARA NUMERO.

LINIO MANKAS! Sur p.229, enmetu post "relative facile" la vortojn: "traduki historian, biografian literaturformon, sed multe malpli facile....."

P.228, 9 linioj de la malsupro: kiuj povas; 238, 6 de mals., alproksimiĝas; 239/15, kompetenteco; p 230, 7 de mals. forstreku "de" post "mondo."; p. 233, 16, esti mense...

NOTU: La vorto "hipoderma" p. 242 ne troviĝas en la vortaroj E-aj. Legu: subhauta.

EL FROM PIANO TO FORTE de MARK HAMBOURG.
eltiro kondensita.

Oni ree alvokis min al Aŭstralio en 1897 kun mia frato Jan, en tiu tempo knabo havanta dek vin jarojn kaj ŝajne fariĝonta bona violonisto.

Dum tiu dua Aŭstralia rondvojaĝo, mi renkontis Lord Brassey, la afabla Guberniestro de Victoria. Tio estis ĝojo, ĉar li tre amis la muzikon, sed samtempe malhelpo pro tio, ke li insistis, ke oni rezervu vaka la antaŭan vicon da seĝoj por li kaj lia sekvantaro ĉe ĉiu el niaj koncertoj, kaj kompreneble li ne povis ĉiam ĉeesti. Multajn fojojn ni certe eblus vendi tiujn rezervitajn seĝojn, ĉiun el ili, tamen ni devis teni ilin, okaze la guberniestro venus. Malgraŭ tio, li estis plene bonvola.

Dum mi estis en Melburno mi renkontis Mark Twain ĉe la Garrick Club. Li entreprenadis lekcio-rondvojaĝon, kaj estis ĉie akceptata kun entuziasmo, kien ajn li iris. Ni komprenis unu la alian jam de nia unua intervidiĝo, kaj li faris apartajn klopodojn ĉe estis mian koncerton en tiu vespero. De tiu eliĝis la jena farsa okazaĵo. Mark Twain alvenis la koncerton ĝuste kiam mi surpaŝis la estradon por komenci ludi, kaj dum li iris al sia sidloko, la publiko komencis aplaŭdi, kiel ili kutimas kiam la artisto unue aperas. Twain estis tro okupata trovi sian sidlokon por rimarki, ke mi jam atingis la estradon, kaj ekvidanta, ke la aŭdantaro aplaŭdas, prenis tion kiel komplimenton por si mem, ĉar li estis tre populara en Aŭstralio. Do, li komencis kliniĝadi, akceptante la plaŭdon, dum ankaŭ mi mem klinadis min sur la estrado. Ni ambaŭ daŭris saluti la publikon ĝis mi subite ekvidis lin kaj li, sammomente, ekvidis min! Li rapide sidiĝis kaj komencis studi la programon kun detala atento, lasante min estro de la okazaĵo!

En New South Wales mia frato kaj mi iris de Sydney por viziti la famajn Jenolan Caves en la Blue Mountains. Por fari tion, ni devis vojaĝi multajn mejlojn per veturilo tirita de kvar ĉevaloj, ĉirkaŭ intermontoj de nekredebla kruteo. Mia juna frato estis tiom timigita, kiam ni kuregis laŭ la plenrapido de la ĉevaloj

sur tordaj montaj vojoj ĉe la rando de tiuj kapturnaj profundeg-
aĵoj, ke li kuŝadis sur la planko de la veturilo por ne vidi la
krutegaĵojn, kiuj fendiĝis ĉe ambaŭ flankoj. Sendube la Sidnejaj
homoj nun vidas tiun longan kaj plenaventuran vojaĝon kiel nuran
plezurekskurson per aŭtomobilo, facile entreprenatan inter lunĉo
kaj ĉefmango en la urbo; sed en nia tempo ĝi okupis du tutajn
tagojn!

DU BIST WIE EINE BLUME (Heine).

Eben as a lovely flower,
So fair, so pure thou art;
I gaze on thee, and sadness
Comes stealing o'er my heart.

Vi estas ĉarma, bela,
Kaj pura kiel flor';
Vidante vin mi sentas
Malĝojon en la kor'.

My hands I fain had folded
Upon thy soft brown hair,
Praying that God may keep thee
So lovely, pure, and fair

Ŝajnas, ke metu la manojn
Sur vian kapon mi,
Preĝante, ke pura kaj bela
Kaj ĉarma restu vi.

KATE F. KROEKER.

K. kaj P. SCHWERIN (Trad)

La Germanan originalon ni sendus kontraŭ peto al la redaktoro.

LA SUPERAKVEGO.

Antaŭ kelkaj jaroj okazis tre stranga afero ĉe nia ŝafbieno
en malproksima regiono de Suda Aŭstralio kaj eĉ ĝis nun la loĝa-
ntaro parolas pri ĝi kiel La Superakvego.

Nia hejmo estis konstruita en tre belegaj ĉirkaŭaĵoj sur dek-
livo; okcidente kaj sude troviĝis ĉeno de montetoj, kaj norde kaj
oriente zono de pinoj kaj majestaj eŭkaliptoj kiuj etendiĝis mult-
tajn mejlojn ĝis ili atingis densan arbetaron. Antaŭ la domo ĉe
la okcidenta flanko kuŝis ebenaĵo tute sen ŝtonoj aŭ ia speco de
kreskaĵo, kiu antaŭ la superakvego estis kulturita.

En unu Aprila mateno, malgraŭ ke nenia pluvo okazis ĉe tiu
ebenaĵo, oni observis sternaĵon de malsekeco, kaj poste malgrand-
aj lagetoj aperis kiuj tage plilarĝiĝis, ĝis fine la tuta ebenaĵo
iĝis lago de sala akvo.

Grade ĝi etendiĝis tra la arbotero kaj eĉ, fine, je la miro
de ĉiuj vidantoj, atingis la sovaĝan arbetejaĵon kie faliĝantaj arboj
subakviĝis.

Alvenis centoj da birdoj de diversaj tipoj kiujn nature oni
vidas nur en la najbaraĵo de multa akvo -- mevoj, markorvoj, sov-
aĝaj anasoj, koturoj, galinoloj, k.t.p., kaj la rebrilo sur la
senmova akvo de la eŭkaliptoj kun iliaj etendiĝantaj branĉoj kaj
de la birdoj, faris mirindan vidaĵon, precipe ĉe sunsubiro.

Post malmultaj semajnoj, oni observis, ke la akvo nun rampas al la lantonda ŝedo, malgraŭ ke tiu estis multe for de la domo, kaj je tondada tempo (Septembro) la ŝafkortoĵoj komplete malaperis sub akvo, kaj estis necese starigi pli proksime aliajn kortojn sub sableca monteto. La vojoj iĝis tre glitecaj, kaj pro tio, devigis nin fari novajn vojojn kaj trovi aliajn lokojn indajn por la pordegoj tra kiuj iros la grandaj aŭtoveturiloj peze ŝarĝitaj per lano. Tio estis granda problemo.

Homoj venis de kaj proksime kaj malproksime por rigardi la neordinaran vidaĵon. Certe ĝi estis belega. Vizitantoj de la urbo kutime diris ke nia hejmo estis la plej pitoreska kiun ili iam ajn vidis; tamen, ĉiuj konsentis ke per la akvo ĝi akiris eĉ pli allogan ĉarmon.

Strange estas, ke sammaniere kiel venis la akvo, grade ĝi malrapide malaperis, tiel ke je Kristnasko nenio estis videbla. Tiam kaj poste naniu sukcesis klarigi kial kaj kiel "La Superakvego" okazis -- akvo kiu venis ne de la ĉielo sed de la tero.

----- R.G.TELFER.

Pri LA INDIANOJ de la AMAZONA REGIONO.
El WHITE WATER and BLACK MAGIC de Richard C.Gill.

Komercaĵoj estas aparte gravaj kiam vi esperas atingi viajn celojn, ĉefe, per starigo de kontaktoj kun primitivaj homoj kaj virinoj kiuj, ĝuste ĉar ili estas primitivaj, estas tiale ekstreme kutimemaj, kaj povas iĝi ofendataj kiam oni proponas al ili komercaĵojn kiuj ne rekte allogas ilin. Fakte, ili povas iĝi danĝeraj se ili nur kredas, ke kelkaj eroj el viaj komercaĵoj estas "magio" de la malĝusta speco, ĉar ilia tuta vivrutino estas sekvado de intenca magio pro kiu nenio okazas hazarde - laŭ kiu la rikolto malsukcesas, aŭ la kanoto renversigas, aŭ onklino Tula estas forrabita de la najbaraj ĉumbelanoj, aŭ kuzo Katafalco estas embuskita, nepre ne pro naturaj kaŭzoj, sed pro kialoj de la Nigra Magio de la densejo.

Sekve, vi elektas viajn komercaĵojn kun ekstreme zorge. La kudriloj, fadenoj, malkara juvelaro, tranĉiloj, drapo, speguloj, kombiloj, fiŝhokoj, hakiletoj, simplaj iloj, kaj la tutcetero de la iom paradaĉa miksaĵo devas esti laŭ konata kaj fiksita modelo. Nur tre malofte oni povas ŝanĝi tiun modelon de primitiva interŝanĝo per la propono de novaj kaj neprovitaj aĵoj.

Malgraŭ miaj jaroj de primitivaj kontaktoj kaj mia regiona bonfamo kiel sukcesa praktikisto de nigra magio ambau tiu de la blanka homo kaj de la Indiano, mi nur tre malofte sukcesis proponi novajn erojn de komercado. Mi ĉiam memoros la unuan fojon.

Dum sennombraj generacioj la bonkoraj sovaĝoj kiuj vagadas la Supran Amazonan regionon oriente de mia bieno ornamadis siajn vizitaĵojn per orang-ruga substanco konata achote...botanike rilata al nia papriko de komerco. Per longa persisto mi fine konsentigis

maljunan amikon, sulkecvizaĝa curaco, provi neforigeblan krajonon por tiu celo. Zorge krucdesegninte sian vizaĝon per tiu mistera kompliko de linioj kaj ciferoj kiuj estas la vizitkarto de la Indiano (kiu se vi scias kiel legi ĝin informas vin pri lia regiono, ĉu li venas aŭ iras ekskurse, kiel estas klimataj kondiĉoj, kaj eĉ pri lia nuna emocia stato - malamikemo, malĝojo, militspirito), li pririgardis sin per malgranda spegulo, kaj liaj ledecaj lipoj malrapide sulkiĝis laŭ silileco de rideto. Li tute ekenamiĝis en la ŝanĝkoloran desegnon sur sia ĉaf~~o~~-au-lait vizaĝo, kaj post ne longe neforigeblaj krajonoj de la Napo al la malsupra Pastazo valoris sian pezon kaj pli en preskaŭ ia aĵn produkto de la densejo. Kompreneble, la nova vizaĝpentraĵo ne daŭris tre bona sub pluvego, sed eĉ la magio de blanka homo havas siajn malfortajn flankojn.

Sed ordinare la komercaĵoj devas konformi al la laŭza modelo de sovaĝaj ŝatoj kaj malŝatoj. Drapo, neblankigita muslino, devas estis el gusta kvalito kaj koloro; la floroj kaj birdoj sur la tre malkaraj komercaĵoj devas esti tropikaj laŭ speco, hakiloj devas havi konitan tenilon; la curi-mujo (laŭvorte, "semoj de oro," kiel oni nomas la komercaĵojn) devas estis ora, blanka, blua, ruĝa aŭ verda, tial ke nenia respektinda homo aŭ virino portus iun aĵn alian koloron.

La preferate aĉa juvelaro (ne temas pri kolringoj, manradikaĵoj kaj pendaĵoj kiujn mem faras la Indianoj el globetoj) devas ankau konformiĝi al diktata modelo de primitivaj konsentitaj ŝatoj kaj malŝatoj. La orelingoj ekzemple, devas esti la unu-pendaĵa speco; la kolringoj, ne haveblaj en tiu ĉi lando (Ameriko) venas de Eŭropo, jam tie kunmetitaj por komercocelo. Dudek kvar individuaj kaj nekredeble brile koloritaj ŝnuretoj venas prete kunligitaj ĉe amb- aŭ ekstremo per ŝnureto. Tiu metodo kunligi fondas porteblan juvelaran montrotablon. Vi povas teni la blindige brilajn seriojn en unu mano, gestadi fortege per la alia dum vi pripreze diskutas kun la ekscitataj vizaĝoj ĉirkaŭ vi. Trafante vian interkonsenton vi detiras unu aŭ tri, aŭ iu aĵn nombron da individuaj ŝnuretoj per unu figinta gesto, tordante la vizaĝon samtempe laŭ maniero pri kiu vi kuraĝas esperi, ke ĝi estas kompleta ŝajnigo de malespero je estanta rabato. Komercaĵojn oni neniam nomas "komerco", oni ĉiam aludas al ili kun ĝentilaj gestoj kiel interŝanĝo de donacoj, eĉ qvankam vi eble diskutis amare dum horoj pri prezo.

Mi ĉiam ŝatis la riverhomojn. Ili estas la plej bonaj kaj ~~mal~~ inteligentaj el la "publikaj portistoj" de la densejo, tamen ilia plej rafinita metodo de transportado estas iliaj grandaj mane hakfaritaj kanotoj. Ili neniam vidis eĉ la plej primitivan radveturilon (iliaj vojetoj estas nur kotecaj ruband-largaj piedirejoj) kaj havas nenian koncepton iri de unu loko al alia krom per iliaj kanotoj aŭ kruroj. Pro tio, ili estas eĉ pli ol plejmultaj Indianoj komplete ensorĉitaj de ilustraĵoj kaj bildaj anoncoj el malnovaj gazetoj, aparte tiuj kiuj elmontras metodojn de transportado pri kiuj ili neniam songis.

Kiel multaj primitivuloj, ili unue havas grandan malfacilon fokusi la okulojn ĝuste sur pecon de papero kiun ili tenas je ŝanĝ-

igantaj anguloj. Kaj, eĉ kiam iliaj for-kutimaj okuloj ja lernas la signifojn de la ilustraĵoj, ili ankoraŭ havas nenian ideon pri la gradoj de ties grandeco. Estas malfacile por ili kredi ke bildo de aŭtomobilo aŭ ĉevalo povas esti tiom malgranda ol efektivaj aŭtomobilo aŭ ĉevalo. Foje estas nur kiam mi montris al ili bildon de aŭtomobilo kun homoj en ĝi, aŭ de ĉevalo kun homo sur ĝi, ke ili kredas min - sciante jam grandecode homo - kiam mi diras al ili ke la bildoj estas malgrandaĵoj figuraĵoj de pli grandaj objektoj, kaj ne estas mem objektoj. Alifoje, kiam ne troviĝas homoj en la bildoj, estas pli malfacile. Mi havas amikojn inter ili kiuj ankoraŭ kredas ke elefanto, kies bildon mi montris al ili, estas malgranda besto kiu neniam kreskas pli granda ol la etaj marmotoj kiujn la Indianoj tenas kiel dorlotatojn.

Iam, vidante bildon de domo, ili palpis la glatbrilan supraĵon de la presaĵo kaj ekkriis "Ha, la domo estas infanetdomo! Ĉu inter viaj popoloj troviĝas plenaĵaj domoj?" Ilia aparte prefarata bildo estis ilustraĵo portretante mane hakfaritan kanoton. La Indianoj tuj ekkaptis la fakton de la kanoto, kaj tiuj kiuj rigardis ĝin alvokis siajn amikojn vidi ĝin. Iuj el ili, kiam ili vidis ĝin por la unua fojo, provis enmeti la manojn en ĝin kaj estis konfuzitaj kiam ili ne povis tion fari. Sed malgraŭ tio, ili longtempe kredis, ke ĉar la bildo estas malgranda, ĝi figuras nur ludilan kanoton, same kiel iliaj infanoj eltranĉas el pecoj de ligno.

----- LA UNUA ESPERANTO SEMO EN ANGLUJO.

En Oksfordo okazis la unua lernado de Esperanto ĉe la angla-lingvaj popoloj. Mi ne scias, kiu unue altiris al ĝi la atenton de la Brita publiko; tamen mi ĉiam kredis, ke tiu estis S-ro Henderson, la aŭtoro de Anglo-Franca, Lingua kaj similaj projektoj.

Ĉiukaze, mi unue aŭdis pri Esp-o kiam mi estis studento ĉe Balliol...Iun tagon, en la Autuno de 1887, mia kolego, S-ro Walter J. Crawhall, kuris en mian loĝejon kun ekzemplero de la nun malaperinta ĵurnalo "St. James's Gazette", enhavanta duonon de kolono pri la elpensado de Pola doktoro, "D-ro Esperanto", kaj citanta, kiel ekzemplon de lia laboraĵo, strofon de Ho, mia kor. Tio, mi supozas, estis la unua Esperantaĵo presita en la Britaj Insuloj. Mi atribuis la artikolon al Henderson (kvankam mi ne povas esti certa) ĉefe tial ke li estis la sola persono en la lando en tiu tempo kiu ŝajne traktis tiajn aferojn, kiaj internaciaj lingvoj.

----- R.H. GEOGHEGAN

LA HISTORIO instruas, ke internacia lingvo per si mem ne povas efektiviĝi universalan frataĵon. Tamen ankaŭ tion: ke neniu unuopa faktoro povas tion fari sen internacia lingvo. Sen reciproka interkomprenado lingva la homoj neniam eniros epokon de tutmonda kamradeco.

POR KOMENCANTOJ. (2)

These lessons are available separately at one penny each plus postage. ALL correspondence relating to the lessons to be addressed to Miss Bailey, 18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

The root of a word is the part that never changes. You can add prefixes and suffixes which will give variations to the meaning, but the idea in the root remains. The root of the word love is lov, so we have - love, lovable, beloved, loving. Esperanto builds far more on roots than English and thus saves much labour in acquiring a vocabulary. For instance, a foreigner learning English would have to learn the following ten different words - good, bad, beautiful, ugly, high, low, large, small, wide, narrow, but to express these, an Esperantist needs only five words with the help of the prefix MAL- which means "the opposite", so we have for "good, bad" BONA, MALBONA. Similarly, BELA, MALBELA; ALTA, MALALTA; GRANDA, MALGRANDA; LARGA, MALLARGA; (note: larga in Esp. does not mean large, it means wide).

Learn the following words and put MAL- in front of them to make their opposites and think of the English of these for yourselves:-

DIKA, thick; DOLĈA, sweet; FELIĈA, happy; INTELIGENTA, intelligent; (remember the G is hard when it does not have the sign over it) GRAVA, important; FACILA, easy; JUNA, young; MOLA, soft; HONESTA, honest (sound the H); LONGA, long; PROKSIMA, near; MODERNA, modern; VALORA, valuable; SAGA, wise; VARMA, warm; RAPIDA, quick; RIĈA, rich; and the following nouns - AMO, love, MALAMO, hate; AMIKO, friend, MALAMIKO, enemy; ESPERO, hope, MALESPERO, despair; GOJO, joy, MALGOJO, sorrow; SANO, health, MALSANO, illness.

ESP-0 has 18 prefixes and 33 suffixes. In a later lesson we will give you a complete list. In the meantime here are a few useful suffixes: -IN, -ID, -IST, -ET, -EG. -IN signifies the female gender and -ID offspring. ĈEVAL- is the root for horse, so we have ĈEVALO, ĈEVALINO, ĈEVALIDO, horse, mare foal; BOVO, BOVINO, BOVIDO, ox, cow, calf; KOKO, KOKINO, KOKIDO, cock, hen, chicken; (three words with suffixes to nine different English words!)

Practice with the following roots: AZEN-, donkey; KAPR-, goat; LUP-, wolf; RAN-, frog; STRUT-, ostrich; VULP-, fox; HUND-, dog.

Sometimes the prefix VIR- is used to emphasise the male sex, so VIRKATO, tom-cat; VIRPASERO, cock-sparrow. VIRO means a man.

The suffix -IST is used to indicate someone habitually connected with. TELEFONO, TELEFONISTO, telephone, telephonist; MARO, MARISTO, sea, sailor; DENTO, DENTISTO, tooth, dentist; HARPO, HARPISTO, harp, harpist. Add -IST to the following roots and translate:- PIANO, piano; FRUKTO, fruit; SPORTO, sport; ARTO, art; POŝTO, post; JUVELO, jewel; VIOLONO, violin; LINGVO, language.

The suffixes -ET and -EG make the meaning of the root smaller and larger respectively:- KNABO, KNABETO, KNABEGO, boy, small boy, big boy; KNABINO, KNABINETO, KNABINEGO, girl, small girl, big girl; KORBO, KORBETO, KORBEGO, basket, small basket, big basket.

Words in Esp-o are often joined together, in which case, unless it makes the compound word easier to pronounce, the o at the end of the first root is generally left out. LIGNOPECO is phonetically easier to say than lignpeco (ligno-peco, wood-piece, i.e. piece of wood) so we have the o, but not in the following words: LAMPLUMO, lamplight; BIRDNESTO, bird's nest; LETERFINO, the end of a letter. The meaning of a compound word is seen by splitting it up in reverse order thus: Lumo de lampo; nesto de birdo; fino de letero.

The main root stands at the end, so KAGBERDO means a cage-bird, i.e., a bird which lives in a cage, while BIRDKAGO means a bird-cage, i.e., a cage for a bird. Here are some others: PIEDPAŝO, (piedo-paŝo) footstep; KORSEKRETO (korosekreto) heart-secret; MUZIKAMO (muziko-amo) love of music; KANDELFLAMO, flame of a candle; ORANGSUKO, orange juice; LIMONGRAJNO, lemonpip.

The order of words in Esp-o is very free. Instead of saying BLANKA LILIO ESTAS EN LA ĜARDENO, a white lily is in the garden, one may say EN LA ĜARDENO ESTAS BLANKA LILIO, or ESTAS BLANKA LILIO EN LA ĜARDENO.

NE, no, is an exception, it must precede the word it negatives. TUTE, quite, NE TUTE, not quite, TUTE NE, quite not, i.e., not at all. MI NE ESTAS TUTE SANA, I am not quite well, MI TUTE NE ESTAS SANA, I am quite not well, i.e., I am not at all well. NE may be used as a prefix: VI ESTAS NEĜENTILA equals VI NE ESTAS ĜENTILA, You are not polite. NESPERTA, inexperienced; NEPRETA, unready; NEDISKRETA, indiscreet. MATURA, ripe, NEMATURA, unripe. NE is not so strong as MAL-; BONA, good, NEBONA, not good, MALBONA, downright bad.


Learn the following phrases off by heart and say each one out loud so that you will become accustomed to hearing your voice make the new sounds. This will save you from feeling awkward or shy when you try to speak the language to other people.

PILKO ESTAS RONDA, a ball is round; LA PLUMOJ DE BIRDO ESTAS EN ĜIA VOSTO, FLUGILOJ, KAJ SUR ĜIA KORPO, feathers..tail..wings..body; LI ĈIAM ESTAS SEN MONO, always..without money; SUR LA GRUNDO ESTAS ŜTONOJ, ground..stones; LI ESTAS KIEL REĜO, he is like a king; POR VI KAJ ANKAŬ POR MI, for you and also for me; LA LEONO ESTAS EKSTER LA KAVO, the lion is outside the cave. KAFO SEN LAKTO SED KUN KREMO, coffee without milk but with cream; DEK UNU SEKUNDOJ, 11 seconds; DEK DU MINUTOJ, 12 minutes; DEK TRI HOROJ, 13 hours; DEK KVAR TAGOJ, 14 days; DEK KVIN SEMAJNOJ, 15 weeks; DEK SES DUSEM AJNOJ, 16 fortnights; DEK SEP MONATOJ, 17 months; DEK OK SEZONOJ 18 seasons; DEK NAŬ JAROJ, 19 years. SINJORO JONES ESTAS FRAULO, Mr. Jones is a bachelor, FRAULINO SMITH, Miss Smith; EN LA DEZERTO ESTAS SABLO, desert, sand; PRINTEMPO, SOMERO, AUTUNO, VINTRO, spring, summer, autumn, winter. LA POŝO KIU ESTAS EN MIA ROBO ESTAS TRE UTILA, the pocket which is in my frock is very useful; ILI ESTAS INFANOJ, they are children.

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon W5, VIC., Price 3d.

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIIO.

20.4.43
LA ROMBO



APR. 1943.

No. 7, VOL. 3.

ELDONITA de F.R. BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

PRI LA PLENDEMO.
(SIR WALTER MURDOCH)

En romano de William de Morgan, ĉasisto de danĝeraj bestoj preparas sin rakonti al junulino pri unu el siaj aventuroj kun tigroj. "Mi pensas bone antaŭinformi vin," diris la ino, "ke mi favoras la tigran." Permesu al mi averti vin en simila spirito, ke mi favoras al la plenduloj, sen kiu aserto vi eble rigardus la sekvantan kiel prediketon pri la devo esti gaje kontenta, kaj la peko plendi, grumbli, ĉikani, serĉi mankojn.

Miaopinie malsaĝa estas la kutima respondo al la kritikantoj: "Trove priplendaĵon estas facile al stultulo." (A). Kompreneble, vidate kiel aserto pri fakto, tiu diro estas neforargumentebla. Konsentite estas, ke ĉiu malsaĝa homo povas malsaĝe plendi; sed nur saĝa homo povas saĝe plendi. Vidi precize tion, kio estas malĝusta; neti fingron celtrafe sur neperfektaĵon; diri nudavorte, kion vi ne amas, negrave ĉu temas pri paro da botoj aŭ sistemo de filozofio, pri gasforno aŭ religia kulto, pri nova pentraĵo aŭ antikva sociformo---jen laboro ne farebla de malsaĝulo. Ĝi postulas tutan vian inteligenton kaj saĝacon.

Rigardante en la pasinteco, ni vidas kiom grande ni ŝuldas al tiuj homoj, kiuj tra la generacioj prenis sur sin la sendankan taskon grumbladi. Nia civilizacio estas la verko de homoj grumbl-emaj, plendemaj. Protestado estas la sankta fonto per kiu sin nutras la ĉefradiko de la civilizacio. Ĉiuj bonaj leĝoj en la registrolibro de la homa socio havas sian lokon ĝuste pro la postulemo de grumbluloj. Rimarku, en ajna periodo de la historio, la tiutempajn malbonojn kaj ankaŭ la kaŭzojn de ties forigo. Vi vidas ke, frontate de kruela, abomena maljusto aŭ fi-regado, saĝaj homoj plendis---dum la malsaĝaj konsentaĉe submetiĝis.

La homoj estas divideblaj en du kategoriojn---facilanimuloj kaj grumbluloj. Mi favoras la grumblulojn, ĉar mi scias kiom mi ŝuldas al ili. Se ne leviĝus en la praa tempo iu nepopulara mal-kontenta kavernloĝanto, mi hodiaŭ loĝus en kavernoj kaj ĉirkaŭmordus ostojn de strangaj bestoj.

Mi devas rimarki, ke estas du specoj de grumblo. Tute neefike estas (1) plendi pri la neeviteblo; faras nenion plendi kontraŭ la rondeco de la tero. Malbone estas por la animo, priplendadi la tromalvarmecon de la polusa zono, aŭ la trovarmeco de la tropika. Tertremoj, uraganoj, malpluvoj, maljunaĝo, jen malbonoj, kiujn ni devas porti senplende; malsame ol epidemioj kaj draste altaj doganoj, ili ne estas fortuneblaj de la homa saĝeco.

Krome, malutilas (2) grumbli pri la pasintaĵoj. Eĉ la dioj ne povas igi faritan nefarita. "Oni vane larmaĉas, priplorante perdverŝitan lakton"---mi ne konas alian proverbon en kiu kuŝas pli da filozofio. Mi iam legis pri Orienta moŝto, kiu sidis ĉe manĝo kun la preferata edzino. Subite ŝia multfalda robo ekflamiĝis, kaj post kelkaj momentoj nenion da ŝi plu restis. Sonorile alveniginte servistojn, la moŝto ordonis al ili: "Forbalau la

cindron de via mastrinoj kaj enportu la rostitan fazanon." En tio ni havas belan ekzemplon de tiu egalanimeco kun kiu ni devus rigardi aferojn unu fojon por ĉiam okazintajn.

La supraĵ du specoj de plendado estas tute senutilaj, anim-premaj al aliaj homoj, kaj terure tedaj kiam ili jam fariĝis kutimaĉo. Sed la aliajn specojn mi forte aprobas kaj laŭ modesta povo pratikas kiel sanktan devon. Estas ankaŭ alia malsaĝa diro: "Detrua kritiko estas senutila: kritiku konstrue." "Detrua kritiko," jen frazo uzata de pompeparolaj homoj por nomi la grumbladon. Sed ĉu la detruo ĉiam estas malbona? Mi ankoraŭ kredas, ke la detruŝipoj (destrojeroj) estas utila parto de la Brita Mararmeo. La Panama Kanalo ne ekzistis, se iam certa homo ne dediĉus sin al la bona tasko detrui moskitojn en la tiea regiono.....

La inklino facilanime akcepti aferojn jam firme establitaĵojn estas treege forta en ĉies menso. Kiam Bismarck servis kiel ambasadoro Prusa en St. Petersburg, li rimarkis postenulon, unu el senfina serio, gardestaranta en la mezo de soleca herbejo en la Somera Ĝardeno. Stranga loko por postenulo, ĉu ne? Tiel li sin demandis; fine li serĉis respondojn ĉe aliaj homoj. Neniu rememoris. Scivoleme li esploris pli funde kaj fine akiris informon pri la origino de tiu pure formala gardostaro. Unu tagon, antaŭ jarcento, la Imperiestrino Katerino la Granda, admirante iajn galantojn en la herbo, ordonis soldaton stari tie ĝis ŝi revenos por kolekti la floretojn. Sed tiuj forgesiĝis, do ŝi ne revenis. De tiu tago ĝis tiu en kiu miris Bismarck, sur la loko ĉiam staris armita postenulo. Jen vera rakonto. Eĉ se ĝi ne estus vera, ĝi estus alegorio tre trafa. Similaj postenuloj staradas en ĉiaspece strangaj lokoj; ili staradis jam tiel longe, ke ni sendemande lasas al ili la ekziston. Se iu homo ekplendas pri ili, demandante por kio ili eĉ utiletas, ni atentigas lin pri tio, ke ajna sencerbulo povas forigi postenulojn, sed kion li starigu anstataŭ ili? Je tio mi paŭzas, serĉante ilustron en la menso. Mi trovas tion apude, ĉe la propra maniko. Kiacele sidas tiuj tri butonoj ĉe fino de moderna jakmaniko? Mi ne kuraĝus sugesti al nia tajloro, homo kore nefortika, la abolicion de tiu butontrio, kiu cetere havas en si neniom da ornamo kaj antaŭ du jarcentoj perdis la utilon. Mi mencias la butonojn nur por doni ekzemplon de la tre persista instinkto pri konservemo. Mi neniel sugestas, ke ni plendu pri ili. Ho ne! Estas tria speco de grumblado nepre evitinda---grumblo pri aferoj neniel gravaj. Ekzistas aferoj multe pli gravaj ol butonoj.

Eble vi amas la logikon? Do lasu min atentigi, ke ĉiufoje kiam vi voĉas tiun malnovan diron: "Kiu ajn stultulo povas plendi," vi fakte uzas argumenton, kiu detruas sin mem, ĉar uzante ĝin vi mem estas plendanta. Vi plendas pri la plendantoj: vi kritikis la kritikantojn: Vi grumblas pri la grumblantoj. Se vi tiel fervore amas la konsentigemon, kial vi ne konsentigas antaŭ nia grumblado?

Finfine, mi esperas, ke, leginte ĉi prediketon, vi iom longe

penŝos antaŭ ol ripeti la absurdan babilaĉon pri trofacila plendado, detrua kaj konstrua kritiko kaj la cetero. Agrablaj, societemaj kaj bonkoraj homoj, kiuj aplaudas ĉian trivialaĉan prezentadon, kiun elektas por ili la teatristoj---homoj, kiuj krias "Bravo!" pro tre malbona muziko, murmuras "Bele!" antaŭ aĉa farita pentraĵo, aŭ skulptaĵo meritanta dinamiton, kaj akceptas sen protesto ekonomian sistemon, kiu kondamnas kvar kvinonojn de la mondo al malnobliga mizero---tiaj homoj faras grandan krimon kontraŭ la devo, la sankta devo grumbladi.

(A) En Proverbaro (No.252) Zamenhof skribis: "Kritiki estas facile, fari malfacile." "Kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe." (Rimarko de la tradukinto.)

----- F.R.BANEAM (Trad.)

FRAULINOJ PAROLANTE.

"Kiel varme estas hodiaŭ, Mario! Ĉu vi ne opinias tion? Mi tre malamas labori dum tiaj tagoj, sed por malpiuloj ne estas ripozo. Kial vi ridetas?"

"Lilio, vi ne estas malpiulo, nur nepensulo vi estas. Eble vi sentas vin laca pro vizito lastan nokton al kino kune kun Vilĉjo. Kian filmon vi vidis?"

"O Mario, ĝi estis la plej ĝuinda, kiun mi iam ajn vidis. Mi tiel ĝuis ĝin, ke mi ŝatus rigardi ĝin ankoraŭ dek fojojn. Ronald Colman estis la ĉefa aktoro, kaj mi vere opinias lin la plej bela viro en la mondo. Mi amas lian hararon, okulojn kaj lipharojn, ankaŭ liajn elegantajn manierojn."

"Diru pli pri ĝi, Lilio! Apenaŭ mi povas atendi la rakonton pro ekscito. Mi ankaŭ tre amas lin, mian plej preferatan aktoron. Rapidu!"

"Do, Mario, li estis blinda!"

"Blinda!"

"Jes ja. Ne je la komenco de la filmo, sed poste, kiam li revenis de la milito. Komence li estis riĉulo, kiu fianĉiĝis al bela virino kun blondaj haroj kaj bluj okuloj. Ili estis geedziĝontaj kaj preparis sin por la soleno, kiam milito eksplodis, kaj kompreneble Ronald soldatiĝis, estante ne nur belulo sed ankaŭ heroo. Estis tiel malgaje, ke mi ekploris, kaj Vilĉjo diris al mi, ke li ne plu eskortos min al kino se mi kondutos min tiel nedece. Ĉu vi povas imagi tion?"

"Ne."

"Jes, li vere diris tion, kaj..."

"Ŝŝŝ ... Lilio ... alproksimiĝas la estro..."

(Jes, sinjoro, ni rapidas, ni ĉiam rapidas...)

"Ĉu li foriris, Mario?"

"Jes, la porko. Kiel mi malamas lin! Mi ne povas imagi kiel li povis iam logi al si edzinon. Li estas tiel malbela---

ne kiel Ronald Colman. Sed daŭrigu, Lilio. Kio okazis tiam?"

"Do, Mario, li forestis dum du jaroj, kaj la heroino kaj ĉiuj aliaj opiniis, ke li estas mortigita, kaj la gepatroj de la knabino volis, ke ŝi edziniĝu kun alia---viro blonda kaj sen lipharoj. Li ne plaĉis al mi, kiu spirpreĝis fervore, ke ŝi ne edziniĝu kun li. Sed ŝiaj gepatroj persiste petadis, ke ŝi ja faru tion, ankaŭ la viro forte deziris aŭdi la sonorilojn. Fine ŝi preskaŭ konsentis, jen tiam la situacio ŝanĝiĝis---sed, sed mi laciĝas ... mi daŭrigos post tagmanĝo."

"Ne, ne, Lilio, daŭrigu nun. Mi ne povas atendi ĝis tiam. Ni sciu nun pri la fino de la filmo."

"Nu, mi daŭrigas, Mario. Dume, Ronald Colman, kiu agadis noble tra la batalo, blindiĝis pro frapo de bombopeco; li estis tiel fiera, kaj tiel purkore amis sian fianĉinon, ke li decidis ne reveni por preni ŝin edzinige, sed anstataŭ foresti ĝis la tempo venos, kiam ŝi eble forgesos lin kaj kun alia edziniĝos. Kompatinda Ronald, kiel mi plorpepis! Sed neatendite, komerca afero venigis lin hejmen. Per helpo de sia servisto li povis kaŝi sian blindecon kaj ŝajnigi esti forta kaj sana viro. Ili interkonsentis ĉiam starigi en la samaj lokoj la meblojn, pipon, tabakon kaj aliajn aĵojn en la domo; tial Ronald ĉiam sciis, kie ĉio estas. Tiamaniere ili povis trompi la najbarojn kaj vizitantojn. La aranĝo estis tre sukcesa ĝis unu tagon lia eksfianĉino lin vizitis. Embarasa situacio! Li salutis ŝin ĝentile sed neame. Ne sciante, ke li estas senvida, ŝi etendis ambaŭ manojn al li, sed li, ne vidante ŝin, ne faris reciproke. O la situacio estis tiel malgaja, ke mi lasis fali larmgutojn tiel dense, ke Vilĉjo turnis la dorson al mi kaj gruntis--jes, gruntis--kaj..."

"Daŭrigu, Lilio, mi petas."

"Do, Mario, la heroino tute ne komprenis, ĉar li ja ne aspektis blinda, kaj ŝiaj sentoj estis vunditaj. Ili interparolis pri siaj estontaj planoj, tiam ŝi foriris el la domo. Sed ŝi profunde pensis pri la afero dum ŝi iris tra la kampo hejmen kaj subite ekkomprenis. Li estas blindulo kaj ŝi ne antaŭe tion divenis! Tuj ŝi revenis en la domon, rekte en liajn brakojn, ĉar ŝi amis lin kaj komprenis. Kaj tio, Mario, estas la fino de la plej ĝuinda filmo, kiun iam ajn mi vidis, kaj kiam la teatro subite lumiĝis la larmoj estis ankoraŭ sur la vangoj. Vilĉjo rigardegis min kaj diris: 'Neniam plu. Vi faras min stultulo.' Mi indigne respondis: 'Ne mi, sed la Naturo faris tion por vi.'

"Ĝuste en tiu momento ni renkontis kun Muriel Harris---kiu lastan jaron laboris tie ĉi je la apuda maŝino---kaj ŝian fianĉon, Ted Graham. Ted demandis al Vilĉjo, ĉu li ĝuis la filmon, kaj Vilĉjo respondis, ke ĝi estas la plej sange aĉa prezentado, kiun li iam ajn vidis. Ili ambaŭ krude ridegis.

"Mi estis muta pro kolero, sed poste, kiam ni eliris el la kino kaj mi povis regi la voĉon, ni kverolis pri la afero kaj poste mi aŭdis ankaŭ Muriel kaj Ted akre disputantaj samteme. Mi intencas neniam plu paroli al Vilĉjo!"

"Neniam, Lilio?"

"Neniam, Mario! Mi metis finon al la afero kaj redonis al li la ringon. Mi serĉos alian viron, kiu pli similas al Ronald Colman, nobla, bela, malkruda...Ĉu prave mi agis?"

"Jes, Lilio. Laŭ mia opinio tute prave. Sed ŝŝ -- ŝŝ -- jen la estro! (Jes, sinjoro, ni rapidas!)"

----- O. GLENIE.

LA SUPRA SKIZO pri "The Light that Failed" estas sugestia, en tio, ke ĝi povas inspiri al aliaj legantoj de LA RONDO pensige aŭ ridige verki artikolon pri sia "plej amata filmo." Almenaŭ, ni tiel esperas, kaj anticipe dankas al kontribuontoj.

----- REDAKCIO.

VOĈO EL LA INTERLANDO.

De S-ro Thomas Porter, Yetholme, apud Bathurst, venis al ni letero, kiu povas enhavi kelkiojn da intereso por urbanoj. Tiu estiminda ano de nia malaperiganta kampularo informas nin inter alio, ke li regule ricevas la tradukajn foliojn kaj LA RONDO, kiujn li ĉiuvorte legas, tiam atendas tiujn de la venonta monato.

Kvankam li loĝas kampare li estas tiel tre aferplena, ke li havas preskaŭ neniom da libera tempo por studi nian lingvon. La tagluma dekreto ankoraŭ pli malfaciligas la aferon, ĉar ĝi donas ankoraŭ kroman horon da laborpova tempo. Por kio? demandas li. Kion koncernas lin, ĝi devigas lin al ekstra horo da laboro ĝardeno aŭ aliafera sur la bieno. Por certaj laboruloj sendube la ekstra horo signifas pli da plezura distro, sed en Yetholme, kiel najbaro esprimis la situacion, la homoj ellitiĝas horon frue kaj enlitiĝas horon malfrue.

Li havas nenium kun kiu li povus interparoli Esp-e. Li foje penis interesi aliajn pri Esp-o sed vane. Preskaŭ ĉiam oni diris, ke ĝi ŝajnas ne necesa por ili. Persone li eltiras multe da plezuro el studo kaj lego de Esp-o, kiam oportune estas al li tion fari. De post li komencis lerni Esp-on, li ensorbis pli da Angla gramatiko ol kiom li lernis junule. Li tamen rimarkigas, ke havanta 40 jarojn homo ne estas tiel mense retenema kiel kiam juna, kaj li ofte forgesas aferojn supoze lernitajn. Li aldonadas metode al sia provizo da vortoj, sed la neofte uzataj postulas multe da enmemorigo. Spite tion li diradas al si: "Tom, persiste antaŭen! Fine vi alvenos la celon." Per salutoj al kunlegantoj kaj -kursanoj li finas la leteron.

Jen bela ekzemplo de izolula kuraĝo! Dankon pro la inspiro, S-ro Porter.

LA ĜENTILECO konsistas en mil malgrandaj sin-oferetoj.

LA MISTERO DE LA "MARY CELESTE."

La tuta ŝipanaro de la "Mary Celeste" malaperis, por ĉiam, antaŭ pli ol sesdek jaroj; sed eĉ hodiaŭ la mistero de ilia sorto, kaj eble ĉiam estos, afero por interesega kaj senfina diskutado.

Ĝia historio estas nek la unua de tiu speco nek la lasta, sed ja estas la plej konata, la plej firme atestita kaj la plej neklarigebla. Laŭ scio, neniu, kiu forveturis per la "Mary Celeste" en Novembro 1872 vivis unu monaton poste.

La 6 Novembro 1872 la brigeto "Mary Celeste" kuŝis ĉe kajo en Nov-Jorko por fini la enŝipigon de ŝarĝo antaŭ ol forveturi al Ĝenovo. Apude kuŝis la "Dei Gratia" de Nova Scotia. La "Mary Celeste" estis ligna ŝipeto, 98 futojn longa kaj 25 futojn larĝa. Ŝajnis, ke ĝi unue nomiĝis "Amazon", poste "Mary Sellars" kaj poste (pro pentrista eraro) "Mary Celeste". Estis 7 ŝipanoj, kaj ankaŭ ĉeestis la edzino kaj filinetoj de la estro, Kapitano Briggs. Do estis 10 personoj entute. Ĝi portis ŝarĝon de komerca alkoholo en lignaj bareloj por komercistoj en Ĝenovo. Ĝi forveturis la 7 Novembro.

Posttagmeze la 5 Decembro la brigo "Dei Gratia" (de Nov-Jorko al Gibraltaro), kiu estis tiam ĉirkaŭ meze inter la Acoraj Insuloj kaj Portugalujo, trovis, ke ĝi malrapide alproksimiĝas al iu brigeto. Pli proksime la estro, Kap-o Moorhouse, rekonis, ke ĝi estas "Mary Celeste". Li kaj Kap-o Briggs estis kamaradoj; jam ili kunmangis la antaŭvesperon de la forvojaĝo. Do Moorhouse signalis, kaj tre miris ĉar li ne ricevis ajnan respondon. Kaj li ankau forte demandis al si, kial la ŝipeto, kutime estrata de kapablulo, vagadas tie kaj tie kun la veloj malĝuste motitaj. Kiam la ŝipoj estis nur duonmejlon for unu de la alia, Kap-o Moorhouse teleskope rigardis la direktilojn sed trovis nenion tie. Li ankau zorge okulserĉis la tutan ferdekon simile vane.

Lia miro ŝanĝiĝis en dubon kaj maltrankvilon. Li refis velojn kaj sendis boateton por esplori. La viroj trovis nenion eksterordinaran krom tio, ke la ŝipo estas tute senhoma. Kap-o Moorhouse ankau transiris, kaj li kaj la ĉef-maato zorge iris posten kaj eniris en la kajuton. Estis tute senhoma, sed la bonordeco estis tre mistera. Sur la tablo estis stabilo kaj aliaj kudriloj---forta ŝipskuo estus forrulinta ilin. Sur la tablo estis mangrestaĵoj kaj nefinita letero, kiun skribis la ĉef-maato. De najlo pendis poŝhorloĝo de Kap-o Briggs. La dormlokoj estis tute normalaj. Ĉiuj estis bonordaj krom tiu en kies kapkuseno ankoraŭ montriĝis impresoj de infana kapo. La monkesteto kaj kelkaj proprajoj estis netuŝitaj. Aliflanke, unu el la mangajkestoj ŝajnis esti rapide malplenigita. Kvankam la vojaĝlibro estis tie, nenie troviĝis la aliaj ŝippaperoj, la kronometro kaj la sekstanto.

Tute nekompreneblaj, la du viroj daŭrigis la esploron. La kuirejo estis bonorda, kaj ankau la ŝipanoj. Tie staris la plenaj vestkesto de la ŝipanoj. Lavitaj vestoj pendis de ŝnuro.

Raziloj estis ankoraŭ akraj kaj senrustaj. Estis kelkaj monujoj, proprajoj, tabako kaj pipoj.

Ŝipanoj de la "Dei Gratia" malkovris la holdon kaj trovis ĝin tute seka, la ŝarĝon bonstata kaj netuŝita; la mastoj, ŝnuroj kaj veloj estis ĉiuj bonstataj kaj sendifektaĵ, kaj la ŝipo havis sufiĉon da manĝo kaj akvo.

La vojaĝolibro ne multe helpis. Senzorge skribita, la lasta noto estis de 25 Septembro. Ĉio, kion ili povis kompreni de la esplorado estis, ke la ŝipo certe estis forlasita post mallonga averto. Alie, ĉu la anoj estus forlasintaj siajn proprajn, eĉ siajn pipojn kaj tabakon? Ili ne develigis la ŝipon, kaj foriris kun nenio krom iom da manĝo kaj la pornavigaj instrumentoj. Plej strange estis, ke la edzino foriris sen provizaĵoj por si aŭ etulino.

La boateto de la ŝipo, ordinare pendigita ĉe la posta parto, estis for. Ĉu la tuta ŝipanaro foriris en tiu malgranda boato? Du trivialaj postsignoj estis rimarkitaj: Unu el la holdkovriloj estis surdorsa apud la truo. Glaveto, montranta makulojn kun aspekto de sango, ankaŭ troviĝis. Sur unu el la ferdekaj reloj estis tranĉo, eble de hakilo, kaj sur ferdeko apude du-tri makuloj, eble de sango.

Sed certe la ŝipo estis forlasita, kaj do estis la posedaĵo de la trovintoj. Kap-o Moorhouse lasis du virojn por estri la ŝipeton kaj daŭris survoje; la alia sekvis. Li venis al Gibraltaro la 12 Decembro kaj petis savpagon, sed kompreneble la aŭtoritatuloj ne povis kredi tian strangeĝan rakonton. Ĉiuj spertuloj ekzamenis la ŝipon desupre-malsupren kaj trovis nenian difektaĵon. La ŝmirajon sur la glaveto ili konstatis rusto, ne sango. Nenia signo de eksplodo aŭ fajro, nek de io, kio povus kaŭzi tion de eksplodo aŭ fajro.

Dumlonge oni penis klarigi la aferon, kaj fine la ŝipanaro de la "Dei Gratia" ricevis ĉirkaŭ 1750 funtojn, kvaronon de la valoro de la "Mary Celeste".

La ŝipo revenis al Nov-Jorko, sed neniu deziris aŭ aĉeti ĝin aŭ servi en ĝi. Ĝi vendiĝis multfoje kaj en 1885 kuris sur rifon kaj tute perdiĝis. Oni poste trovis, ke tio estis intenco, kaj procesis kontraŭ la ŝipanaro. Malfeliĉo sekvis---la tiama estro mortis antaŭ la fino de la proceso; tri monatojn poste la ĉefmaato ankaŭ; la posedanto mortigis sin; ĉiuj el la komercistoj rilataj al la afero bankrotis, kaj la "Dei Gratia", kiu savis ĝin, mem marrompiĝis kun vivperdo la sekvantan vojaĝon.

Eble kontentiga klarigo neniam troviĝos, ĉar la faktoj estas preskaŭ nekredeblaj, kaj ĉiu klarigo estas dubinda en iu detalo. Neniam ĝi estus ĝenerale akceptata. Tamen ĉiuj konsentas, ke tio, kio forpelis la homojn el la perfekta "Mary Celeste" en la malfortan boateton, por lukti kontraŭ la terura Atlanta Oceano, estis nek gajndeziro, nek ribelo, nek atakantoj, sed ia malracia, senprudenta timego, kontraŭ kio eĉ la plej kuraĝaj foje ne povas defendi sin.

----- F. PITT.

I HEARD A FOREST PRAYING...

Arbaro iam preĝis; solece staris ĝi.
Pro kio do ĝi preĝis? Respondon donos mi.

Arboj provizas ludejojn,
Kaj ŝirmas vojetojn de l'amo.

Arboj vigligas laculojn,
Kaj tute ne vivas je vano.

La homo arbarojn kaj kampojn
Transformis en scenon batalan;

El arbo, el arbo senkulpa,

Li faris la Krucon fatalan.

Arbaro iam preĝis, audiĝis ĉiel-plor',
Dum grizis frumateno, kaj nokto pasis for.

(Lau konata ario)

O THAT I WERE A BOY AGAIN...

Ho, se revenus temp' de l'junecfloro!

Konsistis tiam viv' el sunaj horoj;

Kaj kion sciis koro pri doloro

Forviŝis tion nur mallongaj ploroj. (Mark Lemon)

----- F.R.BANHAM (Trad.)

STRATEGIO POR JUSTECO. Mia frato kaj mi ĉiam malsate revenis hejmen de lernejo. En unu tago kiam ni petis manĝaĵon, la patrino kuŝigis malgrandan kukon antaŭ ni sur la kuirejan tablon. Metante tranĉilon flanke de la kuko, ŝi diris: "Unu el vi partigos ĝin. La alia havos unuan elekton."

Mia frato estis pli rapida ol mi kaj li klopodis tranĉi la kukon laŭ neegalaj porcioj. Subite li haltis, rigardante la patrinon, tiam min. Tiam li tranĉis la kukon en du ekzaktaj duonoj kaj forstaris por ke mi servu min. De tiu tempo kio ajn estas porviigota, torto, kuko, buterpano, oni same dividis. Ĝi instruis al ni daŭran respekton por la rajtoj de aliaj homoj.

(El The Readers' Digest.)

PATRIKO ĉeestis brikfabrikejon por serĉi laboron. Lin renkontis kortestro, kiu demandis: kion deziras Patriko? "Mi deziras laboron", diris Patriko. La kortestro ankaŭ estis Irlandano kaj kompreneble deziris helpi al samlandano, do respondis jene: "Nu, estas ulo ĉi tie, kiu estas for. Se li ne ĉeestos morgaŭ matene, mi diros al li, ke li foriru diablon kaj vi prenu lian laborlokon".

C. THOMPSON (Trad.)

LA PLEJ RAPIDA LINGVO. Sveda filologo post jarara studo konkludas, ke la Franca estas la plej rapide parolebla lingvo en la mondo---kun rapideco de 350 silaboj en ĉiu minuto. Due venas la Japana kun 310, tiam Germana 250, Itala 230, Angla 220.

ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATANOJ. Bonvolu noti. ke ĉiuj proponoj en la Prezidanta Ĉirĝulero estas jesigitaj.

LIBROSERVO. Pro la malfacilaĵoj al individuoj importi librojn, la Asocio antaŭ longe petis donacojn por starigi kapitalon por aĉeti kaj vendi tiujn librojn, kiuj estas necesaj kaj utilaj en la Esp. laboro. La Perantoj de la Libroservo jam ricevis la unuan provizaĵon da libroj. Ĝi estas malgranda, sed pliaj libroj venos tuj kiam niaj monrimedoj permesos. Ĉiun profiton ni uzos por pligrandigi la provizaĵon.

En la malsupra prezlisto X signifas, ke la Peranto en Melbourne ne tenas tiun libron, sed oni povas aĉeti ĝin en la butikoj de S-ro Rawson. Mendante librojn per poŝto, ĉiam aldonu 10% por sendkosto. La Perantoj de la libroservo estas:- S-ro A.E.Chamberlaine, 55 Kenny St., Bassendean (W.Aŭs.), S-ino A.C.Hintze, 7 Dean St., Coburg, N13 (Vic), kaj F-ino E.B.Carrick, 167 Lytton Rd., East Brisbane, SE1 (Qld).

LERNOLIBROJ. X Esp. Home Student (Robbie) 9d.---X Step by Step in Esp. (Butler) 2/3---Practical Course in Esp. (Szilagyi) 3/- ---Eng-Esp Vocabulary 3d. ---Key to Esp. (enhavas Esp.-Eng. Vortareton) 2d. --- Progress Esp. Reader (Potts) 1/-

PROPOGANDILOJ. Esp. and why we need it (Long) 2d. --- Understood Anywhere 3d. --- Esp. in the School 7d Dekduo---World Peace, Dream or Possibility 3d dekduo---Esp. World Aux. Language 3d, Dekduo. Insigno, Stelo, (ronda aŭ broĉa) 1/6.

LEGOLIBROJ Murdo en Orienta Ekspreso (Christie) 2/3, Princino de Marso (Sturmer) 2/3 Princino kaj Betty (Wodehouse) 2/3, Knaboj de Paulo Strato (Molnar) 2/3---Tempomaŝino. Lando de Blinduloj (Wells) 2/3, Colomba (Merimee) 2/3---Alegorioj el la Naturo (Gatty) 5d.---Iamaj Tasmanianoj (Cowling) 9d.

ALVENOS TRE BALDAŭ Karavano (Hauff) 1/-,-Ok Noveloj (Bennett) 10d ---LUNO de Izrael (Haggard), paper, 4/-,---Riĉa kaj sen Mono, (Oppenheim), cloth, 5/-.

KVITANCOJ ĜIS 17.3.43. Bonvole pagis la Kotizon de Individua Membro kun La Rondo, S-roj Chandler, R.Craigie, T.Porter, Rose, N.Brodie, P.Holmes, F.Taylor, P.Schwerin, H.Cohen, E.Johnson, F.Pitt, Lechnere, Chambers, H.Byatt. S-inoj F.Rawson, B.Jones, M.Back, E.Sainsbury, F-inoj Crawford, Telfer, E.Godfrey, Curtis, B. Collins, A.Bailey.

KOTIZOJ. Individuaj Membroj kun LA RONDO, 5/-. La Rondo al ne-membroj, 3/6. Sur poŝtbileto NE enskribu nomon de urbo en kiu oni kontantos ĝin.

G.H.HILLERMAN, (Sekretario)
Box 75, Devonport, Tas.

NU, TRADUKEMULOJ! (Vidu paĝon 247)

- (1) Ĝi aspekte lasas montri siajn emociojn.
- (2) Li kuregis (veturis) laŭ la konkursvojo tiom rapide, kiom li nur povis.
- (3) Li diris, ke li estas trafinta en malfacilon (aŭ, li konfesis sin trafinta....)
- (4) Ĝi forrevas la tempon, konstruante en aero kastelojn (aŭ, revante ĥimerajn projektojn.)
- (5) Lia menso facile adaptiĝas laŭ cirkonstancoj.
- (6) Li infere amis disdoni korpajn punojn.
- (7) Li abrupte rompis la pensfadenon (aŭ, abrupte ŝanĝis la irdirekton).
- (9) Ĝuste en tio li havas super ni avantaĝon.

TRADUKU:

- (1) He drew a red herring across the trail.
- (2) My heart was in my mouth.
- (3) We threw dust into her eyes.
- (4) She pulled the wool over his eyes.
- (5) The Lord Mayor's Ball was in full swing.
- (6) Let us return to our muttons.
- (7) They are the off-scourings of a degenerate age.
- (8) Saving on the swings to spend on the roundabouts.
- (9) His face dropped. (10) We had to grease his palm.

"THE SHOE PINCHES" (Vidu p. 233). Nia fortika amiko en Perth, D-ro C. Caldera informis nin, ke la Italoj uzas identan esprimon: "La scarpa pizzica; la scarpa preme il piede." Li varme laŭdas la Kurson de Tradukado.

PRI "HAVITA DE" p. 235 Joab Eljot komentas: "Nia opinio la formo "parolado havita de" posedas tute naturan devenon, ĉar la ĉeestintoj ja "havis" la paroladon rekte de S-ro Rawson."

NOVA GRUPO en Burwood (Melbourne) ĉe S-ro CRAWFORD, Lithgow Avenue, SUKCESON!

ERAROJ EN LA MARTA NUMERO: Pĝ. 245, 13 de la malsupro: por materialo---248, l. 27, ĉeesti mian---250, 14 de la mals., ekstrema zorgo---251, l. 8, simileco de---l. 17 de la mals., finiga gesto, l. 13 de la mals., kvankam---252, 16, preferata. Pĝ. 249, 5 de la mals., speĉoj anstataŭ tipoj. Pĝ. 250, 5, sur sableca. Eraroj de skribmaŝino en tiu ĉi numero estas elmontrataj en la Maja numero de LA RONDO.

SINJORO kiu estis fraŭlo, demandis al si ĉu li edziĝu? Li decidis unue eltrovi kiom da siaj edzigitaj amikoj estas estro de sia propra domo. Do, li aĉetis du aŭtomobilojn, unu ruĝan kaj unu bluan, kaj ankaŭ korbegon da kokidoj. Tiam li vizitis ĉiun el siaj amikoj, proponante al li aŭtomobilon se li povas pruvi ke li estas tia estro. Ĉe la fino de la tago, li multe ĉagreniĝis, ĉar li nun havas ankoraŭ la du aŭtomobilojn, sed nur unu kokidon. Tamen li havis ankoraŭ unu amikon, homon de forta karaktero, pri kiu li havis kaŭzon kredi, ke li ja estas estro. Do li vizitis lin kaj tre plene klarigis al li la aferon.

"Do se vi ja estas estro de via domo---" li fine diris.

"Estro de mia domo?" demandis la alia kolere, "Plej certe mi estas tio, kaj mi volus vidi homon kiu kuraĝus diri male!"

"Do," daŭrigis la vizitanto, "nenia kokido por vi! Aŭ la ruĝa aŭto aŭ la blua---kiun vi havos?"

"Atendu momenton," respondis la 'estro de sia domo', "mi iros demandi al mia edzino kiun ŝi preferus."

"Ne!" dolore decidis la fraŭlo, kiu nun havis neniun amikon restantan por viziti, "La kokido por vi!"

Tiu sinjoro ankoraŭ estas fraŭlo.

KASO DE LA RONDO.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£	s	d	<u>ELSPEZOJ</u>	£	s	d
Konta transpreno.....	1-	7-	0	Poŝto.....	1-	0-	6
F-inoj Smith, Curtis, Dalton,				papero.....		16-	0
Collins.....	14-	0		ŝablonaĵoj.....		11-	0
S-inoj E.Sainsbury, Back,				inko.....		12-	6
B.Jones.....	10-	6		luo.....		5-	0
S-ro H.Byatt.....	8-	6		bindpingloj.....		1-	6
S-roj W.Brodie, E.Chandler,				okazaj elspezoj..		2-	6
Chambers, R.Lees.....	14-	0			£3	-9-	0
S-ro Ballard.....	1-	6		En la kaso 6/6			
			<u>£3-15-6</u>				<u>£3-15-6</u>

W.ADDIS (kasistino) 25 Greville Ave, Flinders Park, Adelaide.
S.Aus.

EN SIA LIBRO, "Cab, Sir?" Herbert Hodge diras, ke la taksiveturigistoj de Londono havas inter si diversajn grupojn, kaj ke unu el tiuj estas grupo Esperanta.

Arĥitekto, ĥirurgo, kaj diplomato babilas. "Mia profesio estas la plej antikva," diris la ĥirurgo, "ĉar Dio, kreante Evan, transiris ripon el Adam." La arĥitekto diris, "Tute ne. Antaŭ ol Adam ekestigis, Dio konstruis la universon el ĥaoso." "amen," diris la diplomato, "se estas permesate al mi ion demandi: de kie venis la ĥaoso?"

POR KOMENCANTOJ. (3)

Most sentences contain (1) a subject and (2) a verb which says what the subject is and does. Thus, in LA SUNO BRILAS, LI STARAS TIE, "la suno" is the subject of the verb brilas and "li" is the subject of the verb staras. The answer to What? Who? asked before a verb is the subject. What shines? La suno; Who stands? Li. The subject is that which does the action, the object is that to which the action is done.

Esp-o shows the object of a verb by adding N, called the accusative ending. So, MI, VI, LI, etc. become MIN, VIN, LIN, etc. You can always pick out the accusative in a sentence because it ends with N, so it is easy to see that the following all mean the same thing, i.e., I love you. MI AMAS VIN, MI VIN AMAS, AMAS MI VIN, VIN AMAS MI. This kind of object ending in N is called direct, but there is also an indirect object which occurs after a preposition: - LI DONAS LIBRON AL MI---Here, LIBRON is the direct object and Mi the indirect, after AL. After a preposition we always have the nominative form. AL means "to".

Some verbs don't take the accusative, such verbs as PROMENAS, strolls; FLUAS, flows; KURAS, runs; FLUGAS, flies; OKAZAS, happens; RAMPAS, crawls; VAGAS, wanders; VOJAGAS, travels; SALTAS, jumps; NAGAS, swims. These are called Intransitive Verbs.

The following take an accusative, and are called Transitive Verbs: - POLURAS, polishes; ATAKAS, attacks; AKIRAS, acquires; VIDAS, sees; DONAS, gives; ACETAS, buys; VENDAS, sells; PORTAS, carries, wears; MANGAS, eats; TRINKAS, drinks; TENAS, holds; TROVAS, finds.

Besides showing the Indirect Accusatives, AL also means "to" or "towards", LA BEBO (baby) RAMPAS DE LA KUSENO (cushion) SUR LA PLANKO (floor) AL LA SRANKO (cupboard); SERPENTO (serpent) NE HAVAS KRURJOJN (legs); LA SIMIO (monkey) SALTAS DE LA ARBO (tree) AL LA TEGMENTO (roof) DE LA SEDO (shed); ILI FRAPAS (strike) LA FERON (iron) DUM(while) GI ESTAS VARMA; MI PORTAS(carry) LEDAN(leather) SAKETON (small bag) KAJ MI PORTAS (wear) SILKAJN GANTOJN (silk gloves); LA RATO ESTAS TRE (very) KURAGA (courageous) BESTETO (little animal) KAJ SEN TIMO (without fear) ATAKAS MALAMIKON; LA FRUA (early) BIRDO KAPTAS (catches) LA VERMON (worm); BIRDOJ DEMETAS OVOJN (lay eggs); MUSO KAJ MUSO(fly, mouse) HAVAS MALSIMILAJN SIGNIFOJN (different meanings), MUSO ESTAS INSEKTO (insect) SED MUSO ESTAS MALGRANDA BESTO(animal), GI VIVAS (lives) EN DOMOJ KAJ NENIAM(never) APERAS (appears) DUM (during) LA TAGO (day) CAR (because) GI ESTAS TRO (too) MALKURAGA.

Copy out these sentences without the English in the brackets, read them aloud and learn them.

In our last lesson we gave you the numbers from 11 to 19. No doubt you noticed that the Esp-o for these was expressed by two words, the DEK coming first, DEK TRI, DEK SEP, etc., but the numbers 20, 30, 40, etc., are only one word, the DEK coming last. DUDEK AVOJ, 20 grandfathers, TRIDEK PATROJ, 30 fathers, KVARDEK

FILOJ, 40 sons; KVINDEK NEPOJ, 50 grandsons; SESDEK FRATOJ, 60 brothers; SEPDEK ONKLOJ, 70 uncles; OKDEK NEVOJ, 80 nephews; NAŬDEK KUZOJ, 90 cousins; CENT PARENCOJ, 100 relations, MIL FAM-ILIOJ, 1000 families. Learn the above and make and translate the feminine forms, except the last.

Besides NE, there are two words which must precede the words they modify, i.e., NUR and EĈ.

NUR ŜI PAROLAS, NE MI, only she is talking, not I; ŜI NUR PAROLAS, ŜI NE KANTAS, she only talks, she does not sing; ŜI PAROLAS NUR AL LI, NE AL VI AU MI, she talks only to him, not to you or me.

EĈ SE MI KANTAS, even if I sing; SE EĈ MI KANTAS, if even I sing, SE MI EĈ KANTAS, VI GRUMBLAS, if I even sing, you grumble. EĈ NE MI, not even I.

DO means then or so, and is a weak form of therefore. DO VI ESTAS ANGLINO? So you are an Englishwoman? KIE LI ESTAS, DO? Where is he then? KIO DO ESTAS TIO? What then is that?

NU means Well! Now! Well now! NU, DO, KIU VI ESTAS? Well, now, who are you? NU, KIE LI ESTAS? Well, where is he? NU, NU! Well, well! (Note: DO and NU are argumentative, exclamatory; they have no relation to then and now of time).

JEN! is an exclamation meaning Look! Here! There! HA! JEN VI ESTAS! Ah! Here you are! JEN LA REĜO! There is the king! Jen! ŜI VENAS! Look! She is coming! JENE means "as follows".

Learn these words:- KVANKAM, although, TAMEN, nevertheless. KVANKAM LI ESTAS RIĈA, TAMEN LI NE ESTAS FELIĈA, although he is rich, he is not happy. ALIA, other, another, UNU ĈAMBRO ESTAS ORDA, SED LA ALIA NE, one room is tidy, but the other not. ĜUSTA, correct, right, LA ĜUSTA ADRESO, LOKO, METODO, NOMO, the correct address, place method, name. PRAVA, morally right, or correct in opinion or conduct. KOMPREENEBLE, VI ESTAS PRAVA, SED EBLE MI NE ESTAS TUTE MALPRAVA, of course you are right, but perhaps I am not altogether wrong. SOLA, alone, solitary, LA SOLA MANIERO, the only way. UNU SOLA FENESTRO, one solitary window. FREMDA, foreign, strange, FREMDA LANDO, a foreign land.


Translate the following, for which you have already had the words:-

La struto estas birdo kiu ne amas arbojn. Ĝi vivas en varmegaj dezertoj. Ĝi ne flugas, sed estas ĉiam sur la grundo. Ĝi havas longajn krurojn, do ĝiaj paŝoj estas tre longaj, kaj ĝi kuras kiel tre rapida ĉevalo. La plumoj de ĝia vosto kaj flugiloj estas tre grandaj, blankaj kaj tre valoraj. Ĝi havas neston en la varma mola sablo. Ovoj estas en la nesto kaj ankaŭ ekster la nesto. La ovoj ekster la nesto estas por la idoj, kiuj manĝas ilin. (Note the suffix -ID used as a noun.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

17. 5. 43

LA RONDO



40 32

MAY. 1943

No. 8. VOL. 3.

ELDONITA de F.R. BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

L A R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5, Vic.

Enhave aparigas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

RAKONTO PRI SUSANA.
El la Apokrifo.

Iam loĝis viro en Babel, kies nomo estis Joakim. Li prenis edzinon, Susana, filinon de Kelcias, belan virinon, kiu timis antaŭ la Eternulo. Ankaŭ ŝiaj gepatroj estis piaj, kaj instruis sian filinon laŭ la leĝo de Moseo. Joakim estis granda riĉa homo, kaj havis belan ĝardenon tuj apud sia domo. Al li vizitadis la Judoj, ĉar li estis plej honorata el ĉiuj. En tiu sama jaro estis difinitaj du plejaĝuloj por esti juĝistoj. Multe restadis tiuj en la domo de Joakim, kaj homoj procesantaj venadis al ili.

Kiam ĉe tagmezo la homoj foriris, Susana eniris la ĝardenon de sia edzo por promeni. La du plejaĝuloj ĉiutage rigardis ŝin dum ŝi tie iradis, kaj ilia malbona deziro vekigis kontraŭ ŝi. Ili malvirtigis sian menson kaj forturnis siajn okulojn, por ke ili nek rigardu al la ĉielo nek atentu justan juĝadon. Kvankam ili ambaŭ vundiĝis per amo al ŝi, tamen nek unu nek la alia kuracis montri sian doloron, ĉar ili hontis pridiri sian deziron, laŭ kio ili avidis havi aferon kun ŝi. Sed diligente ili ankoraŭ rigardis ŝin tagon post tago, kaj fine unu diris al la alia: "Ni iru nun hejmen, ĉar estas jam manĝohoro." Elirinte, ili disigis unu de la alia, sed, returninte sin, venis denove al la komenco loko. Kiam ili reciproke klarigis tiun revenon, ili konfesis sian deziron. Tiam ili difinis tempon en kiu ili povus ŝin trovi sola.

Dum ili atendis ĝustan tempon, okazis ke ŝi eniris kiel kutime, kun du servistinoj, kaj ŝi deziris sin lavi, ĉar estis varme. La du plejaĝuloj sin kaŝis kaj observis ŝin. Tiam ŝi diris al siaj servistinoj: "Portu al mi oleon kaj lavaĵaron, kaj fermu la pordojn de la ĝardeno, por ke mi lavu min." Kaj ili foriris per privata elirejo, ferminte la pordojn, por irpreni la objektojn pri kiuj ŝi ordonis. Sed ili ne vidis plejaĝulojn, ĉar tiuj estis kaŝigintaj.

Kiam la servistinoj estis for, la du plejaĝuloj elpaŝis al ŝi, dirante: "Jen la pordoj estas fermitaj, neniuj homoj povas nin vidi, kaj ni enamiĝis en vin. Tial cedu al ni. Se vi ne konsentos, ni atestos kontraŭ vi, ke juna viro pekis kun vi, pro kio vi antaŭe forsendis viajn servistinojn."

Tiam Susana, sopirĝemante, diris: "Mi estas premata je ĉiu flanko, ĉar se mi faros tion ĉi, mi mortos; kaj se mi ne faros, mi ne povas eliri el viaj manoj. Estas pli bone fali en viajn manojn, ne ĝin farinte, ol peki antaŭ la okuloj de la Eternulo." Dirinto tion, Susana laŭte vokis, kaj la plejaĝuloj insultis ŝin. Tiam kuris unu el ili kaj malfermis ĝardenpordon; la servistinoj, aŭdinte la vokon, enkuris por privata pordeto por vidi, kio okazas. Sed kiam la plejaĝuloj asertis pri la afero, la servistinoj tre hontis, ĉar neniam antaŭe estis tia famo pri Susana.

La sekvantan tagon, kiam la homoj kunvenis ĉe ŝia edzo Joakim, ankaŭ la du plejaĝuloj venis kun malica mensogo kontraŭ Susana, por ke ŝi ricevu morton. Ili diris antaŭ la homoj: "Sendu por venigi Susanan, filinon de Kelcias, la edzinon de Joakim." Ŝi venis kun siaj gepatroj, infanoj kaj parencoj. Ŝi estis tre delikata virino kaj alte okulplaĉa pro beleco. Tiuj malbonaj viroj do ordonis ŝin malkovri la vizaĝon, por ke ili sekrete frandu ŝian belecon. Je tio ploris ŝiaj tutaj amikoj kaj ĉiuj tieanoj. Tiam la du plejaĝuloj ekstaris meze de la homoj kaj metis la manojn sur ŝian kapon. Ŝi, plorante, ekrigardis supren al la ĉielo, ĉar ŝia koro fidis al la Eternulo. Kaj la du plejaĝuloj diris: "Dum ni solaj promenis en la ĝardeno, tiu virino envenis kun du servistinoj, fermis la ĝardenpordojn kaj forsendis la servistinojn. Tiam juna viro, kiu jam antaŭe sin kaŝis tie, venis al ŝi kaj kun ŝi pekis. Je tio ni, kiuj staris en angulo de la ĝardeno, vidante tiun malbonon, kuris al ili, sed la viron ni ne povis kapti, ĉar li estis pli forta ol ni. Li malfermis pordon kaj forsaltis. Preninte la virinon, ni demandis al ŝi, kiu estas la juna viro, sed ŝi ne volis respondi. Tion ni atestas."

La kunvenintaro kredis ilin, ĉar ili estis plejaĝuloj, juĝistoj de la popolo. Tial ĝi kondamnis ŝin je morto. Tiam Susana kriis per laŭta voĉo: "O eterne ekzistanta Dio, kiu scias la sekretojn, kaj scias ĉiajn aferojn antaŭ ol ili okazas. Vi scias, ke tiuj homoj false atestis kontraŭ mi, kaj mi devas morti, malgraŭ ke mi ne faris tian, kian malice elpensis tiuj homoj kontraŭ mi." Kaj la Eternulo aŭdis ŝian vokon. Tial, kiam ŝi estis kondukata al la mortigloko, la Eternulo vekis la sanktan spiriton de junulo nomata Daniel, kiu kriis laŭtvoĉe: "Mi estas senkulpa pri la sango de tiu virino." Je tio ĉiuj homoj turnis sin al li kaj demandis: "Kion signifas la vortoj, kiujn vi parolis?"

Li, starante meze de ili, respondis: "Ĉu vi estas tiel malsaga, ho filoj de Izrael, ke vi kondamnas filinon de Izrael sen esploro aŭ scio pri la vero? Reiru denove al la juĝejo, ĉar ili false atestis kontraŭ ŝi." Pro lia diro ĉiuj homoj reiris rapide, kaj la plejaĝularo diris al li: "Venu, sidiĝu inter ni kaj klarigu al ni la aferon, ĉar Dio donis al vi la honoron de plejaĝulo." Tiam Daniel diris: "Konduku la du atestintojn unu for de la alia, kaj mi pridemandos ilin." Kiam ili estis tiel dislokitaj, li diris al unu: "O vi, kiu estas jam maljuniginta en pekado, sciu ke la pекoj de la antaŭa tempo nun venis en la lumon, ĉar vi diris

falsan juĝon kaj kondamnis la senkulpan, kaj lasis libera la kulpan. Sed la Eternulo ordonis: "La senkulpan kaj honestan vi ne mortigu! Diru al mi, sub kia arbo vidis vi la du homojn en kunuleco?" Li respondis: "Sub lentiska arbo," kaj Daniel diris: "Bone; vi mensogis kontraŭ via propra kapo, ĉar jam nun la anĝelo de Dio ricevis ordonon de Dio vin tranĉi en du pecojn."

Daniel metis lin flanken kaj ordonis alkonduki la alian. Al tiu li diris: "O vi semo de Kanaan, kaj ne de Juda, beleco vin trompis kaj volupto vian koron malvirtigis. Diru, sub kia arbo vi surprizis la du homojn en kunuleco?" kaj li respondis: "Sub kverko ileksa." Tiam diris Daniel al li: "Nu, vi mensogis kontraŭ via propra kapo, ĉar la anĝelo de Dio atendas, glav' en mano, por tranĉi vin en du pecojn, por ke li vin pereigu." Je tio la kunvenintaro kriis per laŭta voĉo kaj laŭdis Dion, kiu savas ĉiun al li fidantan.

Kaj ili elpaŝis kontraŭ la du plejaĝuloj, ĉar tiujn Daniel kondamnis per iliaj propraj vortoj. Laŭ la leĝo de Moseo faris ili al ili en sama maniero kiel ili intencis fari al sia najbarino: ili mortigis ilin.

Per tio senkulpa sango ne estis verŝita en tiu tago. Tial Kelcias kaj lia edzino laŭdis Dion pro sia filino Susana, kune kun Joakim, ŝia edzo, kaj ĉiuj parencoj, ĉar en ŝi troviĝis neniam malhonesteco.

Jam de tiu tago Daniel estis tre estimata en la okuloj de la popolo.

- (1) plejaĝulo: elder, magistrate, judge in Biblical times.
- (2) lentiska arbo: mastic tree.
- (3) kverko ileksa: holm tree.

-----F.R.BANHAM (trad.)

HISTORIOJ DE DU TEROKOTAJ TEGOLOJ.

S-ro E.S.Hanks legis tiun ĉi verkaĵon ĉe la Melburna Esp. Klubo.

La du fragmentoj de tegoloj sur la tablo havas tre similajn aspektojn. Ĉiu peco, komence, estis argilo en iu loko kie ekzistas granda amaso facile havebla el la tero. Ĉiu de ili estis farita en la nunan formon per laboro de homoj. Ĉiu estis ŝanĝita per la hejto de fajro en la briksimilan, preskaŭ ne detruoblan materialon kiun oni nomas "terokoto-tegolo" ---angle: terra cotta tile. Tamen ili estas tre malsimilaj en origino kaj historio. Ni rekonstruu la historiojn de la du pecoj, kaj ni nomu tiun ĉi fragmenton "numero unu", kaj tiun iom pli grandan pecon "numero du".

"Numero unu" peco estas mekanika produktaĵo. Ĝi venis el moderna tegolo-fabriko. Ĝi estis fosita el granda argilminejo ĉe Brunswick, Viktorio; kaj estis portita al la fabriko en vet-

urileto rulanta sur malgrandaj ŝeloj. Ĝi estis muelita en granda muelilo, kribrita per granda fera kribrilo, kaj post mekanika preparado, ĝis taŭga plastikeco, ĝi estis metita en feran formilon kaj presita per granda presilo al la fina formo de tegolo. Kunekun mil aliaj ĝi estis bruligita en granda forno kaj iĝis la nuna malmola materialo, terokoto. De tie ĝi iris per ŝarĝveturilo al konstruata domo. Tegolisto metis ĝin sur la tegmenton, kaj tie ĝi restis dum tridek jaroj. Iu akcidente rompĝis ĝin, forprenis de la tegmento, kaj forĵetis ĝin. Ĝia fabrikado, do, estas historio de grandaj maŝinoj kaj amasa produktado. Ĝia ekzistado kiel tegolo, tiu de du generacioj de homoj, kaj ankaŭ (ni rimarku) tiu de du mondmilitoj.

"Nombro du" tute ne estas mekanika produkajo. Ĝi estis permane farita. Jen do, estas la unua granda diferenco inter la du fragmentoj, ĉar nombro du estis farita sen helpo de la grandaj maŝinoj kiujn mi menciis dum mi priskribis la fabrikadon de "No. 1." La dua diferenco: "No. 2" ne estas Aŭstralia objekto---ĝi venis de la alia flanko de la mondo. Pli detale, ĝi venis de St. Albans, kiu situas dudek mejlojn nordokcidente de Londono. Plue, ĝi venis de terpeco kiu iam estis la posedaĵo de Sir Francis Bacon, unu de la plej kleraj traktatistoj kiuj iam vivis, kaj la "patro" de la moderna scienca metodo. Al mi mem, ĉi tiu fragmento de tegolo havas pli da intereso pro la fakto ke ĝi venis de la iama posedaĵo de Sir Francis Bacon, kaj ke ĝi ekzistis tie dum lia vivo. La ruinaĵo de la domo de Bacon staras sur malalta monteto proksimume unu mejlon for de la urbo St. Albans. Apude staras la malnova preĝejo kie Bacon estas enterigita.

Sed ĉi tiu tegolo ne venis de la ruinaĵo de la domo de Bacon, nek de la malnova preĝejo. Fakte, ĝi ne estas ekzemplero de manlaboro en la tempo de Reĝino Elizabeth; ĉar, dum la vivo de Bacon ĝi kuŝis ĉirkaŭe du futojn sub la tero en bela kampo kiu estis videbla el la fenestroj de lia hejmo. Povas esti ke la granda filozofo ofte marŝis super ĝi dum li promenis. En tiu loko ĝi estis destinita resti dum pli ol tricentjaroj post la morto de Bacon. Ĉi tiu tegolo do, malsame al la alia, ne estas moderna, sed antikva, ĉar ĝi ekzistis dum la vivo de Bacon---antaŭ preskaŭ kvarcent jaroj. Ke ĝi povis esti tie dum lia vivo estas sufiĉe mirinde, sed---Gesinjoroj! Meditu pri ĉi tiu fakto: tiu tegolo ekzistis unu-mil-kaj-kvarcent jarojn antaŭ ol Bacon estis naskita. Ĝi estas fragmento de romana tegolo farita dum la Romanoj okupis Britujon, eble dum la dua jarcento. Ĝi estis elfosita en mil-naŭcent-tridek-sep, de sub la kamparo kie iam staris la romana urbo Verulamium. Tie oni elfosis restaĵon de granda romana teatro, kaj ankaŭ mozaikajn pavimojn de domoj, kompareblajn kun tiu de "La Block" Melbourne.

Ĉu mia tegolo venis de tiu teatro, aŭ, ĉu ĝi helpis tegmenti la domon de iu fama militisto aŭ tiun de iu fiera nobelo en Verulamium? Kia homo modelis ĝin? Ĉu li estis plebo el Romo mem, aŭ ĉu li estis militkaptito venkita en iu malproksima batalkampoj,

kaj devigita elspezi sian vivon en fremda lando kiel sklavo por la romanaj estroj? Kiaj estus liaj pensoj se li povus diveni ke tiu argilo kiu iĝis tegolo sub liaj lertaj manoj estis destinita kuŝi sub la tero pli ol mil jarojn, kaj poste esti portata kiel kuriozaĵo al lando pri kiu la Romanoj de lia generacio sciis nenion? Kaj kiu detruis la konstruaĵon---ĉu Sakso aŭ Normando?

Estas fakto ke la Normandoj, dum la regado de Vilhelmo la Venkisto kaj poste, forportis la tiam ekzistantajn romanajn ruinaĵojn kaj uzis la materialon en la konstruado de siaj kasteloj kaj preĝejoj. Preskaŭ ĉio krom la subteraj partoj estis tiel uzita dum la konstruado de la apuda katedralo de St. Albans.

Sed kio okazis al la urbo Verulamium dum tiuj sescent jaroj inter la fino de la romana okupado kaj la komenco de la Normanda okupado? Ĉu la Saksoj detruis ĝin, aŭ ĉu la urbo estis neglektita ĝis ĝi kadukiĝis?

Kaj tiu rompita tegolo---ĉu ĝi estis rompita de iu Romano, aŭ ĉu ĝi restis tuta ĝis iu Sakso rompis ĝin?

La tuta historio de mia romana tegolo neniam estos verkita.

Jen kuŝas kune la du fragmentoj, tre similaj laŭ aspekto, unu moderna, la alia antikva, la moderna---maŝine farita---ĝia historio tiu de du generacioj de homoj, kaj, kiel ni rimarkis, de du mondmilitoj; la antikva---mane farita---ĝia historio---kiom da generacioj, kaj kiom da militoj?

terra cotta (Itala) signifas "Kuirita tero." La Redakcio.

PLI PRI STRZELECKI (Vidu paĝon 218)

Prof-o Sir Ernest Scott en la "Herald" (Melb.):— La mallonga biografio de Strzelecki en "The Australian Encyclopedia" (valora verko, en kiu malofte troviĝas eraro), ne estas justa al Strzelecki, ĉar ĝi asertas lin "la originalo de Count Smorltork, kiu per sia ĉeesto favoris la matenmanĝeston de S-ino Leo Hunter" en "Pickwick Papers". Tio estas nevera. Foje en siaj noveloj Dickens bildigas sub masknomoj siajn konceptojn de vivantaj homoj, precipe en "Pickwick Papers". Count Smorltork (ĉap.15) estas "la abunde lipharhava persono en fremda uniformo", kiu "post dusemajna restado en la lando kolektas materialon por sia granda verko pri Anglujo". Laŭ "Dickens Dictionary" de A. J. Phillips la vera originalo de Smorltork estis Prince Pucklen-Muskaŭ, pri kiu cetere ekzistas moderna biografio. Li iom sensacie kondukis en la Londona mondumo en la tempo kiam Dickens laboris super la aventuroj de la Pickwick Club. Eĉ ne unu el la satiraj karakterizaĵoj taŭge aplikiĝas al Paul de Strzelecki: male ol la gasto de S-ino Hunter, la Pola esploristo tute ne amis babili pri negravaĵoj ("small-talk"), ne portis uniformon, kaj parolis la Anglan flue kaj korekte.

Tradukis F.R.B.

TEURER FREUND, DU BIST VERLIEBT...

Amas vi, amiko kara,
Nova do por vi doloro;
Mallumiĝas en la kapo,
Pliheligiĝas en la koro.

Amas vi, amiko kara,
Kaj konfesi vi ne volas --
Sed mi vidas tra la veŝto
Kiel koro fajre bolas.

----- Trad. F.R.B

LEGANTINO SKRIBAS: La tradukoj de "Du Bist Wie Eine Blume" tre plaĉis al mi. Kompreneble vi scias pri la E-a traduko en "La Interrompita Kanto", sed eble vi ne vidis la belan Anglan, adaptitan al muziko de Liszt jene:

Thou art like a tender flow'ret
So pure and fair and sweet.
I look on thee and sadly
My boding pulses beat.
My hands I'd fain rest in blessing
Upon thy sunny hair,
Praying that the Lord might keep thee
As pure and sweet and fair.

La artikolo "Bariloj de Babelo" pensigis min pri okazaĵo antaŭ jaroj dum promenekskurso. La konversacio turniĝis al lingvistado, kaj juna Universitano diris kelke da frazoj Itale. Mi senparole aŭskultis, poste ekdiris longan frazon en Esp-o. Tuj ĉiuj okuloj direktis sin al mi, kaj la studento, kiu antaŭe sentis sin tre memfida, parolis al mi embarasate, kun alta respekto: "Kompreneble, ne tre funde mi studis la Italian..." Jam venis tempo por efika propagando. Ridete mi klarigis, ke ne Itale sed Esp-o mi demonstraciis, kaj prezentis faktojn pri nia lingvo.

REVIVIĜO POST CENT MILOJ DA JAROJ.

El Magazine Digest, Junio 1939 (kondensita el
Ecos Mundiales, Mexico City---Febr. 1939)

La glaciigintaj regionoj de la Arkto eble baldaŭ fariĝos la scenejo de kelkaj el la plej mirigaj eksperimentoj iam faritaj. Ne estas malverŝajne, ke vivo estos redonata al bestoj, kiuj estis "mortaj" dum miloj da jaroj.

Ranoj kaj bufoj estis trovitaj en stato de interrompita vivo post jarcenta enteriĝo sub argil-tavolo. Mallonge post la elfos-

iĝo ili komplete reviviĝis kaj eksaltis ĉirkaŭen, kvazaŭ nenio estis okazinta.

Multaj el vi eble scias ion pri la etaj bestoj nomitaj "rotifera", kiuj vivas en senmova freŝa akvo. Sekigite ĝis kuntiriĝo al kvarono de sia normala amplekso ili kovriĝas per sulketoj, kaj nenia traktado revivigos ilin. Tamen, kiam ili estas ree metitaj en akvon, ili sammomente reviviĝas.

La Arkto povas esti rigardata kiel giganta glaciujo. Ovoj tie demetitaj antaŭ centmiloj da jaroj estas troveblaj en diversaj profundoj. Granda nombro de ĉi tiuj ovoj kaj moluskoj jam estis elfositaj de scienculoj kaj redonitaj al la vivo.

Ni scias nenion pri la enhavo de kelkaj el ĉi tiuj ovoj, kiuj estis en malvarmiga provizejo dum tiom da jaroj. Multaj el ili estis produktitaj de bestoj, kiuj estingiĝis antaŭ jarcentoj. Scienculoj opinias, ke elkovataj ili povus transformiĝi en strangajn bestojn aŭ eble terurajn mortigajn insektojn.

Mambestoj kaj reptilioj en tiuj prahistoriaj epokoj estis ege pli grandaj ol iu kreaĵo vivanta nuntempe; estas verŝajne, ke la insektoj estis amplekso proporcia. Ni fakte scias, ke kelkaj el ili estis grandegaj. Oni trovis fosiliojn de libeloj, kiuj havis larĝecon de 23 coloj de unu flugil-pinto al alia. Niaj libeloj estas tre utilaj al ni, ĉar ili manĝegas moskitojn kaj aliajn parazitajn insektojn. Ni supozu, ke estas eble, elkovi la ovojn de iliaj prauloj. Post nelonge la milionoj da moskitoj, kiuj infektas certajn distriktojn, estus malaperintaj. Gigantaj araneoj formortigus la insektaron malutilan al nia agrikulturo.

Per realigo de tio la homaro povus multe gajni. Sed ekzistas ankaŭ alia aspekto de ĉi tiu afero---vere katastrofa. Kelkaj el tiuj ovoj eble transformiĝas en insektojn, kiuj kapablas disvastigi morton kaj ruinon. Imagu, ke unu el la tiel nomataj grandaj nacioj sukcesus, sekrete bredi ĉi tiujn kreaĵojn, ĝis kiam ĝi posedus milionojn da ili. Supozu plue, ke dum milito la aeroplanoj de ĉi tiuj tro-civilizitaj landoj faligus la insektojn kaj la ĝermojn, kiujn ili portas, en la urbegojn kaj armeojn de iliaj malamikoj. La eblaj sekvoj estas sufiĉe terurigaj, por ĝisfunde tremigi eĉ la plej kuraĝan soldaton.

Estas vere, ke tia projekto inkluzivus gravajn riskojn por la lando, kiu efektivigus ĝin. La rezultantaj epidemioj disvastigus rapidege kaj invadus la landon, kiu malkatenus ilin. Sed nacioj en milito malofte havas vastan antaŭrigardon pri aferoj. Ilia atento estas fiksita sur la senprokrasta detruo de la kontraŭulo.

Scienco montriĝis kapabla de senlima bono kaj malbono. Ni esperu, ke la malkovro de la arktaĵaj misteroj kontribuu prefere al la bonstato de la homaro kaj ne al ties detruo.

-----K.SCHWERIN (trad.)

EN LA UNUA TAGO de Aprilo ni ricevas atentigojn pri tio, kio ni estas en la ceteraj tricent sesdek kvar. MARK TWAIN.

FANTAZIO.

Hugo kaj Etelo paŝas el sia aŭto ĉe la moderna kaj luksa ekipita aerodromo je la 5a p.t.m. Estas bela sunbrila tago kaj la vigla, belaspekta paro havas gajan, atendecon sintenon.

Etelo rigardas supren kaj diras "Hugo, ĉu ni ĝustatempe? Jen estas la Ĉina Ekspreso." Plilaŭtiganta muĝo aŭdiĝas kaj granda aviadilo ŝvebas al la aer-kampo. La feliĉa paro marŝas al la homamaso kiu eliras de la aeroplano. "Jen mi vidas ilin," diris Etelo. Post iom da tempo ili venas renkonte al sesopa grupo kiu konsistas el du Japanoj, du Ĉinoj kaj du kiuj havas iom Rusan kaj Mongolan aspekton. Hugo krias, "Bonvenu, Gesinjoroj, Ni tre ĝojas vin renkonti, preskaŭ ne necesas reciproke prezenti, mi bone rekonas vin per viaj fotoj, renkontu mian edzinon S-inon McGregor Ges-oj Imoto kompreneble? Ges-roj Chantzoff kaj Ges-roj Ah Ling, ĉu ne? Ni esperas ke vi havis bonan vojaĝon." Kvietvoĉe S-ino Imoto kun ĉarma rideto respondas post la manpremoj, "Ni havis tre ĝuan tempon ĉu ne, amikoj?" Ŝi turnis al siaj kunuloj, "Precipe kiam ni preterpasis vian mirindan Barrieran Rifon, kia mirinda marbordo!" "Ni ĉiuj renkontiĝis tre frue hodiaŭ matene ĉe Ŝanghaj en bona tempo por la Aŭstralia Ekspreso. Estis tre malvarme kiam Ges-roj Chantzoff kaj ni lasis niajn hejmojn ĉar neĝo kaj glacio kovris ĉion en Vladivostoko kaj Nagasaki." "Do, kompreneble vi nun ĝuos nian Melburnan someran veteron," diras Etelo, "sed ni devas rapidigi, ni aranĝis lokigi vin ĉe nia kluba gastejo por ke vi havu centran lokon en la ĉefurbo, sed mi ĝojos se vi venos manĝi ĉe nia hejmo en Kallista antaŭ ol reveni al la klubo, ni esperas ke niaj aranĝoj taŭgos dum via libertempo."

Post mallonga atendo por aranĝi pri la alsendo de la pakajoj, ili eniras la aŭton kiu estas granda kaj luksa. "Kaj kiel progresas la granda land-renoviga plano ĉe via hejmo, S-ino Ah Ling?" diras S-ino McGregor. "Bonege! Kia mirindaĵo estas al niaj gepatroj, kiel vi scias nia lando estis preskaŭ senarba sed nun ĉie estas novaj arbaroj kaj ĉiu ŝoseo estas foli-abunda aleo!" Subite ŝi ĉesus momente dum ŝi rigardas la pezaĝon ornamitan per multaj florantaj gum-arboj tra kiu vagas bela rivero. "Kiel mi admiras viajn gum-arbojn. Mi deziras aranĝi importi milojn da viaj junaj gum-arboj por nia loka lerneja arbareto. Estas mirinde kiel dum la lasta 30 jaroj la arb-plantado aliĝis kaj mildigis nian veteron." "Ni havis la saman sperton," diras S-ino McGregor, dum ŝi lerte veturigis la aŭton laŭ la bela rivero, "vi preskaŭ ne povus kredi ke tiu bele ĉirkaŭita aerodromo iam estis la tre malpura kaj malbonaspekta Dudley Flats kaj ĉi tiu rivero nomiĝis la "Malpura Yarra". "Ni multe plantis en la senarbajn partojn de Aŭstralio kaj kiam antaŭ dek kvin jaroj oni inundis parton de Mez-Aŭstralio, ni feliĉe perdis multe de la malplezuraj varmegaj ventoj." "Jen! Rigardu niajn kolorplenajn Rosella papagojn," ŝi finas dum ŝi montras aron de la voĉplenaj birdoj.

La tempo pasas rapide kaj ili baldaŭ grimpas la montetojn de

la Dandenongs. Sur la supro ili haltas por rigardi la panoramon de la ĉefurbo bele mozaikita per arboj kaj arbaretoj dum en la fono la akvoj de Port Philip brilas en la suno.

Post mallonga vojaĝo la aŭto sin turnas al arbĉirkaŭita terpeco kiu havas, iom fore en la mezo, domon. La aŭto venas al la loĝejo, kiu, al ni, estus tute neordinara sed eble ne al niaj ali-landaj amikoj. Ĝi estas preskaŭ tute konstruita per bele nuancita vitro kaj la formo ankaŭ malsimilas la niajn. Nenie estas akra angulo kaj, kvankam ĝenerale ovoforma, ĉiu muro ondiĝas kiel flor-petaloj kaj etendiĝas ĝis la supro senrompe kaj kurbe kaj ne estas marko kin finiĝas la muro kaj komenciĝas la tegmento.

-----daŭrigota----- E.HEARNE.

"LA MONDO ESTAS ETA GLOBO"---F-ino Pauline Worden, de Adelaide, skribas, ke la ĵus mortinta Episkopo Hay, menciita en la Marta RONDO, kaj ŝia onklo, W.Worden, de Bishop Auckland, Durham, estis amikoj dum multaj jaroj antaŭ ol la episkopo iris Tasmanion. Kiam tiu ĉi vizitis Anglujon por la lasta fojo, li loĝis ĉe ŝia onklo; tie li certe aŭdis multe da babilo pri E-o, ĉar la gekuzoj estas tre fervoraj verduloj.

VERKAJA KONKURSO.

"LA RENDEVUO" decidis havi konkurson por originalaj verketoj, kiel en la lastaj du jaroj. Ni esperas pligrandigi la ideon kaj helpi akiri novan talenton por LA RONDO. Tial ĉiu Esp-isto en Aŭstralio povas partopreni en la konkurso. La kondiĉoj estas:

- (1) La verketoj ne estu pli mallongaj ol 500 vortoj.
- (2) Ili devas esti tute originalaj.
- (3) Ili devas esti aŭ en la manoj de la Prezidanto, S-ro Ballard, je la Novembra kunveno de la Rendevuo, aŭ poŝtitaj al S-ro C.Ballard, 29 Lansdown Rd., East St.Kilda S2, frue en Decembro.
- (4) Estos modesta enirpago po unu ŝilingo kaj la sumo kolektota iras al la kaso de LA RONDO.
- (5) Kiel antaŭe, ni lasas al S-ro F.R.Banham juĝi la verkojn.

Ni atentigas al Melburnaj kaj vizitantaj E-istoj, ke ankoraŭ vigele vivas la "Esperanta Rendevuo", kie ĉiu E-isto estas bonvena je la lasta Vendredo en la monato ĉe la Business & Professional Women's Rooms, 4 Floor, McEwans Bldgs., Lit. Collins St. Ni esperas, ke malnovaj E-istoj de tempo al tempo vizitos nin por montri, ke ilia intereso en la Interna Ideo ankoraŭ ne velkis, eĉ se ĉiu estas tre okupata nun. Ĉiam estas interesa diskuto kaj feliĉa babilado, kun la ne malmulta helpo de biskvito kaj taso da teo. La sola regulo: NI ĈIAM PAROLU ESPERANTON! E.HEARNE(Hon.Sek.Esp. Rendevuo)

NI TRE DANKUS ricevi de legantoj pecojn el alilandaj gazetoj aŭ leteroj, pri kiuj ili pensas, ke tiaj utilis por LA RONDO. Ili estu nete mallongaj, en klare legebla preso aŭ manskribo, kaj havu ĝeneralan intereson.

JUSTO.
El "RENOVIGO" de MEKS.

En la menso de ĉiu homo ekzistas sendube la ideo pri justo. Tamen, tia ideo multe varias de individuo al alia, ĉar ĉiu ajn donas al la vorto malsaman interpreton kaj ĝenerale pretendas ke sia persona interpreto estas la justa.

La manko de justo en la homaro estas klare videbla, ĉu rilate la malproksima pasinteco aŭ dum nia epoko. La justo estas tute necesa por la pacema vivado, ĉiuj komprenas. Sed la egoismo malhelpas senti ĝian veran, simplan kaj vastan signifon, kaj, kontraŭe ol tio, kion oni rajtus esperi, je la nomo de ĵusto oni ĉiam faris plej grandajn maljustaĵojn.

La konkiranto, la tirano, la pruntisto, la rabisto, ĉiuj tiuj kiuj iamaniere forprenas el la aliaj ĉu liberon, ĉu havaĵon aŭ vivon, pretendas agadi je la nomo de la justo. El tio rezultas ke la plejmulto, kiu konstante sentas kaj suferas pro tiaspēca "justo", alvenas al la konkludo ke justo estas tio, kio favoras al "mio", kaj el tio la senfina baraktado por la egoisma justo, malgraŭ la noblaj klopodoj de tiom da homaramuloj kiuj oferis kaj daŭras oferi sian vivon por la bono de la aliaj.

La suferoj kaŭzataj de la falsa interpreto de la justo finfine komprenigos ĉiujn, ke la vera justo estas ofte tio, kion ni malŝatas tial ke ĝi malakordigas kun niaj ambicioj, kun nia egoismo. Kiam la nuna militego forpasos, la homaro rekomencos, pli laŭte ol iam, kiamori por justo. Tiu postulado ne devos esti por la kutima, por la mallarĝa, persona kaj egoisma sed por la vasta, ĝenerala, universala, justo. Se oni iam kaj por ĉiam ne ŝanĝas la procedojn, la mondo daŭros esti nura fibatalkampo de egoismo, hipokriteco kaj maljusto.

SALUTON al F-ino Beatrice Blyth, Surrey Hills, Viktorio, pro la 94. datreveno! Ankoraŭ viglas nia plej maljuna Esperantisto.

KIOM DA AUTOMOBILAJ FABRIKMARKOJ? Aŭtistoj! Ĉu vi povas superi la faron de S-ro J. Dixon, Anglo, kiu sole per la forto de la memoro skribis en horo fabriknomojn de 203 aŭtoj. En la komencaj 13 minutoj li skribis 83 nomojn; post la hora limo li rememoris ankoraŭ 23. Devas esti, ĉu ne, ke tiu homo estas profesia katalogisto? Fakte, dum la jaroj post la invento de la aŭtomobilo oni uzis pli ol 2000 fabriknomojn, el kiuj nur 165 iam troviĝis sur Aŭstraliaj vojoj. Aŭstralia "Life" (Mar.)

A.E.A. AFEROJ.

PROPAGANDA SEKRETARIO. En la lasta tempo via Komitato decidis nomi Propagandan Sekretarion kun Helpsekretarioj en ĉiu landparto, kies devoj estos respondi al leteroj en gazetoj k.t.p. en la nomo de la Asocio. Helpus nin se ĉiu Grupo bonvolus proponi al la Estraro la nomon de persono, kiu konsentus agi tiurilate. Izoluloj loĝantaj en lokoj malproksime de Grupo ankaŭ helpus, proponante sin por la tasko. Ĉiun nomon ricevitan de la Sekretario, li metos antaŭ la Estraron. Ne prokrastu, decidu kaj skribu nun.

JARLIBRO. Espereble ĝi estos preta en Junio. Ni devas limigi la Adresara parton por ke estu sufiĉa spaco por plena informo pri la diversaj servoj---Gazeta, Libro, Ekzamena, Propaganda, Delegita ktp

NOVAJ GRUPOJ fondiĝis ĉe Burwood (Vic.), kaj Perth (W.Aus.) S-ro R.Craigie inicias tiun ĉe Burwood, kaj M.E.K-ano S-ro F.Pitt gvidos la rondon. D-ro C.J.Caldera iniciis la Esp. League of W.A. en Perth kaj forte propagandas por la lingvo. Sukceson al la du penoj. La devizo de ĉiu estu harmonia laboro kun la malnovaj grupoj.

B.E.S. La Sekretario de Brisbane Esp. Society avizas, ke la armeo nun okupas la konstruaĵon en kiu ili kutimis kunveni. La novan adreson ni anoncos tuj kiam eble.

GRATULON al Ges. Schwerin (N.S.W.) pro ilia sukceso en la B.E.A. Perkorrespondanta Ekzameno por Progresintoj. S-ro Schwerin pasis kun honoro. Al S-ro I.Masel (W.Aus.) pro raporto de lia disaŭdigo, kiu aperis en "A.B.C.Weekly". Al samideanino en Bundaberg (Q), kiu aranĝis fenestran ekspozicion.

DEZIRATA. S-ro F.V.Taylor (N.S.W.) volas aĉeti "Tridek Jarojn en la Ora Nordo." Se iu havas aĉeteblan Ekzempleron bonvolu avizi aŭ S-ron Taylor aŭ la subskribinton. La Sek. ankoraŭ havas "Stranga Heredaĵo," 3/- (afrankita)

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de membro kun LA RONDO S-ino Westbrook, S-roj Drummond, E.Williams, Wanmer, Hatfield, Towsey, Cohen, Pitt, Johnson, Lechmere, F-inoj E. & A.Godfrey, A.L.Bailey.

KOTIZOJ. A.E.A. Membro kun LA RONDO, 5/- . LA RONDO al nemembroj 3/6. Sur poŝtbileto NE enskribu nomon de urbo en kiu oni kontantos ĝin. I.E.L. (Pagu al S-ro Pfahl, N.S.W.) Membro Jarlibra 5/-, Membro Abonanto 10/-

GEORGE HILLERMAN (Sekretario)

Box 75, Devonport, TASMANIA.

T.E.A.AFEROJ. Post dekok-monata foresto, S-ro Percy Holmes, fervora Viktoria E-isto, libertempis denove en Hobart. Sciiginte, ke li celas viziti nin dum Marto, ni senprokraste faris aranĝojn por lin festi. Akompanis lin la edzino kaj filineto, kiuj antaŭe ne vizitis Tasmanion. Ek de la unua renkontiĝo tiuj afablaj samideanoj fariĝis niaj konstantaj amikoj. Post mallonga ĉeesto ĉe Devonport, kie ili vizitis S-ron Hillerman, kaj ĉe St.Mary's, kie loĝas Ges-roj C.C.Cowling, ili pasigis en Hobart dek aferplenajn tagojn inter ni. La vetero estis brile varma, kaj sen kiu ajn malhelpo ili povis plene ĝui la belecon de nia insulo. Espereble ili ne prokrastos estontan viziton al ni tiom longe, kiom ili ja faris je la ĵus pasinta. Ili ricevos same elkoran bonvenon kiam ajn kaj kiel ofte ili ekpaŝos sur ĉi-teron.

GORDON CHATTERTON, Sek-15
T.E.A.

KVINSLANDO. Brisbanaj E-istoj ĉi-jare elektis S-ron Clement ~~Kidd~~ Kidd prez-o; S-inon A. Sycamore kaj S-rojn T.Suess kaj J.McDonald vicprez-oj; F-inon E.E.Carrick hon. sek-io, kaj F-inon Rose McPherson kasisto. La jarraporto montras la pasintan jaron ĉinteresa kaj la klasojn regulaj, malgraŭ diversaj servdevoj kaj malforta urblumo.

Ĝuinda vesperon havis anoj de la Societo dome de F-ino Carrick, por bonvenigi al S-ro Ray Roberts, norda membro nun servanta en Usona ŝarĝŝipo. S-ro J.K.Brown, ano nova, violone verŝis ondojn da plezura sono.

Je la unua kunveno de la nuna jaro membroj de la Brisbana E. Societo spirite vojaĝis laŭ la malsupra ekstremo de la Granda Barrier-Rifo, ĉirkaŭ Insulo Heron, iom for de Gladstone. Ebligis tion la sorĉajvortoj de S-ro W.Crooke, bonekonata Societano. Dum lia vizito al la Rifo li faris kolorfilmojn, kiuj frappe redonis al la feliĉaj vidantoj la mirindaĵojn de la maro, tero, aero en tiu fabele bela regiono--fiŝoj, birdoj, marplantoj, koralo kaj kelonioj.

S.WANMER ("Telegraph", Brisbane).

LAU "SATANA BULTENO" D.c.1942, la Meksikia registaro jam dekretis malpermeson de lingvoj ekster nur la Hispana kaj la Angla por rilatoj inter tieaj landanoj kaj la eksterlando. Esperanto estas, sekve, malpermesita, aŭ, pli bone dirita, nerekonata de la Meksikia Registaro. La "S.B." venis al ni "katakombe" el Str. Riojal 1740, Mendoza, Argentino. Parenteze, la sensaĝa dekreto liveris ankoraŭ unu baton al nia fervora apostolo Lanti, kiu vegetas en Meksiko.

ESTAS PLI NOBLE, doni al la mondo ridon ol larmon.

LINGVAJ NOTOJ.

TRADUKA PECO 39 (Apr.) Plaĉus al Kursanoj scii iom pri la laboro de siaj kunrondanoj. Ankaŭ por nemembroj la sekvantaj notoj eble havas intereseon. Rimarku la diversecon de la fraztradukoj.

Recurrent combination. Reaperado de la sama signo; ripetiganta, perioda, okazadanta, reokazanta, reokaza kombinaĵo. (Gordon: kelkfoje okazanta kombino).

Painter's cradle. Krom eraraj, ankaŭ ridigaj estas kelkaj provoj: Kolorist-seĝeto; boatestra seĝo; estrado, lulilo, korbo de pentristo. (Gordon: domkolorigista trabaĵo).

Mastery of Hebrew. Supereco; scio; bonega, majstra scio; majstreco, ellernado...Laŭ mia opinio S-ro Gordon povus tie uzi adjektivon, ekz-e funda, antaŭ "scio".

Then (afterwards). El naŭ tradukoj sep enhavis eraran "tiam" anstataŭ "poste". Tio montras preskaŭ ĝeneralan malatenton al la konsilo donita en Rondo (Jan. p. 224).

"I HAVE READ Karl Minor's notes on p. 223. It seems to me that before entering on a discussion of the points, correspondents would do well to read Lingvaj Respondoj and consider what the Master therein says concerning over-precision and the changing of words that have long been in use." G.GORDON.

Ni ricevis afablajn notojn pri "Havita de" (p.235) de S-roj Schwerin kaj Hirschel. Skribis la unua: "Certe neniu uzus tiun esprimon nuntempe. Ĝi ne devenas el la Germana lingvo; ekzistas nur unu maniero por esprimi "fari paroladon": eine Rede halten (teni paroladon). Stranga esprimmaniero, kies devenon mi ne scias...."besitzen" ne havas iun rilaton al ĝi.

NU, TRADUKEMULOJ! (1) Intenze misatentigi homojn, enkondukante faktoron efektive nerilatan al la konsiderata afero. (komparu: to cloud an issue (2) Mi ekricevis skuon de teruro. (3) Ni kaŝas antaŭ ŝi la efektivajn faktojn (de la afero). (4) Ŝi trompis lin. (5) La urbestra balo vigla iradis (6) Ni revenu al nia temo (7) Ili estas la kanajlaro de dekadenco (aŭ degenera) epoko. (8) Enspezi en unu rilato, sed elspezi en alia. (9) Lia vizaĝo ekricevis mienon ĉagren n. (10) Mi devis lin subaĉeti.

TRADUKU (1) He did it over my head; (2) You've nothing on me (3) He poached on my preserves. (4) She is a catty copy-cat. (5) He went the whole hog, and so saved his bacon. (6) She looked daggers at him.

KASO DE LA RONDO. Enspezoj; Konta trans. 6/6; Sinoj Dollahan, Dunn, Baker, Schillerman, Freeman, Harris, Moon, Westbrook, Hill, Fales, 35/- Sino Rawson 9/6; Sroj Schwerin, Holmes, Behir, Taylor, Drummond, Ling, Wanmer, Cuvet, F.A.W. Thomas, 1/11/6; Finoj Sterling, Stempel, 7/- Sro Barry 1/9; Dro Caldera, Sro M. Noake, kursa 6/6 Sro Enderby (2 jaroj) 7/-; Vendoj 1/-: £5.5.9. Elspezoj 3/-; Poŝto 1/-/-; papero 16/- Sablon: 12/2; Luo 5/- Bindp. 1/6 az. elsp. 3/-; £2.18.2 En la Kaso £2.7.7. W.ADDIS, 25 Greville Ave. Flinders Pk. Adelaide. S.Aus.

POR KOMENCANTOJ. (4)

A set of words called the Cōrrelatives is most important.
Here is a table of them:-

<u>IA</u> some kind, or sort of, some of some kind	<u>ĈIA</u> of every kind every	<u>KIA</u> What kind of? What a...! ...as	<u>NENIA</u> no kind of ne, no such of no kind	<u>TIA</u> that kind of such a of that kind
<u>IAL</u> For some, any reason or cause	<u>ĈIAL</u> for every reason, for all reasons	<u>KIAL</u> why? For what reason or cause?	<u>NENIAL</u> for no reason or cause	<u>TIAL</u> for that rea- son or cause, therefore
<u>IAM</u> at some time ever, once	<u>ĈIAM</u> every time always	<u>KIAM</u> at what time? when?	<u>NENIAM</u> at no time never	<u>TIAM</u> at that time then
<u>IE</u> in some place somewhere anywhere	<u>ĈIE</u> everywhere	<u>KIE</u> in what place? where?	<u>NENIE</u> nowhere	<u>TIE</u> there, in that place.
<u>IEL</u> in some way or manner, somehow	<u>ĈIEL</u> in every way or manner, in all ways	<u>KIEL</u> in what way? how? like...as	<u>NENIEL</u> in no way nohow, not at all	<u>TIEL</u> in that way thus, so, as...
<u>IES</u> somebody's someone's anyone's	<u>ĈIES</u> everyone's each one's	<u>KIES</u> whose? whose, of which	<u>NENIES</u> no one's nobody's of none	<u>TIES</u> that one's of that of those
<u>IO</u> something anything	<u>ĈIO</u> everything all	<u>KIO</u> what?which? that which	<u>NENIO</u> nothing	<u>TIO</u> that (thing)
<u>IOM</u> some quantity somewhat, rat- her, a little	<u>ĈIOM</u> every quanti- ty, the whole, all, all of it	<u>KIOM</u> what quanti- ty, how much? how many	<u>NENIOM</u> no quanti- ty, none at all.	<u>TIOM</u> that quanti- ty, so much, so many.
<u>IU</u> some one anyone	<u>ĈIU</u> every one everybody each	<u>KIU</u> which one, who, he who which, that	<u>NENIU</u> no one nobody	<u>TIU</u> that one the former

Of the above, those ending in A and U can take the accusative and plural forms. Those ending in O take only the accusative except in very rare cases which we can leave for the present. UJ is pronounced like UI in ruin.

At first sight these may appear difficult, but they are really

quite easy. First read across---that gives the additions to one word. Then read down, and you will notice that those same additions are taken by each of the other words, so that all you have to learn is the meaning of IA, IAL, IAM, IES, IO, IQM, IU, and the special significance attaching to the additions Ĉ, K, NEN, T. "nen" is the negative NE, with N added for the sake of euphony.

The following phrases illustrate those you have not yet had:-

IA frukto estas bongusta(good-tasting), sed ne ĈIA---KIA estas venena? (poisonous)---IAL li malamas ĝin, mi ne scias KIAL, eble (perhaps) NENIAL---ĈIAM kaj ĈIE mi bezonas monon, TIAL mi NENIAM perdos (lose) ĝin---IAM, IE, mi ree(again) renkontos(meet) vin---ĈIAL, tio estas bona---Mi estas IOM laca(tired)---KIU estas TIU soldato? Mi havas NENIAN ideon---En ĈIU lando estas IO bela---NENIE mi trovas feliĉon(happiness)---KIOM vi havas? Mi havas ĈIOM. ---Li plaĉas (is pleasing, pleases) al NENIU---ĈIO estas malgaja (gloomy)---TIOM estas tro peza(heavy) por vi---IES aŭto(motor) estas antaŭ(before, in front of) la pordo(door) sed mi ne scias KIES ---IU deziras(wants) ombrelon(umbrella)---Mi vidas NENION---NENIES infano estas perfekta(perfect)---TIES opinio(opinion) NENIOM valoras---ĈIEL li ĝin faras, sed NENIEL li sukcesas(succeeds)---Li babilas pri (chatters about) ĈIES aferoj---KIAM li estas TIEL kolera(angry) TIAM ni timas---TIA rimarko(remark) ŝajnas(seems) IEL nekonvena (unsuitable). Copy without English, and learn.

KIA is often used in exclamations. KIA BELA TAGO! What a lovely day! KIA AĈA ERARO! What a horrid mistake!

AJN can be used with K words thus:- KIO AJN, whatever; KIA AJN, whatever kind of; KIAM AJN, whenever; KIOM AJN, however much, etc.

The K words are used for questions---KIES BUTIKO ESTAS TIU? Whose shop is that? KIE ĜI ESTAS? Where is it?

Questions are also asked with ĈU. ĈU VI AMAS MIN? Do you love me? ĈU VI NE AMAS MIN? Do you not love me? VI AMAS MIN, ĈU? You love me, do you? VI AMAS MIN, ĈU NE? You love me, don't you? VI NE AMAS MIN, ĈU? You don't love me, do you?

ĈU also means whether. MI NE SCIAS, ĈU VI AMAS MIN, I don't know whether you love me.

KIOMA is sometimes used in questions which expect a number in the reply. JEN LA STRATO! EN KIOMA DOMO VI LOGAS? Here is the street! In which house do you live? NI LOGAS EN LA TRIA.


Adverbs answer the question KIEL? and end in E. FACILE, easily; RAPIDE, quickly; KOMplete, completely; KVIETE, quietly; SINCERE, sincerely; SUBITE, suddenly; EVIDENTE, evidently; GOJE, joyfully. Sometimes English uses a phrase where Esp-o uses only one word:- INFANE, is used for all the following, as-a-child, in-the-way-a-child-would, childishly, so similarly AMIKE, FRATE, KNABE. GARDE, on-guard; MOMENTE, for-a-moment; MATENE, in-the-morning; KRAJONE, with a pencil; PLEZURE, with-pleasure; POŝTE, by post; BICIKLE, by-bicycle; LITE, in-bed.

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., ESSENDON W5, VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

10.6.43


LA RONDO



910 33

JUN. 1943

No. 9. VOL. 3.



ELDONITA de F.R. BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

L A R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5, Vic.

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

ANKORAU DA LUMO SUR CARLYLE.

De Walter Murdoch.

Tre detala, preciza, erudita, kaj treege malinteresa estos mia baldaŭ aperonta libro (tri volumoj en oktavo) pri la Influo de Skribmaŝinoj sur la Modernan Literaturon; tamen homo, kiu povos atingi finon de la unua ĉapitro---pri la Forarkaikiĝo de la Plumo, jam trovos en ĝi ian spiron de dolĉa melankolio. Verdire, mi foje pensas, ke tiu temo rajtas motivi majestatan tragedion, aŭ alternative alegorian poemon en kiu la plumo simbole estu humanismo kun ĝiaj vastdiversaj intereso, kaj la skribmaŝino estu specialismo kun ĝia plorinda rutinemeco. Plumo ja servis en aliaj aferoj krom skribadi, sed skribmaŝino, kiom mi scias, nur maŝinskribas, jen ĉio. Dum tempo de mensnebuleco aŭ de intensa pensostreĉo, homo povis mordmaĉi plumtenilon---jam dekojn mi manĝis dum horoj meditaĵ---sed eĉ^{ne} Sir Isaac Newton, se li nune vivus, estus tiel pensvagama, ke li provus ekmaĉi skribmaŝinon. Se la cerbo malviglis, oni povis stimuli ĝin, gratante la verton per plumo; ankoraŭ mi ne vidis skribmaŝinon tiel malpeze, bele konstruitan, ke homo povus per ĝi grati la kapon. Se ŝtopita piptubo suĉfajfis, oni per plumo fosis en la pelveto kaj kirlis la cindron tre plaĉefike. Sed ne per skribmaŝino. Geknaboj faradis bonegajn ĵetsagetojn el plumoj; la skribmaŝino uzata kiel sageto estas batalilo neniel taŭga. Resume, la skribmaŝino estas specialisto; ĝi estas eksperimento. Ĝi povas unu aferon fari absolute kompetente, sed ĉiujn aliajn fiaske fuŝas. Ĝi do reprezentas la venkintan modernecon, kaj al ĝi oni instinkte sentas neamon, kian oni sentas ankaŭ al gramofonoj kaj predigestita manĝmaterialo.

Eble vi trovas ĉi tiun neamon absurda. Eble vi ankaŭ estas specialisto. Se jes, akceptu pardonpeton pro mia ofendo al via personeco. Sed verŝajne ankaŭ vi partoprenas mian efektivan plendon kontraŭ la skribmaŝino---ĝi estas nekuraceble bruaĉa. Plimulte la malbonoj en la nuntempa literaturo devenas de tio, ke miloj da verkistoj formatis la plumon por uzi ĝian klakantan antaŭilon. En la malnovaj verkistoj, kies plumoj rapide kaj silente transkuris la paperon, en-nestis saĝo trankvila, serena. Ĉu homo povas esti trankvila, serena aŭ saĝa dum li devas pensadi je akompano de ostecaj frapsonoj, kvazaŭ aro de skeletoj malpie

dancus kun kastanjetoj? Nur konsekvence, ke la moderna literaturo fariĝas plendema, febra---mirinde estas, ke malgraŭ la kondiĉoj, aperas io meritanta la nomon literaturo. Feliĉe ankoraŭ restas kelkaj verkistoj, kiuj rifuzas klini sin antaŭ tiu maŝina Baal-dio. Por ekzemplo, neble estas kredi, ke S-ro W.B. Yeats per skribmaŝino kreis sian delikatan, treme belan ritmon. Sed mi vetas, ke S-ro Kipling batskribas siajn baladojn; ke S-ro G.B. Shaw martelverkas siajn antaŭparolojn, kaj ke S-ro H.G. Wells klakkreas siajn teologiojn per tiu tre kompetenta sed tre terura maŝineto. La temo estas ideo fekunda; nur Germana klerulo povus inde ĝin trakti.

Sed kiel ĉio tio ĵetas lumon sur Carlyle? Lastatempe legante novan kolekton da leteroj de Carlyle al Mill, Sterling kaj Browning (eldonis Fisher Unwin), mi ekpensis, ke tiajn leterojn neniu nuntempe skribas. La kaŭzo ne estas sole tio, ke ne ekzistas hodiaŭ Carlyle-oj. Malgraŭ ke kelkaj el tiuj leteroj de Carlyle estas tre ĝue legataj, mi ne rangigus Carlyle inter la ses ĉefaj letermajstroj. Miaj preferoj vicus jene: Edward Fitzgerald, Lamb, Stevenson, Byron, Cowper kaj Gray. Listo de aliulo povus stari: Horace Walpole, Southey, Thackeray, Lady Wortley-Montagu, Dorothy Osborne kaj Shelley. Nek lia nek mia enhavas nomon Carlyle. Li ne sidas inter la plej grandaj tiaj, sed tre granda homo li vere estas! Kiel fulme brilas liaj eklumoj de spirita sinmonito; kiel majstre li bildigas objektojn kaj personojn viditajn; kiel magie li enspiras en la skribitan vorton la potencon de vivanta parolo; kiel vera, sincera estas la atmosfero en kiu verkiĝas tiuj leteroj! Malgraŭ liaj kalumniantoj, malgraŭ ĉio skribita de li mem en gala ĉikano, li havis la genion tiri al si amikojn. Kia nobla amo spiras el tiuj leteroj, kiujn li skribis al tri amikoj indaj je tuta la amo, kiun li povis al ili montri! Metante tiun ĉi volumon surbrete apud la du antaŭajn kaj plidikajn kolektojn, kaj taksante per fluga rigardo lian entutan leteraron, ni pensas pri ĝiaj trezoroj de rido kaj ploro, de fajra vervo kaj alta saĝo, kaj ekkrias: "Kiel ekstreme riĉa devas esti tiu kampo de Angla literaturo, ĉar inter la letermajstroj eĉ Carlyle ne kalkuliĝas inter la unua seso!

Mi revenu al la temo---ke la skribmaŝino mortigis la leterverkadon, kia ĝi estis en la malnova kaj nobla senco. Neniam naskiĝos alia Madame de Sevigne, neniam alia Horace Walpole---mi nomas nur du, kies famo baziĝis sole sur talento en tiu nun forpasinta arto. Stevenson estis la finlasta leterverkanto. Bonŝance li iris al Samoo, lasis la amikojn en Anglujo. Tio ebligis nin posedi leterojn, kiujn multaj homoj preferas legi ol liajn librojn. Feliĉe ke la maŝino venis iom tro malfrue por lin tiri sub sian influon.

Plaĉus al mi se klerulo redaktus volumon "Krizaj Leteroj", tio estas, leteroj kiuj naskiĝis en momentoj krizaj por la verkantoj, leteroj, do, kiuj klare vidigas ilian efektivan karakteron. Tiam leteron Lamb skribis al Coleridge, kiam la duobla tragedio de fratina frenezo kaj patrino morto eksplodis en lian vivon. Tiu letero neniam enhavas el liaj agrablaj frivoloj kaj amindaj pozoj; en ĝi brilas la pura oro de lia naturo. Vi ne legos ĝin, sen ke

vi dumvive amus ĝian verkinton. Tiu mallonga letero, unu el la plej kortuŝaj en la mondo, prilumis ĉion, kion li poste verkis, la tragedian kaj la ridantan saĝon de liaj libroj. Nu, en tiu kolekto de Carlyle sidas du tiaj krizaj leteroj. La unuan li verkis tuj post kiam foriris Mill, tremante, pala pro teruro, ĵus informinte al Carlyle, ke servistino bruligis la manskribaĵon de la unua volumo de "The French Revolution". Perdi laboron de tuta jaro estis kruela bato al Carlyle, malriĉa, senfama, soleca; sed sciante, ke suferas ankaŭ Mill, al kiu li antaŭe konfidis la manskripton, li adresis al li konsolan leteron. La duan li skribis dum mortigadis lia amiko Sterling, kiun li amis kiel fraton. Ĝi estas tro longa por ke mi citu ĝin plene, kaj estus profane ŝiri frazojn el ĝia kunteksto. Diverŝe tamen ĝian karakteron, sciigante, ke iom poste la mortanta Sterling skribis al alia amiko: "Antaŭ nelonge venis letereto de Carlyle, miakrede la plej nobla, plej milde-ama iam skribita de homa mano." Ĝojige estas scii, ke fine tiuj du leteroj jam venas antaŭ la publikon; eĉ se la libro enhavus nur tiujn, ĝi ankoraŭ meritus aĉeton. Ili atestas konfirme al la esenca nobleco de Carlyle. Mankis multo al li karaktere. Li estis foje tre absurda, tre malbonhumora; liaj juĝtaksoj ofendas vaste, kaj lia vivo, kiel priskribita per propra mano en lia "Reminiscences", tute ne estas perfekta. Tamen en momentoj de forta animstreĉo, kiajn mi supre montris, li nepre ĉiam sukcese eltonis la pruvon. Li kurage frontis al grandaj krizoj, ĉar granda homo li estis.

-----Tradukis F.R.BANHAM.

CIGARSON

de R.Matthous (el Magazine Digest, Junio 1939)

Londono estas fama ne nur pro ĝiaj nebulo kaj viskio, sed same pro la trafa sprito de ĝiaj burĝoj. S-ro Johnston, makleristo laŭprofesie, terure suferis pro la nebulo, konsolis sin per viskio kaj tutkore ridis pri ĉiu bona ŝerco, kiun li renkontis.

Li mallaŭte fajfis, kiam li malrapide iris laŭ "Regent Street" survoje hejmen de la laboro. Lia entrepreno prosperis bone; li ĵus kontraktis pri tre profitdona negoco. Kion do fari en ĉi tiu belega posttagmezo?

Li okhaltis antaŭ la respektinda cigar-magazeno de Young. Li eniris kaj demandis skatolon de la plej bonaj cigaroj. Kun mieno de spertulo li primiris la delikatan aromon kaj koloron de la cigaroj al li montritaj. La komizo ofertis, alporti pli malkaran specon, kiu ankaŭ estis de eksterordinara kvalito. Sed Johnston mansigne malakceptis la sugeston. Pagi tridek funtojn por cent cigaroj, tamen estas iom ekstravagance! Sed lia entrepreno prosperis ja bone, kaj li povis permesi al si malŝparadon.

Okazis nur, kiam li troviĝis ree en la strato kun la cigaroj

sub la brako, ke konscience-riproĉoj eksentiĝis en li. Ses ŝilingoj por unu sola cigaro! Dio, tio vere estas malŝparego! Liaj trajtoj malsereniĝis.

En ĉi tiu momento li ekvidis la firmesignon de Lloyd's proksime en la strato. Impulse li transpaŝis la straton, kvazaŭ en tranco, kaj eniris la asekur-oficejon.

Li ne ŝercis: li postulis de Lloyd's asekuri skatolon de cigaroj kontraŭ difekto per fajro. Unue la komizo hezitis, akcepti ĉi tiun strangan riskon. Sed la direktoroj de la asocio post konsultado decidis, permesi la postulitan polison. S-ro Johnston pagis la asekur-sumon de du funtoj---la cigaroj estis taksitaj je sia vera valoro. En plej bona humoro li ekiris hejmen, la polison en la poŝo, la cigarojn subbrake.

Nun li povis fumi siajn cigarojn en vere paca animstato. Kio alifoje estus freneza ekstravaganco, tio nun estis ekonomia kaj eĉ profitdona privilegio. Dum la fumado li zorge deponis la cindron en malplenan skatolon, kiun li lokis apud la cigar-skatolo. Antaŭ enlitiĝo li enŝlosis ambaŭ skatolojn en la tirkesto de l'skribotablo, kvazaŭ ili estus objektoj de plej alta valoro.

Tri monatojn poste lia provizo de cigaroj atingis la finon. Johnston envolvis la skatolon de cindro kaj foriris al la oficejo de Lloyd's. Solenmiene li elpaperigis la skatolon de cindro kaj elpoŝigis la polison. "Jen la cindro de la cigaroj kaj jen mia poliso. Ĉu vi bonvole havigos al mi la monon pagendan?"

La oficistoj de Lloyd's estis konsternitaj, senvortaj! Neniam antaŭe ili spertis ion similan.

La kasisto rikanis embarasite; lia kolego malantaŭ la proksima ĝiĉeto kape neis en konsterno. La skatolo de cindro estis alportita al la oficejestro. Ridetante li venis el sia ĉambro: "Bonega ŝerco, Johnston, vere eksterordinara petolaĵo, kiun vi elpensis. Sed certe vi ne estas serioza. Tio estus misuzo....."

Li ne povis daŭrigi. Johnston indigne interrompis. "Misuzo? Ŝerco?" li kriis ruĝigante pro kolero. "Ĉu vi ne eldonis polison, por protekti min kontraŭ tiu risko?"

"Certe, sed tio estas absolute laŭnorma kaj natura konsumado de la cigaroj."

"Ne koncernas min la maniero, kiel ili cindriĝis. Fakte estas, ke ili cindriĝis. Ĉu vi pagos aŭ ne?"

"Kompreneble ne."

"La poliso sekurigas kontraŭ detruo per fajro. Ĉu la cigaroj ne difektiĝis per fajro?"

"Ili havigis al vi plezuron."

"Tio tute ne trafas la kernon. Mi insistas, ke vi respektu la kontrakton." Li frapis la skatolon indikante la finon de la konversacio.

Kolerege Johnston ekrapidis el la oficejo. Li iris al la juĝejo, kie li iniciatis proceduron kontraŭ Lloyd's.

Semajnon poste la juĝkunsido okazis. Johnston alvenis portante la ĉefan pruvilon---skatolon da cindro. Li montris la enhavon al

la juĝisto, pledis kaj konfide atentis la efektivigon de justeco.

La juĝisto pacience aŭskultis la argumentojn de la akuzanto. Bonanima rideto montriĝis sur lia vizaĝo. Li jam antaŭe konis la detalojn de ĉi tiu stranga proceso. Konsidere al la graveco de la rezulto direktoro de Lloyd's persone reprezentis la priplenditon. La veraj fundamentoj mem de la asekur-komerco estis endanĝerigitaj.

Aŭskultinte la klarigojn de ambaŭ partioj la juĝisto demandis Johnston: "S-ro Plendanto, ĉu vi insistas pri laŭvorta interpretado de l' kontrakto?"

"Kompreneble. Tio estas mia rajto."

"Tiukaze vi havu justecon. La kontrakto estas redaktita absolute laŭ leĝo. La tribunalo ordonas, ke Lloyd's pagu £30 al la plendanto."

"Brave!" ekkriis Johnston. "Justeco ankoraŭ regas en ĉi tiu lando!" Post tio li volis eliri la juĝejon.

"Unu momenton, s-ro Plendanto," la juĝisto postkriis lin, "se justeco estu gardata, kiel vi tiom arde deziras, ~~mi~~ estas devigata, akuzi vin pro krim-bruligo. Vi mem konfesis, ke vi ekbruligis la cigarojn intence. Pro tio mi kondamnas vin al monpuno de £30 kaj al 14-taga enkarcerigo. Oficisto, tuj forkonduku la arestiton!"

Johnston disponis pri 14 tagoj en la kvieto de sia karcero, por pripensi la komplikajn problemojn, ĉu li aŭ lia kontraŭulo venkis en la proceso. Certe li sukcesis kontraŭ Lloyd's. Sed aliflanke, ĉu la sama persono povas gajni kaj perdi la saman proceson?

Johnston ne kapablis solvi ĉi tiun konfuzan problemon. La sola fakto, kiun li klare vidis, estis, ke jam la nura fumado de cigaroj estas krima frenezaĵo. Li ĵuris resti fidela al pipoj por la resto de sia vivo. Eĉ Lloyd's rifuzus asekuri paketon da pip-tobako kontraŭ fajro. Ĉu.....

-----S-no K. SCHEWERIN
(Trad)

FANTAZIO. (daŭrigita)

S-ro McGregor kondukas la gastojn en la pordon, kiu senbrue malfermiĝas aŭtomate kaj senŝlosile. Kvankam en la tuta domo mankas drapaj kurtenoj, la muroj estas tiel bele dekoraciitaj per formo kaj koloro ke nenio mankas kaj la tuta planko estas glata sed mola. Kondukantaj la gastojn al aro da luksaj banejoj en la mezo, S-ro McGregor diras ke la manĝo estos preta post duon/horon.

Poste la gastoj eniras grandan manĝ-salonon en la antaŭe parto de la domo. Montriĝas ekstere la arb-kovrita montaro kvazaŭ ne estas muroj kaj nun evidentiĝas ke la eksteraj muroj estas travideblaj de interne sed ne de ekstere.

La manĝo jam pretiĝas sur la flor-belaĵ tabloj kaj la gastoj sidigas por ĝui la bonaĵojn. Estas evidente, ke ne estas servistoj kaj ĉio estas farita per ia nevidebla aparato sed ŝajne preskaŭ senlabore.

Post la manĝo S-ino McGregor invitas la gastojn por promeni en la ĝardeno. S-ino Cha tzoff diras, "Ĉu estas sufiĉe da tempo por marŝi iom ĉirkaŭ la montetoj antaŭ ol ni iru al la kunveno?" "Jes," diras S-ro McGregor, "Ni ĉiam devas esti ĉe la kunveno precize je la oka sed ni povas promeni dum preskaŭ unu horo kaj havi sufiĉan tempon por enveni la ĉefurbon ĝustatempe."

La grupo promenas inter la arboj kaj filikoj feliĉa pro la belaj ĉirkaŭaĵoj kaj la interesa konversacio ĝis S-ro Imoto rimarkas ke la horo preskaŭ pasis.

Ili estas tute kontentaj post la promeno sidi ripoze en la aŭto dum ili iras denove al Melburno. Veninte al la ĉefurbo, la aŭto haltas antaŭ tre impona konstruaĵo kaj Ge-sroj McGregor kondukas ilin al Granda Ĉambrego en la kvara etaĝo. Tie jam amasiĝas gajaj grupoj ĉirkaŭ pli ol cent apartaj tabletoj kaj nun kaj tiam homo vagas de unu grupeto al alia grupeto por saluti amikojn kaj babili facile.

Rimarkinde estas ke ĉiu portas verdun steleton kaj super la belforma perono sub granda verda stelo estas la vortoj "La Rendevuo."

Malrapide, pro tio ke ili ofte haltas por prezenti la gastojn al amikoj, la grupo iras al la perono kie la oficistoj salutas ilin. La Prezidentino, pli ol mezaĝa, sed vigla ĉarma virino, precipe bonvenigas ilin kaj post tio sin turnas al la ĉambrego por prezenti ilin al la grupo. Ŝi diras:-

"Amikoj; Estas granda plezuro al mi prezenti al vi niajn ali-landajn samideanojn kiujn vi jam bone konas pro ilia fervoro labo-oro en la rekonstruo de iliaj respektivaj landoj kaj precipe pro ilia reciproka disvastigo de landa kulturo pere de Esperanto.

Mi sentas min tre fiera pro tio ke ĉi tiu klubo, kiu jam faris tiom da laboro en la kultura kaj praktika rebonigo de la mondo de post la terura kaj katastrofa Mond-Milito fondiĝis frue en tiu tragedia hombuĉa periodo. Ni devas tre danki niajn pasintajn Rendevuanojn kiuj fondiĝis ĉi tiun klubon kiel torĉon por ke la lumo de internacia interkompreniĝo ne estingiĝu."

Subite horloĝo bruegas, mi leviĝas en la lito kaj tuj memoras ke mi devas iri al la Rendevuo antaŭ ol iri al la laboro.

Rendevuo! Rendevueto.

----- E. HEARNE.

KIA KRIMO! Lastatempe mortis en Anglujo, je aĝo de 65 jaroj, S-ro E. Cornell, de Bordyke, Tonbridge. Li kaj lia patro ricevis la unuan juĝalvokon pro aŭtomobila leĝrompo. Li veturis je rapido po kvin mejloj en horo anstataŭ la leĝe permesita poeco de du mejloj, en Tonbridge la 12an de Aŭgusto 1896. Estis kroma leĝakuzo, nome, ke li ne irigis antaŭ la aŭto homon kun ruĝa flago. Lia patro, kiu posedis la aŭton, devis punpagi po unu ŝilingo pro ĉiu leĝrompo.

ASOCIAJ AFEROJ.

GRUPA TRADUKA KONKURSO. Laŭ Komitata decido, La Asocio baldaŭ aranĝas konkurson por monata traduka peceto. S-ro P. Schwerin, en kies manojn la Prezodantino metis la taskon regi ĝin, sciigas, ke la tradukitaĵo devos esti rezulto de kolektiva laboro de grupmembroj. Grupoj ricevis plenan informon de S-ro Schwerin pere de siaj sekretaroj.

GRATULON al M.E.K., kiu aranĝis B.E.A. Diploman Kurson, kies membroj (5) en ĉi tiu monato konfirmos sian studon, partoprenante la ekzamenon---sukceson al ĉiu! Al Perth Esperantistoj proiliaj propagandaj penoj---novaj lernantoj jam ekstudis.--Al D-ro Einocovici, kiu gvidas novan kurson en Corigin, W.AUS.

NOVAĴERO PRI ESP-O. En "Fact" (9/5/43), Aldonaĵo al la "Sydney Sunday Sun", aperis 5-cola novaĵero pri Esperanto en Britujo. Ĝi sciigis, ke kun aprobo de la Milit-Direktejo (War Office) multaj soldatoj lernas Esperanton, ĉar ili ne scias al kiu batalkampoj ili eventuale iros. Ĝi ankaŭ raportas pri kafejo en Grey's Inn Road, London, kiu jam fariĝis rendezvo por diversaj malsamaj nacioj, precipe militistoj. Tie ili parolas en la komuna lingvo, ĉar ili trovas Anglojn malbonaj lingvistoj, kaj ilian lingvon malfacila.

JARLIBRO. La Asocia Jarlibro nun estas preta. Se iu Individua Membre ne ricevos ekzempleron dum Junio, li bonvolu sciigi la Sekretarion. Grupaj Membroj povas konsulti ĝin en la Kunvenejo. Plena informo pri la Asociaj Servoj kaj la Adresaro formas 25 paĝojn samgrandajn kiel LA RONDO. Ĝi estas por la uzo de membroj kaj oni ne vendos ĝin.

DONACIOJ dankeme ricevitaj por malpliigi la koston de la Jarlibro: S-ino F. RAWSON 15/-, S-ro G. HILLERMAN, 10/-

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de Individua Membro kun LA RONDO S-inoj Stirling, Harris, Moon, Cowling, Schillerman, Hales, Baker, Dollahan, E. Hill, Deaconess Magarey; F-inoj F. Smith, Strempel, S-roj Behr, F. Thomas, Enderby, Cuvet, Ling, Cowling, Hillerman.

KOTIZOJ. A.E.A. Membro kun la Rondo 5/-. I.E.L. Jarlibra membro 5/-. Membro Abonanto 10/-. Pagu I.E.L. kotizojn al S-ro L.E. Pfahl, 64 Brighton St., Croydon, N.S.W.

Sur poŝtbiletoj NE enskribu nomon de la urbo en kiu oni konstantos ĝin.

G.E. HILLERMAN (Sekretario)

Box 75, Devonport, T.A.S.

(Laŭ speciala cirkulero forsendita; nur la Grupoj kolektive povas partopreni ĉi tiajn konkursojn, ne unuopaj membroj.)

Tradukota Teksto:

The happy people of the world are never free. It is only youth which really wants freedom, or those who have set up a defensive mechanism against life, since to live is also to suffer. The older and wiser know that nothing is of value unless it can be shared, and that the eternal cry of the human heart is to belong to someone else. It is its escape from loneliness, its support in weakness, a solace to its pride. Even youth should think twice before it asks for freedom. Surely to be happy is better than to be free; and to be kind to all, to like many and love a few, to be needed and wanted by those we love, is certainly the nearest we can come to happiness.

(Mary Roberts Rinehart)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 18.7.43

A.E.A. "Speciala Sekretario"

P.E.SCHWERIN

Adreso: Flat 1, Carabella Flats,
McDougall St.,
Milsons Point, N.S.W.

VORTO EL OKCIDENTO:- S-ino Sainsbury, en Hakea (apud Wuraming), Okc. Aŭs., havas klason de 12 lernantoj kaj tre urĝe bezonas vortarojn Edinburgh. Ĉu E-istoj volantaj vendi, bonvolus skribi al tiu kursgvidanto, donante prezojn? Respondo: Bankedo estas komuna manĝo kun multaj partoprenantoj, plejofte samkorporacioj aŭ samsocietanoj; festeno. Fuĝi estas forkuri por sin savi el reala aŭ imagita danĝero. Agnoski estas malkaŝe konsenti pri la vereco, ĝusteco aŭ justeco de io; ne plu nei; ne plu kontesti pri; rekoni. Komparu Latinan Agnosco. Misaŭdis estas erare aŭdis, miskompreni aŭdis (misheard). Mis- estas oficiala prefikso kun senco erare, malĝuste, malbone, maltrafe, maltaŭge, ne konvene. La kvar difinitaj estas en la Plena Vortaro de SAT.

"THE BRITISH ESPERANTIST" por Jan.-Feb. ĵus venis. 1942 estis "rimarkinde sukcesa jaro" por Esperanto en Britujo. Bona traduko de ĉap. 28 "Pickwick". Kvina traduko en la Anglan de "La Espero". Faris ĝin antaŭ 40 jaroj D.H.Lambert B.A. S-ino Roosevelt kaj la Lingva Problemo. Ŝi havis "interesan tempon" kun Nederlandaj kaj Sovetaj delegitoj al studenta kunveno, sed "being unable to talk directly to a person is a great drawback." Ŝi plue diris: "I never before had realised what a help it would be if all of us learned, in addition to our own language, one universal tongue. I think I shall work more enthusiastically in the future for a

common language as one of the contributions to a peaceful world." "Step by Step" ne plu havebla; la vortaro Millidge baldaŭ aĉeteblos. "Esperanto Internacia" informas, ke Teo Jung laboras ie oficieste; Cseh kaj Ges-roj Isbrucker, Bugge-Paulsen bone fartas. Rumano T. Morariu deĵoris en Svedujo la tutan jaron, prelegante kaj inspirante la klubojn; 330 ekzameniĝis sub "Esp-a Studservo."

ŜATNAS, ke "Idle Moments" represis la pri-Esperantan artikolon de "Queensland Countrywoman". En la Maja "Q.C." ankaŭ aperis kuraga letero de S-ino J.A.Chandler, Taragoola, apud Gladstone (Kvinslando). Ŝi demandas: "Could we begin to learn Esperanto NOW?" Jes, certe, samideanino. Kontaktigu kun la plej proksima Esperanta grupo. Abonu je LA RONDO.

LETEROJ de:-

WILLIAM BAILEY. Estimata Sinjoro Banham.....Mi vin dankas pro la diversaj numeroj de LA RONDO, kiujn vi de tempo al tempo sendis al mi, kaj pro la du numeroj promesitaj. La gazeto estas tre interesa...

.....Pri Malto (vidu la Rondon de Nov. 1942) mi pli fidas al la Zamenhofa ekzemplo (la sola, kiom mi scias), ol al la vortaristoj.

....Pri la "Enciklopedia Vortaro" (Wuster) mi scias nur, ke ne pli ol kvar partoj aperis (ĝis la vorto korno). Mi eĉ ne scias, ĉu la cetero ekzistas en manuskripto, aŭ ne.... Koran saluton!

2 Feb. 1943.

WILLIAM BAILEY, Glan-y-Mor Rd., Penrhyn Bay (Wales).

(William Bailey, ano de la Lingva Akademio. Kunlaboris en la vortaro de Millidge kaj en la kontrolado de la Esperanta Biblio. Li profunde studis la verkojn de Zam. kaj ĝisoste sekvas ilin. "Vivanta konkordanco" al la Zam-a verkaro. F.R.B.)

USARO. I believe the time opportune for Esp-ists to form a plan to be put into effect immediately the war ends. Then will be the psychological moment for them to launch a well-organised campaign to roll forward with the tide of victory.

Whatever form the plan takes, good teachers and lecturers will be required. The needs of the former are already met by the various Esp-o associations and societies, but the training of the latter is sadly neglected. This should be remedied as soon as possible.

We cannot all be good lecturers, but every Esp-ist should be able to present the case for our language in an attractive and convincing way. We should be able to counter all arguments with confidence and have the requisite information at tip of tongue.

Let early action be taken to make every Esp-ist a propagand-

1st. Instruction for this purpose to ALL Esp-ists would also provide the initial training for future lecturers.

Lessons on the language were recently begun in The Rondo. Could a little space be given for Propaganda Section, in which the following items could be concisely treated?

1. Arguments for and against Esp-o, with statistics, anecdotes and suchlike.

2. Suggestions for members of Esp. clubs to have, say, monthly debates on such as "Is an International Language Necessary? Is Esperanto (or English) most suitable?"

3. Lecturettes (in full or outline) for various listeners, e.g., children, adults, &c.

4. Suggestions for ALL members to give talks of 5 to 15 minutes to fellow members on "Esperanto, the International Language."

Items 2 and 4 would give Esp-ists an opportunity to develop their talent among their friends, who would be there to encourage not to dampen. Very little criticism should be given at first, as continued interruption discourages beginners. But later, constructive criticism would be good, and a little heckling would provide amusement and give the speaker experience.

A special pocketbook for items of interest, headings of lecturettes &c., would repay each Esp-ist for reference. Such a program begun now would provide competent lecturers to present the aims and claims of Esperanto when the crucial moment arrives.

(Tiu ĉi leteron verkis armea leŭtenanto, kiu akre sentas urĝon organizi por la venonta paco. Ni invitas korespondadon pri tiu temo cele al pli efektiva agado. Ĉu vere, ke la societoj kaj asocioj kontentige "fabrikadas" instruantojn de nia lingvo, nombre kaj kvalite? Jen demando. Ĉu ni povus provizi la bezonatan nombron de instruistoj, se la ŝtato morgaŭ dekretus instruadon de Esperanto en centoj aŭ miloj da lernejoj? Redakcio.)

LERNANTO. Mi rimarkis en la artikolo "Justo", kiun vi aperigis en la Maja Rondo, la vorton "klamori". Mi ne memoras, ke mi antaŭe vidis ĝin, do mi serĉis en "Plena Vortaro" kaj "Millidge" por la vorto, sed sen sukceso. Ĉu tiu estas nova vorto?

Mi tre interesiĝas pri viaj "Nu, Tradukemuloj". En Aprilo vi prezentis por traduki "The Lord Mayor's ball...." Nu, "Lord Mayor" vi Esperantigas per "Urbestro", sed ĉu tio ne estas mayor tutsimpele? Ĉu Esperanto ne povas diferencigi "Mayor" kaj "Lord Mayor?"

RESPONDO. La vorto "klamori" neniel estas bezonata. Jam ekzistas kelkaj taŭgaj formoj per kiuj oni povas vesti la koncernan nocion. Krie postuli; bruegi, kriegi, blek(aĉ)i kaj aliaj. Sendube la verkinto, Hispano, lasis sin influi de la patraj vortoj

"clamar", "clamo" k.c. Mi prenas la okazon por atentigi al tio, ke ni ne rajtas ŝanĝi la radikojn uzitajn en represita teksto. Ni tamen volus aliigi rektajn erarojn de gramatiko, "kriantajn" sol-ecismojn kaj perfortojn al la senco kaŭzitajn de malbona vortordo aŭ sintakso. Ni tute ne respondecas pri neologismoj de fremdaj gazetuloj super kies verkoj ni havas neniom da redakcia kontrolo. Tamen piednotoj, kiam tio estas oportuna aŭ ebla, nepre akompanos tekstojn en kiuj aperas diskutindaj aŭ neimitindaj formoj.

Mayor--urbestro. Lord Mayor--ĉefurbestro. Pardonon!

REDAKTORO.

NU, TRADUKEMULOJ!

- (1) Li faris ĝin, ignore nekonsultinte min.
- (2) Vi ne havas ion, per kiu vi povus min akuzi.
- (3) Ŝi nerajte gajnis, farante aferon sur mia propra agadkampo.
- (4) Ŝi estas malica imitulaĉo.
- (5) Li streĉe uzis la plenan energion, per kio li savis sin el
- (6) Ŝi direktis al mi mortigi-volan rigardon. (danĝero.

TRADUKU:-

- (1) How vivid are his flashes of self-revelation!
- (2) That was a mere flash in the pan, but eventually he made good.
- (3) He's a devil-may-care and lets the world pass by.
- (4) Here's a pretty kettle of fish!
- (5) They had me on the mat.
- (6) He fell in the soup all right.
- (7) She puts me off with her silly affectations.
- (8) He's very quick in the uptake.
- (9) We were in the Dress Circle, but he was in the Stalls and I could not catch his eye.

PRI CERTAJ BIBLIAJ ESPRIMOJ.

Venis sub mia atento jenajn rimarkojn de iu leganto, kiu ĵus tralegis la Zamenhofan Biblion por la dua fojo. Li skribis:- Mi malkaŝe konfesas, ke neagrabla tiklis mian lingvosenton esprimoj kiaj jenaj: "...kaj Mi favorkoros tiun, kiun Mi favorkoros" (Eliro 33/19); "Faru favorkoraĵon al via sklavo (1 Sam. 20/8). Mi preferas jenajn: "Korfavoru min" (Psalm 86/3); "Turnu Vin al mi kaj korfavoru min" (Psalm 86/16). Kaj kiel eblas logike pravigi jenan esprimon: "Tiam David sendis senditojn" (1 Samuelo 19/21) kaj aliajn renkonteblajn tra la Malnova Testamento? Mi ridetis amuzite ĉe: "Mi petas de vi peton" (Juĝistoj 8/24), kaj "kiam li kuŝis

sian tagmezan kuŝadon" (2 Sam. 4/5).

Eĉ pli amuza ŝajnas al mi jeno: "Kaj Adam ekkonis Evan, sian edzinon, kaj ŝi gravediĝis, kaj ŝi naskis Kainon; kaj ŝi diris: Mi akiris homon de la Eternulo." Kun sento de maltrankvileto mi demandis al mi, ĉu vere povas okazi, ke virino gravediĝas pro ekkono de viro?.....

Komentante la supron, F.R.B. sugestas, ke la demandanto turnu sin al la antaŭparolo al la Psalmaro (eldonis Hachette), kaj sobre legu la averton tie klarige donitan. Ŝajnas, ke Zamenhof volis kiel eble plej fidele redoni la apartan, eĉ strangan por multaj, esprimmanieron de la Hebrea originalo, malgraŭ ke foje tiu principo deprenus de la senco aŭ "logiko". Eble aliaj interesatoj volus diri iom pri la afero. Parenteze, la Esperanta ne estas pli "amuza" ol la Germana, Franca kaj Angla tradukoj, kiuj tekstas: "Adam erkannte sein Weib;" "Adam connut Eve"; "Adam knew Eve"

PARODIO.

En la mondon venis nova krizo,
Tra la mondo iras la bojkoto.
Per flugiloj de la civilizo
Nun ni ĉiuj flugas al bankroto.

Jen Usono (ne plu soifanta)
Ĝi la monan ŝiras organismon.
Al la mond' eterne kreditanta
Ĝi prezentas bankan kataklismon.

Forte staras muroj de l'doganoj
Inter la popoloj dividitaj,
Sed ni ĉiuj saltas sur vulkanoj
Per la danca flamo ekscititaj.

La supraĵ aperis en "Pirato" (Parizo) en la tempo de ekonomia krizo. Alia bona parodio troviĝas en "Brit. Esp." Feb. 1934, represe el "Hispana E. Gazeto."---"La Misvojo: Himno de la Pessimistoj."

Ne povante dungi servistinojn, S-ino Bernstein, de Newark (Us.) anoncis gazete jene:- "Mi serĉas domservistinojn, bona loĝejo. Ŝi havus rajton surporti mian lutrofelan jakon en ŝiaj liberaj tagoj." S-ino B. ricevis 600 jesajn telefonvokojn en 24 horoj. Argus, Melb. 6.5.43.

KASO DE LA RONDO.MAJO, 1943.ENSPEZOJ.

	£	s	d
Konta transpreno.....	2	7	7
S-ino Crockett.....		3	6
F-ino Lambert.....		3	6
Private Hatfield.....		3	6
Lieut. Towsey.....		3	6
S-roj. E. Williams, H. Love		7	0
S-roj E. Peck, J. Meehan...		7	0
S-roj. Dudley, Worrall...		7	0
S-ro Langham.....		3	0
S-ino Freeman.....		3	0
S-ino H. Davies.....		3	0
S-ro Thompson.....		3	6
S-ro Hearne.....		4	6
Pastro Rymer.....		2	6
Lieut. Stephens.....		3	6
Bris. Esp. Soc.....		3	0
	<u>£5</u>	<u>8</u>	<u>7</u>

ELSPEZOJ.

	£	s	d
poŝto.....	1	1	6
papero.....	1	0	0
ŝablonaĵoj.....		13	8
inko.....		12	6
luc.....		5	0
bindpingloj.....		1	6
okazaĵ elspezoj...		3	0
	<u>£3</u>	<u>17</u>	<u>2</u>

En la Kaso

£1-11-5

£5- 8-7

Rondo 3/6 jare.

Traduka Kurso 3/- jare

Aŭs. Esp. Asoc. kaj Rondo,
5/- jare.W. ADDIS, (Kasistino)

25 Greville Ave.,

Flinders Park,

Adelaide, S.AUS.

ICH STAND IN DUBKELN TRAUMEN. (Heine)

En revoj nebulaj mi staris,
Rigardis la bildon de ŝi,
Kaj la amata vizaĝo
Kaze viviĝis por mi.

Ĉirkaŭis ŝiajn lipojn
Mirinda ridetar',
Kaj dolĉaj larmoj brilis
En ŝia okula par'.

De miaj vangoj ankaŭ
Defluis larmoj sen fin' -
Kaj ve, mi ne povas kredi,
Ke vere mi perdis vin!

P. SCHWERIN (Trad.)

POR KOMENCANTOJ. (5)

The past tense of verbs is formed by adding -IS to the root. MI MANGIS, I ate or was eating; the future by adding -OS, MI MANGOS, I shall eat; the conditional by adding -US, MI MANGUS, I should or would eat; the imperative by adding -U, MANGU! Eat! NI MANGU! Let us eat! As with the present tense, none of these change for either number or person. HIERAU LI PRETERPASIL MIN, yesterday he passed me. MORGAU NI DECIDOS, we will decide to-morrow; HODIAU SI BAKAS TORTON, to-day she is baking a tart.

The Infinitive adds -I to the root, STUDI, to study. It can be used with other verbs, NI PROMESIS VIDI LA FORGISTON, we promised to see the smith. There are various English translations of this form. LI AMAS KANTI, he loves singing; LI INSISTAS KANTI, he insists on singing; LI TIMAS KANTI, he is afraid of singing; LI PERSISTAS KANTI, he persists in singing; LI AUDIS MIN KANTI, he heard me (to) sing; MI CELIS LERNI, I aimed at learning.

The infinitive can also be used as a noun, but never takes the article, and its qualifying word takes the adverbial form. SCII ESTAS UTILE, To know (to have knowledge, knowing) is useful, the same meaning being expressed by LA SCIO ESTAS UTILA.

The prepositions that can be used before the Infinitive are:- POR, in order to--NI FARIS TION POR DONI PLEZURON AL VI, we did that in order to give you pleasure; ANSTATAU, instead of; ANSTATAU TRINKI, instead of drinking; ANTAŬ OL, before, ANTAŬ OL FORIRI, SI KISIS MIN, before going away, she kissed me; KROM, except, besides, LI FARIS NENION KROM PLENDI, he did nothing except (but) complain.

Verbs can take both prefixes and suffixes. VENI, to come, AL-VENI, to come to, approach; RIGARDI, to look at, RIGARDEGI, to look hard, stare. SI FIKSE RIGARDEGIS NIN, she stared fixedly at us.

When the suffix -IG is added to a root, it changes an intransitive verb into a transitive one. GI KUŜAS SUR LA LITO, it is lying on the bed; LI KUŜIGIS ĜIN SUR LA LITO, he laid it on the bed.

The suffix -IG added to a root is used in two ways, (1) to make a transitive verb intransitive; SI ROSTAS LA VIANDON EN LA FORNO, she is roasting the meat in the oven, LA VIANDO ROSTIGAS EN LA FORNO, the meat is roasting in the oven; (2) to express movement when added to an intransitive verb, LA ĈEFO DE LA TRIBO STARIS, SED KIAM MI ALVENIS LI SIDIGIS, The Chief of the tribe was standing, but when I approached, he sat down. SIDIGU! Sit down!

Both IGI and IGI can be used alone. LI IGIS MIN RIDI, he made me laugh, TIO IGAS Malfacila, that is becoming difficult. And they can also turn adjectives into verbs:- LI FACILIGIS ĜIN, he made it easy; TIO FACILIGAS, that is becoming easy.

TENI, to hold; TENIGI, to cling; ALTENIGI, to cling to.

PRO and POR. As some learners become confused between these two similar words, until you have had experience, before using either always ask yourself, just exactly what you mean. "DO I mean because of something which has already happened, or do I mean

for the sake of someone, or for some purpose?" The first will be PRO^{la} and the second POR, as in the following:- PRO LA DORNOJ MI TUS^{la} IS BRANĈON DE LA ROZARBO, on account of the thorns, I did not touch the branch of the rose tree. JEN RAKONTETO POR VI! Here is a little story for you! PRO MANKO DE SEĜO, MI DAURIS STARI, through want of a chair I continued to stand; POR KIU VI TRIKAS TION? For whom are you knitting that? AKVO POR LA ĜARDENO, Water for the garden.

LEARN these words:- ALIAJ KUTIMOJ, other customs; KELKAJ ELEFANTOJ, some elephants; MULTAJ HIPOPOTAMOJ, many hippopotami; MALMULTAJ RINOCEROJ, a few rhinoceros; VI DORMAS TRO MULTE, you sleep too much; PENSU DENOVE! Think again! IRU FOR! Go away! GI FORFLUGIS, it flew away. MI PETAS, Please, (from peti, to beg a favour.)

AUDU AMBAU FLANKOJN, hear both sides; POST LABORO VENAS RIPOZO, after work comes rest; SUNBRILO POST LA PLUVO, sunshine after rain; Post usually refers to time, but it may also mean behind, LA HUNDO KURIS POST LA KATO, the dog ran behind the cat. For behind, however, it is more usual to say MALANTAŬ. RIGARDU MALANTAŬ VI, look behind you; KASU ĜIN MALANTAŬ LA HEGO, hide it behind the hedge. (You have already had ANTAŬ). MI PENSAS PRI VI, I think about you.

EL means out of. TEKSTO EL LA BIBLIO, a text out of the Bible; PERLO EL OSTRO, a pearl out of an oyster. It is also used to express (1) one of a number, TRI EL MIAJ NAJBAROJ, three of my neighbours; (2) the material of which something is made, STATUO EL GRANITO. a statue of granite; (3) "consists", ĈAPITRO KONSISTAS EL PAĜOJ KAJ PARAGRAFOJ, a chapter consists of pages and paragraphs.

TRADUKU! (Translate!)


Hierau mi vidis katon en mia ĝardeno. Ĝi sidis apud (near) rozarbo tute sen movo. Ĝiaj okuloj (eyes) fikse rigardegis ion en la rozarbo. Mi demandis al mi "Kio estas tio, kiu tiom interesas la katon?", kaj tre kviete mi aliris--kaj tie, en la rozarbo, mi vidis etan muson. Ĝi alteniĝis al branĉo de la rozarbo kaj ĝiaj okuloj fikse rigardegis la katon same kiel (in the same way as) la kato rigardis ĝin, kaj la muso ankaŭ tute ne moviĝis. Dornoj kun akraj pintoj (sharp points) komplete kovris la branĉon, kaj pro tiuj dornoj, la kato timis ataki la muson, kaj la muso timis forkuri. Dum mi staris tie, la bestetoj daŭris rigardi unu la alian. (one the other, i.e., one another)

Kio estas la fino de la rakonteto? Kio okazis? Ĉu la kato aŭ la muso unue moviĝis? Mi ne scias. Subite venis pluvo kaj mi rapidis al la domo. Katoj malamas akvon, do eble la kato rapidis al la ŝirmo (shelter) de la heĝo kaj poste la muso forkuris.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

LA RONDO

3-7-43



JUL . 1943

91934
No. 10. VOL. 3.

ELDONITA de F.R.BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

L A R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANFAM,
2 Banchory St., Essendon, W5, Vic.

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

TUTMONDA LINGVO.

El "Nature" (London) Nov. 28, 1942.

Inter la gravaj problemoj internaciaj, kiuj frontas la homojn, estas tiu pri interkomprenilo en formo de lingvo facile lernebla por ĉiuj civilizitaj popoloj. La Internacia Morse-Kodo de signaloj estas ekzemplo de alfabetaj kaj numeralaj komunikado, kaj nuntempe la homaro bezonas interkomprenilon samvaste komprenatan. Jam delonge oni diskutis la demandojn pri internacia helplingvo, tamen hodiaŭ ŝajnas, ke interkonsento pri tio, kian lingvon elekti, estas same malproksima kiel en la tempo post la milito de 1914-18. En 1921 la British Association eldonis detalan, zorgan raporton pri la demando preparitan de komitato ne nur el sciencistoj sed ankaŭ el humanistoj. En tiu ĝi kunlaboris kun la ĉefaj asocioj de klasikaj kaj modernaj lingvoj, kaj konsultis kelkajn korporaciojn de kleruloj.

La British Assn Committee fondiĝis post ol la International Research Council, en Bruselo, 1919, levinte la demandojn pri internacia helplingvo, rekomendis formadon de internacia komitato, kiu enketu la problemon. Estis tiam esperate, ke iu centra internacia organizo naskiĝos, sub la Ligo de Nacioj, kaj havos aŭtoritaton definitive elekti internacian helplingvon (se tio estas ebla) kaj certigi al tiu lingvo plejeban stabilecon. Prezidantoj difiniĝis por reprezenti naciajn komitatojn por Francujo, Italujo, Japanujo, kaj Belgujo; la prezidanto de la British Assn. Committee reprezentis Grandan Britujon en la komitato de la International Research Council.

Ĉar la British Assoc. Committee unuanime konfirmis la havigindecon de iu internacia helplingvo, ĝi studis la bonajn flankojn de la sekvantaj tri specoj:— (1) mortinta lingvo, ekzemple Latin. (2) nacia lingvo, ekzemple la Angla. (3) inventita lingvo, ekzemple Esperanto aŭ Ido.

En la raporto de la komitato fakuloj juste kaj koncize prezentis la internaciajn pretendojn de la supraj lingvoj. Post zorga konsidero de tiu kaj alia atesto de altaj kompetentuloj en Britujo kaj alilande, la komitato ne povis rekomendi elekton.

Ĝiaj konkludoj estis jene: (1) Latin estas tro malfacila por servi internaci-helplingve. Ĝiaj avantaĝoj estas malpli ol ĝiaj malavantaĝoj. (2) La grandaj internacilingvoj de la historio ĉiam havis markojn de imperia prestiĝo. Tio kaŭzis, ke subjugaj popoloj ne volonte akceptis tiajn lingvojn. Tial ne estas verŝajne, ke la ĉefaj nacioj akceptos en konsento iun modernan nacilingvon, ĉar tia elekto donus neĵustan avantaĝon kaj naskus ĵaluzon, negrave kiom nepartiemaj estus la elektantoj de la koncerna lingvo. (3) Inventitaj lingvoj, konstruitaj laŭ sciencaj principoj kaj uzeblaj en multaj diversaj agkampoj, estas efektivegeblaj por internacia komunikado. Ili estas neŭtralaj kaj pli simplaj ol la plimulto de la naciaj lingvoj. Restas decidota la demando, kian helpajn lingvon tiaspecan la mondo fine akceptos per internacia konsento.

Por internacia komunikado kaj libera fluo de ideoj, estas deŝirinde, ke akademiaj (1), krom sciencaj kaj komercaj organizoj, helpas akceli la movadon al iu ĉie-akceptita helplingvo. En raporto pri postmilita universitata edukado, jam pritraktis la demandon komitato de la British Assocn. Ĝi rekomendis, ke tute ekster pure erudicia studado de lingvoj kaj literaturo, ĉiu universitatano kapablu paroli kaj skribi iun internacian helplingvon. La komitato sugestis, ke pri tiu afero povus fari utilan raporton la Officejo de Universitatoj de la Brita Imperio en konsulto kun la Amerika Officejo de Universitatoj kaj la Asocio de Universitatoj Profesoroj kaj Lekciistoj de Aliancaj Nacioj en Granda Britujo. Ne ekzistas pli efika interrilatigilo por la popoloj ol simpla komuna lingvo. La konstruo de tia lingvo estus supozinde ne tro malfacila por la kapabloj de respondecaj aŭtoritatoj---literaturaj, sciencaj kaj komercaj---kune laborantoj en komuna kaj necesa tasko.

Tradukis F.R.BANHAM.

Remarkoj de la Tradukinto: Ni atentigas pri tio, ke jam en la jaro 1852 Roget en sia "Thesaurus" esence skribis la penson de la lasta paragrafo supre. Vidu LA RONDO Julio 1942. Postulis 90 jarojn tio, ke la British Ass. alvenu la saman konkludon! Vidu ankaŭ "Whither Philology?" (Suda Kruco Junio, '34). (1) "Academic" en la Angla havas kelkajn signifojn. La Plena Vortaro de SAT ankaŭ levas avertan fingron pri ĝi. Mi supozas, ke la vorto en la teksto signifas "spirite kulturaj, literaturostudaj, humanismaj."

PECO DE KAUCUKO estas tre elasta, sed ne perfekte, ĉar pro streĉo ĝi restas plilongigita. Male, vitro estas perfekte elasta, ĉar ĝi retenas neniom da daŭra kurbiĝo. Kiam tirita en formon de maldika fadeno, ĝi povas esti multfoje ronde-tordita sur sia akso sen rompo; kiam oni ĝin liberigas, ĝi ĉiam revenas al la komence punkto.

ESPERANTISTOJ FLUGAS de EUROPO al AUSTRALIO. (Daŭrigo)

V. Kvina Tago: Jodhpur - Allahabad - Calcutta - Rangoon.

Nur mallonga estis nia nokta ripozo en Jodhpur, la ĉefurbo de Marwar, kio originale signifas "lando de morto". Ĝia suvereno Maharaja Umed Singhji estas supermoderna princo, vigla motoristo kaj entuziasma aviadisto, kiu konstruigis ankaŭ la aerodromon kaj nian luksan hotelon. Jodhpur kaj ĝia griza kaj timiga citadelo, situanta sur roko, estis fonditaj en 1459 de Rav Jodhaji, kiu donis la nomon al la urbo; ĝi vidis multe da gloro kaj multe da krueleco. Ĉiu el la sep ĉef-pordegoj rememorigas pri unu venkita malamiko najbara. La sepa pordego montras la skarlatajn impresojn de multaj delikataj manoj. Ili estas la malgajaj postsignoj de vidviniĝintaj princinoj, kiuj eliris la citadelon tra ĉi tiu pordego por ĉiam, por morti sur la brulŝtiparoj de siaj princaj edzoj.


Ekstere de la urb-muroj estas ĉarma zono de ĝardenoj kun la vilaoj de la Maharaja familio kaj eŭropaj enloĝantoj. Sed interne de la urbo mem regas vere tipa Hinda vivo: ĉaroj tirataj de virbovoj, ŝarĝitaj kameloj, sanktaj bovinoj, svarmoj de malpuraj infanoj, pariaj hundoj, kaj florantaj arboj, oraj temploj, fakiroj kaj almozpetantoj---ĉio tio impresas niajn okulojn, orelojn kaj precipe niajn nazojn.

Nur mallonga estis nia nokta ripozo en ĉi tiu urbo. Jam duonon post la tria ni elĉitigis kaj ne estas eble, sufiĉe ĝui la bonegan matenmanĝon prezentitan de nigraj manoj. Duonon post la kvara ni adiaŭas al Jodhpur; estas ankoraŭ absolute malhele, kaj dum longa tempo ni povas admiri nur la vastan hindan firmamenton ornamitan de miloj da steloj, ĝis fine ni ekdormetas.

Du horojn poste ni vidas sub ni, je nia granda surprizo, pejzaĝon tute malsaman al tiu de la antaŭa tago. Jen grandaj riveroj kaj rizkampoj, urbetoj kaj vilaĝoj, brutaroj kaj putoj prezentas multkoloran aspekton. Iam kaj iam ni perceptas rokajn montojn, kiuj abrupte kaj krute eliĝas el la ebena. Oftfoje ni superflugas la serpentumantajn branĉojn de la Ganges-rivero, kiuj faras tiom fekunda ĉi tiun vastan, dense surloĝatan kaj ĉarmegan regionon.

Je la oka matene ni alvenas en Allahabad, "la urbo de Dio", kiu situas ĉe la kunfluo de la du sanktaj riveroj Jumna kaj Ganges. La urbo, kiu estas ankaŭ hindua pilgrimejo, disponas pri unu el la plej famaj universitatoj de la lando. La riveroj kaj ties bordoj estas nigraj de pilgrimantoj el ĉiuj centraj provincoj de Hindujo. Grandajn distancojn ili pie tramigras, por fine bani sin ĉi tie en la sanktaj, purigaj akvoj.

Post mallonga paŭzo ni ekflugas sud-orienten kaj baldaŭ atingas le ebenon de Bengal kun miriadoj da vilaĝoj, urboj, ŝoseoj, verdaj kaj brunaj kampoj, trembrila akvo---sunriĉa, vasta, ege fertila. Tie situas Calcutta, la dua-granda urbo de la Brita Imperio. Tute proksime komenciĝas la delto de la Ganges, regiono de riveroj pec-



A-Allahabad. AM-Arakan Montaro. C-Calcutta. H-Hyderabad.
J-Jodhpur. M-Mulmein. R-Rangoon.

igantaj la landojn en etajn malhele verdajn striojn. La multnombraj riverbranĉoj trafluas mangrov-marĉojn laŭ flavaj ŝlim-rifoj kaj fine enfluas en la Golfon de Bengal.

Proksimume je la unua posttagmeze ni alvenas en Calcutta kaj ĝuas la tagmanĝon en la feŭdala hejmo de la Aviadisto Klubo. Niaj okuloj vagadas eksteren admirante la riĉan tropikan vegetaraĵaron, kiu dense ĉirkaŭas la aerodromon. Estas la unua fojo, ke ni spertas ĝin---antaŭ ĉi tiu fea vojaĝo ni ja eĉ ne estis vidintaj palm-arbojn---sed de nun ĉi tiu sovaĝa vegetara abundo apartenas al ĉiu pejzaĝo de nia flugo, ĝis ni atingos Aŭstralion. Baldaŭ ni devas adiaŭi. Bedaŭrinde ni ne povas vidi la interesan urbon mem, sed najbare al la flughaveno vidiĝas la bone konata municifabriko Dumdum, kies pafaĵoj estas ŝatataj en la tuta Imperio.

Forlasinte Calcutta je la 1-a ni superflugas la delton de la Ganges kaj Brahmaputra dum longa tempo; kun larĝeco de 300 mejloj ĝi aspektas kvazaŭ senlima kaj vere reprezentas la plej vastan delton de la tero; ĉie nepenetreblaj arbaroj ŝajne dronas en la amasoj da akvo. Post unu plua horo ni troviĝas super la Golfo de Bengal, kies muantajn ondojn ni superflugas en alteco de nur kelkcent futoj; ĉar pli alte minacas nigraj pluvo-nuboj kaj ventopuŝoj. Tamen baldaŭ flua pluvego ĉirkaŭas nin kaj la vento malĝentile skuas nian aviadilon, ĝis ni grimpas pli kaj pli alten, kie ni trovas kvietan aeron super la nuboj. Densegaj praarbaroj preskaŭ tute kovras la bordon de Burma, kiun ni nun atingas, kaj la Arakan Joma montaron.

Transfluginte ĝin kaj la Irawaddy riveron ni ekvidas jam de malproksime la gravan riz-havenon Rangoon kun ĝia mondfama ora pagoda triumfo brilanta en la suno. (Laŭrigota)

-----P. SCHWERIN

SOLDATOJ POSTENIGITAJ EN HINDUJO HAVAS PROPRAJN INDIGENAJN SERVISTOJN. de Thomas Sheehy, (Ordinara soldato)

Usonaj Soldatoj ordinaraĵoj en Hindujo kaj Afriko, laŭ raporto eltrovas rimedojn kaj metodojn plimoligi la vivon, kiujn dum jam longa tempo konas la "Tommies" (Britaj ordinar-soldatoj). En Hindujo, precipe, la Brita soldato vivadis en ĉirkaŭ militeknizistado. Haveblaj al "Tommies" estas la servoj de indiĝenaj portistoj, kies sola devo estas atenti la bonstaton de iliaj mastroj.

Eĉ antaŭ ol la Hindu ekvalenteco de veksignalo pelas la "Tommy" al la devoj de la tago, lia servulo laboras por fari lin deĉe aspekta. Li razas sian mastron, lite, kun tiel malmulte da ĝeno kiel eblo; poste li revenas kun la matena taso de teo; poste li helpas al la soldato sin vesti kaj sin ekipi por la devoj de la tago.

Fine, post kiam la "Tommy" estas irinta por atenti siajn devojojn, la servulo briligas ekstraĵojn, ŝuojn, poluras butonojn, gladas uniformojn, kaj transdonas malpurajn vestaĵojn al la "Dhobi Walla," la postena lavisto. Ĉiu deziro de lia mastro estas prizorgita; kaj por ĉiuj ĉi tiuj servadoj, la indiĝeno ricevas la princan salajron de 8 "annas", aŭ proksimume 16 cendoj, potage.

Malsufiĉa kiel ĉi tiu salajro ŝajnas esti, ĝi estas tiel zorge reguligita, kiel tiu de la anoj de iuj ajn Usona laboristoj unuiĝo. Ekzemplo de tio, kiamaniere la hindu prizorgas siajn viv-normojn, rimarkiĝis antaŭ nelonge en granda posteno. La posteno ricevis grandan kontingenton de repleniguloj. La duan semajnon la nutraĵo iĝis tiel malbona, ke ĝi estis nemangebla. Plendo sekvis al plendo sed la videbla kialo ne estis tuŝita. Fine la malnovuloj eĉ la posteno klarigis, ke tio ĉi estas la maniero per kiu la indiĝenaj kuiristoj protestis la fakton, ke la novaj soldatoj pagis 12 "Annas"jn po tago al siaj servistoj. Kaj, vere, tuj post kiam la soldatoj malpliigis la salajron de siaj servistoj, la manĝaĵoj iĝis tiaj bongustegaj, kiaj iam ajn karesis la palaton de malsatiga soldato.

Eĉ tiom prizorgata, la "Tommy" tamen ne havas "piknikon". En iuj regionoj, la varmo estas tiel intensa dum la tuta tago, ke la soldatoj devas ellitiĝi kaj ekzercadi de la tria horo ĝis la sesa antaŭtagmeze. La suno, se ili senŝirmigis konstante kontraŭ ĝi, pelus ilin en frenezecon. ("The Beam", Atlantic City, N.J.)

DEMOSTENO tiel amis la historion verkitan de Tukidido, ke li okfoje kopiis ĝin, por ke ankaŭ li havu tian stilmajstrecon.

DOMMASTRUMADO LA "RED-TAPE" (trorutineco)

Pro la modernaj tendencoj de tiu ĉi lando, kaj kiel geston de bonvolo al la nacio, mia edzino kaj mi prezentis "Red-Tape" sistemon en nia domo. Nun, la domo estas tute administrata laŭ "Red-Tape". Vi ekmirus pro la sistemo. Antaŭe, laŭ nia simpla kaj elmodiĝinta metodo de dommastrumado, ni opiniis nian domon sufiĉe granda por du, sed nun rapide evidentiĝis, ke pli da spaco necesas por la---Red-Tape. Do ni ekokupis la du domojn ambaŭflanke, forigis la dividajn barierojn kaj konstruis kabanojn ĉie en la korto. Tiam ni oficejigis niajn litĉambrojn kaj salonon, dungis publikan serviston (1), ankaŭ tajpiston kaj ĝenerale Red-Tape-igis la tutan lokon.

Post du-tri semajnoj, per freneza misorganizado, ĉio bone funkciis laŭ "Red-Tape". Tiam nia domanaro konsistis el:

Ĝenerala Direktoro de Domaferoj (mi)
 Ĝenerala Subdirektoro de Domaferoj (mia edzino)
 Estro de la Kuirejo
 Proviz-Komisiito
 Rub-Inspektoro
 kaj unu servistino.

Krome, ni havis Dom-Direktantaron de Kontrolo kune kun Konsila Komitato, ankaŭ du-tri spertajn konsilistojn por konsili al la Konsila Komitato. Plue, estis subkomitatoj troviĝantaj en ĉiuj ebaj lokoj.

Kvankam mi profunde monŝuldas kaj devas prunti de parencoj por daŭrigi ĉi tiun aferon, ja indas tia stato, tial ke la sistemo multe sukcesas. Ekzemple:

Supozu, ke ni bezonas pli da sukero---la servistino raportas la aferon al la Proviz-Komisiito, kiu telefonas al tri-kvar spicistoj kaj akiras prez-proponojn por "sukero, blanka, 2 funtoj da". Li zorge skribas tiujn ĉi prez-proponojn en unu el niaj specialaj Mang-bezon-Folioj (bluaj kun rozkoloraj marĝenoj) kaj donas ĝin al la Proviz-komitato por ekzameno. Kun la krajonaj komentoj sur la tri kopioj ili estas donitaj al la Financ-Administristo, kiu faras opinion pri tio: ĉu aŭ ĉu ne estas sufiĉe da mono por ĝin aĉeti, kaj laŭe ĉefliterumas subskribe. La Estro de la Kuirejo faras raporton: kial ne estas sukero---kiu uzis ĝin---kial---kaj rekomendas, ke pli da sukero estas necesa. Kiam la folio portas la ĉefliterojn de mia edzino kaj ripozas sur mia skribtablo du-tri tagojn, mi fine subskribas mian aprobon laŭ la markita linio ĉe la paŝfino. Tiam, eble, ni akiros pli da sukero.

La tuta sistemo estas tiel simpla, ke ni ne scias, kial ni ne elpensis ĝin antaŭ longa tempo. Vere la ŝtataj departementoj instruas multon al la homoj.

Ni petas prezproponojn por domtaskoj, kiaj kuirado, telerlavado k.t.p. Ni havas speciale difinitan direktantaron, kiu prizorgas tiun ĉi parton. Ili ankaŭ ricevas konsilon de sub-

komitato, kiu faras mirige senutilajn raportojn, kiujn neniu ĝenas sin rimarki. Neniu estas maldungita, ankaŭ neniu kulpigas pri eraroj, ĉar ekzistas perfekta sistemo de reciproka kulpigado, laŭ kiu oni neniam eltrovos la erarinton. Kvankam la servistino estas la sola persono kiu laboras utile, tamen ĉiu alia havas imponan ateston por certigi min pri sia utileco.

Nia sistemo de dungado ekzakte konformas al Red-Tape metodo. Nia Estro de la Kuirejo estas piano-akordiona ludisto, kaj kvankam li ne havas scion pri kuirejoj li ja bonege ludas la pian-akordionon. Plue, li estas la bofrato de la onklo de mia edzino. Nia Proviz-Komisiito havas longan kaj honoran karieron kun la Akvo kaj Kloaka Departmento; ankaŭ li estas la sekretario de nia loka tablotenisa klubo---tiaj ecoj devus sufiĉi por iu Red-Tape ofico. Mia edzino dungis la viron, kiu nun estas nia Financ-Administristo. Li ne havas scion pri financo, sed li kontentigas nin, ĉar lia nomo havas belan ĉefliteraron. Lia laboro pleje konsistas en ĉefliterumado, do ni ne rajtas plendi. Jen la lasta problemo: Ni devos dungi kuiriston la proksiman semajnon, kaj ni ne povas decidi, ĉu dungi tre bonan plumbiston (kiu estis klasano kun mi) aŭ mezaĝan viron (patro de la servistino), kiu tenas la plej mirindajn diplomojn pri internbrulaj motoroj. (El "Coburg Courier")

-----JEAN HALES (trad.)

A.E.A. AFEROJ.

GRATULON al S-ro G.Chatterton (Tas.), kiu gajnis la diplomon de B.E.A. kun honoro. Al ~~Sydno~~ Esp. Societo, kies Cseh-Metoda Kurso jam bone progresas. Al "Australian Democrat" pri letero en la Bundaberg (Qld) "News Mail."

ADRESARO. Kelkaj ŝanĝoj atingis nin tro malfrue por aperi en la nova Jarlibro. Bonvolu ĝisdatigi vian ekzempleron aldonante la jenon:- Paĝon 23---Sn A.Groeneweg, 3 Kent St. Toowoomba. Qld. 22---Sn T.B.Freeman, Monreagh, Columboola, Western Line, B. 18---Sr W. Cowley, 381 Malvern Rd., Sth Yarra. A.R.

Aldonu al la nomo la sekvantan mallongigon:- 21---Towsey -L 23 broadie -L---21 Woolnough -R.

Ŝanĝu la jenajn mallongigojn:- 22 Wanmer, P-B al B---Kidd, VP-B al P-B---Suess, B al VP-B---Sn Sycamore, B al VP-B---24, Masel, W al P-WL, Dr. Caldera, Wl al SK-WL.

Notu:- Paĝon 21, Brisbane Esp. Society, La nova Prezidanto estas S-ro Clement Kidd, la Kasistino estas Fn R McPherson. Paĝon 23, Esp League of W.A. devus esti Western Australian Esperanto League. Post KV, aldonu:- Room 16, Bacton House, 723 Hay St., Perth. P. Sr I Masel. Sk. Dr. C.J.Caldera.

DONACO. Danke ricevita por malpliigi la koston de la Jarlibro,

S-ino A.C.Hintze 2/-

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de membro kun La Rondo, F-ino Lambert; S-ino Crockett, S-roj Cowley, R.Lees, Hearne, A Thompson, Meehan, Pfahl, D-ro S.J.Woolnough (2 jaroj)

KOTIZOJ. A.E.A.---membro kun La Rondo 5/-, La Rondo al nemembroj, 3/6. I.E.L.---Jarlibra Membro 5/-, Membro Abonanto 10/-. Pagu I.E.L. kotizojn al S-ro L.E.Pfahl, 64 Brighton St., Croydon N.S.W.

Sur postbileto NE enskribu nomon de la urbo en kiu oni kon-
tontos ĝin.

9.6.43.

G.H.HILLERMAN, (sekretario)
Box 75, Devonport, Tasmania.

KVINSLANDO---^{de Espo}Samideano H.W.Buswell, de Adelaide, kiu freŝdate estis en Brisbane, donis al tiuurbaj Esp-istoj interesan paroladon pri uzado en la Meza Oriento. La vizitanto estis honorata gasto ĉe feliĉa festo posttagmeza je la antaŭurba bieno de Ges-roj J.Traill.

Ĉe posttagmeza teo de Ithaca Klubo Lignapilka S-ro Wanmer parolis pri Esperanto. Kelkaj el la klubanoj estas eksestroj de ŝtataj lernejoj, kaj montris scivolemon pri la internacia lingvo. La prezidanto, S-ro A.B.Cooks, antaŭ jaroj estis sam-o en Adelaide.

La artikolo pri-Esperanta en "Queensland Countrywoman" altiris novan membron al la Kvinlanda Societo---S-ino T.B.Freeman, Monreagh, Columboola. S-ino J.W.Langtree, de Bundaberg, skribis al sia urba "News-Mail" pri Esperanto, kaj iu sendis leteron kiu sugestis uzadon de ĝi en internaciaj komunikadoj post la milito.

lignapilkludanto--bowler (laŭ Vortaro Rhodes); bulludanto' (!!)
laŭ Fulcher-Long; pilkrulanto, laŭ Edinburgh.

----- LINGVAJ NOTOJ.

"Ĉi." Leganto skribas....mi tute ne ŝatas uzadon de ĉi sen montra vorto. Mi ofte legas en Aŭstralio "en ĉi lando" aŭ "en ĉi urbo". La formoj estas malklaraj, ĉar povas esti "en ĉi tia lando" aŭ "en ĉi tiu lando." Prof-o Göhl skribas tiurilate: Ofte oni uzas ĉi sen tiu k.t.p., ekzemple ĉi-kaze, ĉi-rilate, ĉi-apude, ĉi-kune....Sed ne troigu tion, kaj precipe oni ne uzu ĉi senpere en interligo kun substantivoj, ekz. ĉi homo, Tiu uzo de ĉi estas neaprobinda "evoluo" en Esperanto.

S-ro Gordon skribas:- Pri la uzo de ĉi en la senco de ĉi tie rimarku, ke oni ne povas adjektivigi ĝin por signifi ĉi-tiea, ĉar ĉia estus dusenca.

En la Fabeloj de Andersen, Zamenhof uzis "ĉi" anstat. "ĉi

tie" kelkajn fojojn. "Neniu mazageno ĉi estas!" vol.1, 75. "Ĉi ne estas akvo." p.96. Ankaŭ 108; vol.II, 56, 66, 118, 121, kaj aliloke. Ni ne povas citi Zamenhofan uzon de ĉi anstataŭ ĉi tiu, sed Grabowski en "Sinjoro Tadeo" foje tiel uzis: ĉi homo; ĉi pagas, tiu ŝargas. En la poezio tiaj uzoj povas esti oportunaj, kaj ni vidas en ili nenian kontraŭ la Fundamento.

KVINSLANDO, REĜINLANDO? En la ĵus eldonita Jarlibro de A.E.A. trovas sin "Reĝinlando" kiel Esp-igaĵo de "Queensland". Tiu uzado prezentas strangan deflankiĝon for de la komuna lingvovojo. Fulcher & Long, Rhodes, Jung donas "Kvinslando", kiu formo jam en trā frua tempo adoptiĝis por "Queensland". La jarlibro de la U.E.A. kaj I.E.L. tamen uzas la ne-Esperantigitan nomon. Koncerne la sencon, "reĝlando" laŭ Millidge signifas "kingdom, monarchy"; laŭ Plena V. de SAT "lando regata de reĝo." Do "reĝinlando".....

En la sama eldonaĵo sin trovas "certigaĵo" por "certificate". La prefero estas tiom pli nekomprenebla, en tio ĉar la vorto "atesto" staras sur ĉiu diplomo de la B.E.A. Millidge kaj Plena V. SAT donas "atesto". "Atestokarto", aŭ "-dokumento", ankaŭ estas bona.

de Rev. C.C.COWLING. Iom stranga mi trovis vian tradukon en la Junia Rondo: Lord Mayor--- Ĝefurbestro. Ĉu iu "Lord Mayor" ne estas "Mayor de reĝe rekonita civito"? Ŝajne estas neeble traduki tradiciajn titolojn. Kiel ĉiam la Junia estas leginda numero

NU, TRADUKEMULOJ.

Pri (9) la malnovaj sencoj, kiujn havis la nomoj de la teatraj sidpartoj, tute ne validas por kinejoj. La "Dress Circle" teatre troviĝas en la antaŭa parto kaj, precipe ĉe gravaj prezentaĵoj, estas okupata de homoj pli-malpli eleganta vestitaj speciale por tiaj aperoj. La Germana "der feine Zirkel" (la eleganta cirklo) estas signifa. La "stalls", pli fore de la scenejo, tre ofte estas rezervitaj foteloj, je malpli kostaj biletoj ol la "D.C." Kinejo la "D.C." estas ordinare kurbliniaj seĝvicoj en balkono super la "stall"-vicoj ternivelaj. Estus stulte, uzi la samajn terminojn por la Opera Domo en Milano kaj kinejo en mizera kvartalo.

- (1) Kiel fulme brilas liaj eklumoj de spirita sinmontro!
- (2) Tio estis nur mallongedaŭra sukceso, sed finfine li firme
- (4) Jen neagraba afero! (sukcesis.
- (3) Li, facilanimulo, senĝene indiferentas pri la aferoj de la mondo.
- (5) Mi devis aperi (antaŭ ĉefuloj) por prirespondi plendon.
- (6) Li ja trafis en malfeliĉon.

- (7) Ŝi malbone impresas min per siaj pozaĉaj (bontonaĉaj)manieroj.
 (8) Li tre inteligente lernas.
 (9) Mi estis en la "dress circle", li en la "stalls", kaj mi ne povis renkonti lian rigardon.

TRADUKU: (1) That cooked his goose for him.
 (2) She put on her parlour manners.
 (3) She looked down her nose.
 (4) I'm in ever such a pickle!
 (5) He is given to sitting on the fence.
 (6) That's not every man's beer and skittles.
 (7) He was but a shadow of his former self.

VORTAROJ? S-ro E.Peck, Box 5, Kalbar, via Ipswich (Q) volonte aĉetus ajnan Esp. vortaron. Bv. skribu al li.

NEKROLOGO - S-RO G.W.CARD. Kun profunda bedaŭro ni eksciigis pri la morto de S-ro George W. Card. Nia maljuna samideano frue aliĝis al A.E.A. kaj de 1940 li estis I.E.L. Delegito ĉe Collaroj, N.S.W. Al ĉi tiu Asocio li testamentis siajn Esperantajn librojn.

KASO de la RONDO.

		£	s	d
Konta Transpreno	£1.11.5	Papero.....	1.	2.-
F-ino T.Bartley.....	3.6	Ŝablonaĵoj.....	13.	4
Gesroj Cowling.....	7.-	Luo.....	5.-	
S-roj Fillerman, Cowley.....	7.-	Bindpingloj.....	1.6	
S-roj Saar, Hudson, Pfahl....	10.6	Inko.....	12.6	
S-roj E.Mackenzie, Slavoff..	7.-	Kurso.....	2.8	
S-inoj Hintze, Hewison.....	7.-	Okazaj elspezoj....	3.6	
Deaconess Magarey.....	3.6		<u>£3. 0.6</u>	
S-roj Lapham, Cave.....	7.6			
S-inoj Hintze, Westbrook,		En la Kaso £2.2.1		
Hill. kurso.....	7.6			
S-ro Schwerin. kurso.....	3.-	La Rondo 3/6		
F-ino Rosengrave.....	3.6	La Kurso 3/-		
B.E.S.....	3.-	Duobla Kotizo (A.E.A. kaj		
Vendoj.....	1.2	Rondo) 5/- jare.		
	<u>£5. 2.7</u>			

(F-ino) W.ADDIS Kasistino. 25 Greville Ave, Flinders Park,
 ADELAIDE, S.Aus.


LUDOJ, ESPERANTE.

De soldata leganto ni ricevis priskribon de kelkaj kartludoj Esperante, kiuj, ni opinias povus esti instruecaj kaj amuz-donantaj al Klubkunvenoj dum la vintro. Por ke lernantoj, tiel bone kiel progresintoj, povu ili facile kompreni, ni angle prezentas ilin. Posb klarigo kiel pretigi la kartludojn, ni nun donas du, kaj en nia Aŭgusta numero, "USARO," kiu estas iom pli komplika.

Kiel pretigi la kartludojn:-

Take a pack of 52 cards (or pieces of cardboard if more convenient) and mark them as follows in two opposite corners:-

Letter	Number of cards	If marking playing cards use	Letter	Number of cards	If marking playing cards use
A	4	Aces	K	2	Sevens
B	2	Nines	L	1	Threes
C	1	Five	M	2	Sevens
$\hat{C}$	1	Five	N	2	Sixes
D	2	Nines	O	4	Jacks
E	4	Kings	P	1	Three
F	1	Four	R	1	Three
G	2	Eights	S	2	Sixes
$\hat{G}$	1	Four	$\hat{S}$	1	Two
H	1	Four	T	2	Fives
$\hat{H}$	1	Four	U	4	Tens
I	4	Queens	$\tilde{U}$	1	Two
J	2	Eights	V	1	Two
$\hat{J}$	1	Three	Z	1	Two



It will be noted that high-ranking "Playing Cards" have been given the more frequent letters, e.g., Aces have been marked with the letter A, while the Twos share the letters SUVZ. But this will not affect the games.

WORD PATIENCE. Shuffle the cards thoroughly. Deal one row of ten cards face down. Deal two more rows of ten cards on top of the first row, face down. Deal a fourth row, face up, on top of the previous rows. Place remainder of pack, face down, on the table near you. This is now called the Primary Pack. Turn over the top card of the Primary Pack, to start a secondary pack, face up.

PLAY. Collect from all the 11 cards turned up, those letters that form a root word, suffix, prefix, or complete word, and place them aside as winnings.

Turn up the cards on top of the piles from which cards have been taken. If the secondary pack has NOT been exhausted, continue to build more words immediately. If it has been exhausted, turn over the top card of the primary pack and proceed as before.

If all 4 cards are taken from any of the row of piles, each empty space will be filled by a card from the top of the secondary pack; if this is exhausted, from the top of the primary pack. Then turn another one over to commence the secondary pack again. When both primary and secondary packs are exhausted, spaces in the row of ten piles may be filled by any of the upturned cards and the next card on that pile may then be turned up. Continue till you cannot make any more words.

WIN. If you have made words out of all 52 cards, you have won. If you have 5 or less cards still unused the game is drawn.

TO PLAY COMPETITIVELY. Have a dictionary at hand as Umpire.

The dealer plays the ordinary game. The opponent challenges every word or affix the dealer makes. If the dealer can give the correct meaning, he retains the cards, otherwise his opponent takes them, provided he can give the correct meaning. If neither can give it, the cards are discarded. At the end of the game, each player scores one point for each card he has won. For the second game, the dealer becomes the challenger and so on.

WIN. The player with the higher score after 4 games wins.

KVIN KVIN PATIENCE. Object:- To form a square of 25 cards(5 on each side) in such a way that reading from left to right and from top to bottom, the cards form affixes, roots, or complete words.

PLAY. Place the first card face up on the table. Place each successive card where it will best help to build affixes or words both down or across. The only condition governing the position of each card is that it touches another card (already on the table) at its side, end or corner. E.g., the following numbers indicate the order in which the cards were played.

SCORING:- Count one point for every card forming a word or affix in any line or column.

Possible score	50
Pass if you score	25
Good " " "	35
Excellent " "	40

	1	2	
4		3	5

Numbers 1,2,3, and 4 are placed correctly, but not 5.

EXAMPLE

T	A	B	L	O
R	E	M	I	S
A	S	A	N	E
N	O	T	E	P
K	D	F	S	A

5 score
5 across

score		18
down	3 0 3 4 4	14
Total score		32

Now try to beat your first score, using the remainder of the pack except the last two cards.

To make the game competitive, each player takes half the pack, each building his own square. Each player checks his opponent's score and may challenge the meaning of any affix etc. claimed by the builder, who loses one point for every letter in any affix etc. for which he cannot give the correct meaning. The players alternately re-shuffle the full pack before commencing the next game.

WIN. The higher score at the end of 4 games is the winning score.

TRADUK-KONKURSO 2.

Laŭ speciala cirkulero forsendita nur Grupoj kolektive povas partopreni.
TRADUKOTA TEKSTO.

Whenever we went down to play on the banks of this stream, the fresh penetrating scent of the moist earth had a strangely exhilarating effect, making us wild with joy. I am able now to recall these sensations, and believe that the sense of smell, which seems to diminish as we grow older, until it becomes something scarcely worthy of being called a sense, is nearly as keen in little children as in the inferior animals, and, when they live with nature, contributes as much to their pleasure as sight or hearing.

I have often observed that small children, when brought on to low moist ground from a high level, give loose to a sudden spontaneous gladness, running, shouting, and rolling over the grass just like dogs, and I have no doubt that the fresh smell of the earth is the cause of their joyous excitement. (W.H. Hudson: "Far away & long ago.")

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.8.43. P.E.SCHWERIN, (Adreso) Flat 1, Carabella Flats., McDougall St., Milsons Point. N.S.W.

ERAROJ en la Junia numero: p.290, 9 de la malsupro: duonhoro. 8 de la malsupro, antaŭa; p.291, 17 verŝan 292, 4, Prezidantino, 3, aranĝos. p.298, Ich stand in dunkeln...

SYDNEY "Bulletin" de Apr. 7 enhavas leteron pri Esperanto "Need for a Universal Language." D.M.H. (Q)

"RENOVIĜO" (Meksiko) Majo 15, informas, ke, malgraŭ la milito ankoraŭ NE estas cenzuro por la gazetoj, nek malpermeso de Esperanto-uzo. Do, S.A.T. eraris. Bone!

De LEGANTO. Mi tre ŝatas legi en La Rondo la paĝojn "Por Komencantoj." Dum pli ol 30 jaroj mi provis ellerni la lingvon, sed ofte en "Por Komencantoj" mi trafas ion kiun mi ne renkontis en aliaj avizoj por la lernanto.

The ACTIVE PARTICIPLES end in -anta, -inta, -onta, for present past and future respectively--SKRIBANTA, writing; SKRIBINTA, having written; SKRIBONTA, about to write, or going to write. They can be singular and plural and accusative, and can also be nouns by substituting O for the adjective endings. LA LEGANTO, he who is reading, LA DANCINTOJ, the persons who have been dancing; LA LUDONTO, he who is going to play. But do not confuse this with the suffix -ist, which is used only for people who habitually do a thing:- LA ŜTELISTO, a habitual thief, a thief by profession, but a ŜTELANTO is one who is stealing merely at the moment of speaking, perhaps he never stole before and never will again.

By substituting E for A, we can get adverbial forms. FININTE LA LABORON, having finished the work; AĈETONTE LIBRON LI PRUNTIS TRI ŜILINGOJN DE MI, being about to buy a book, he borrowed three shillings from me.

Compound tenses are formed with the verb ESTI---MI ESTAS VOJAGANTA, I am travelling. When using ESTI with the participle, you must be careful to have both ESTI and the PARTICIPLE each in its right tense to express, when combined, what you want to convey. MI ESTAS VOJAGANTA, I am travelling (now); MI ESTAS VOJAGINTA, I am have-travelled, i.e., I have travelled; MI ESTAS VOJAGONTA, I am about-to-be-travelling, i.e., I am going to travel.

To use ESTIS and ESTOS, you need a little imagination plus commonsense. ESTIS:- Substitute ESTIS for ESTAS in the above examples and put your mind into the past. Were you at that time actually doing it? That would be MI ESTIS FARANTA ĜIN, I was am-doing-it, i.e., I was doing it. Similarly, MI ESTIS FARINTA ĜIN, I was have-done it, i.e., I had done it; MI ESTIS FARONTA ĜIN, I was about to do it.

Similarly with ESTOS, think of some future time and substitute ESTOS for ESTAS. MI ESTOS FARANTA ĜIN, I shall be am-doing-it, I shall be doing it, MI ESTOS FARINTA ĜIN, I shall be have-done it, or I shall have done it, MI ESTOS FARONTA ĜIN, I shall be going to do it.

To form the Passive Participles, you simply drop out the N in the active forms, and all the rest applies. SKRIBANTA, writing, becomes SKRIBATA in the passive, i.e., being written. LA VIKTIMOJ ESTAS KOLEKTATAJ, the victims are being collected; LA SKLAVOJ ESTIS PUNITAJ, the slaves had been punished; LA LABORANTOJ ESTOS REKOMPENCITAJ, the workers (will be have-been-rewarded) The workers will have been rewarded. But to avoid these somewhat cumbersome forms, the impersonal pronoun ONI is often used with the active participle. ONI KOLEKTAS LA VIKTIMOJN ONI REKOMPENCAS LA LABORANTOJN. ONI means "one"---ONI NE DORMAS EN LA VOJO, one does not sleep in the road. Sometimes JAM ANTAŬE is used to express something that had happened before the time being spoken of, NI IRIS POR ORNAMI LA PREĜEJON, SED KIAM NI ALVENIS, ONI JAM ANTAŬE FARIS ĜIN, we went to decorate the Church but when we arrived, it had

already been done---literally one already previously did it.

There is another way in which Eng. and Esp-o differ in the tense used; we say "I met Miss Smith and she said she was well." But if you think that over, you will realise that Miss S. did not say she was well, she said "I am well," i.e., she used the present tense, and so does Esp-o. MI RENKONTIS F-INON S. KAJ ŜI DIRIS, KE ŜI ESTAS SANA. Similarly, the future tense. We say "I will see you when you are ready, Esp-o says MI VIDOS VIN KIAM VI ESTOS PRETA.

Sometimes in Eng. we use a verbal form as an adjective, we say "She is charming"; in Esp-o this is not done. If we were to say ŜI ESTAS ĈARMANTA we should be using an active verb and require an object:- ŜI ESTAS ĈARMANTA LIN, she is charming him. The translation of She is charming in our Eng. sense would be ŜI ESTAS ĈARMA.

When DE follows the past participle, it always means by. ŜI ESTIS TROMPATA DE LI, she was being deceived by him.

-ANTO and -ISTO describe people who do certain things, but the suffix -UL describes people who are certain things:- AVARULO, one who is avaricious, a miser; MALSANULO, one who is ill, an invalid; KARULINO, one who is dear, a darling.

The prefix GE- denotes both sexes together and is always used in the plural. OBEU VIAJN GEPATROJN, obey your parents; GEFRATOJ, brothers and sisters; GESINJOROJ, ladies and gentlemen; GES. SMITH, Mr. and Mrs. Smith.

Prepositions can be used as prefixes. ENVENU! Come in! PRI-SKRIBO, description, SUBSKRIBO, signature; MI SURMETIS ĈAPELON, I put on a hat. NI KUNLABORAS, we work together. Sometimes the preposition is repeated for the sake of clarity---NI PRIPENSAS PRI LA KOSTO, we are thinking about, or considering, the cost. PRETERFASI, to pass beyond---ŜI VIDIS MIN, SED ŜI PRETERPASIS MIN.

ZAMENHOF liked the English language, and used many roots derived from it, but you must not take that for granted. Ekzemple, (for example) PIGO is not a pig, it is a magpie! LARDO is not lard, it is bacon, and PORKO is not pork, it is a pig!

This is how the numbers are combined:- cent du, 102; DUCENT, 200, TRICENT, 300 etc. OKCENT KVINDEK SES, 856, (one word for each figure). DU MIL, 2,000, SES MIL SES, 6,006, OK MIL TRICENT TRIDEK KVIN, 8,335. These numbers do not take the accusative form. MI HAVAS KVAR SAFOJN KAJ UNU KAPRON, I have...4 sheep...one goat.

But NULO, nothing, and MILIONO, a million, do take the accusative because they are nouns. HAVI NULON ESTAS MALGAJA SORTO, to have nothing is a sad fate. MI VIDIS DU MILIONOJN, I saw two millions.


Numbers can be used as adverbs:- NI UNUE ALIRIS VIDI LA KURACISTON, we first went to see the doctor; DUE, MI DEZIRAS INFORMI VIN...Secondly, I wish to inform you....

They are also used as adjectives. LA UNUA HOMO, the first man.

Published by F.R.EANFAM, 2 Banchory St., Essendon, W5, VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

LA RONDO



910.35

Aug. 1943

No. 11. VOL. 3.

ELDONITA de F.R. BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

L A R O N D O .

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5, VIC.

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

OBEANTA AL ORDONJOJ.

El "The Back Garden of Allah" de C.S.Jarvis, iama
Gubernatoro de Sinai.

La okcidenta marbordo de la Golfo de Akaba havas nenian pretendon al vasta konateco ekster siaj omaroj (F. languste), kiuj estas tre abundaj kaj kreskas ĝis granda amplekso. Ĉar ili ne multe vendiĝas en la regiono, ili facile estas troveblaj sur la rifoĵ de blanka koralo, kaj oni senĝene kaptas ilin simple per promeno laŭ la rokoj kun torĉo en la mano kaj kolektado kvazaŭ ili estus agarikoj. Ili estas egale bongustaj kiel la Franca speco, kaj, ĉar ili troviĝas nur en la Golfo de Akaba kaj en la suda ekstremo de la Golfo de Suez, ili estas estimataj kiel vera frandaĵo en Egiptujo. Tial, kiam oni havas gastojn al kiuj oni volas imponi per la neatenditaj rimedoj de Sinai, oni prezentas omarojn por lunĉo kun iliaj ĝustaj akcesoraĵoj de salado kaj saŭco.

Foĵe kondukante amikojn al Petra, mi sendis per kamelpolico komunikon al Suliman, ke li aperu ĉe nia tendaro ĉe Taba, portante kelkajn omarojn. Tiel promesinte al la amikoj plezurajn surprizon, mi embarasiĝis, kiam mi vidis, ke Suliman ne portas omarojn, sed anstataŭe gvidas kamelsarĝon da grandegaj konkfiŝoj el tiu speco, kiu havas blankan volvan konkon kun strioj rozkoloraj. Ĉar ni estis tre malsataj, la afero estis aparte ĉagrena kaj ni lasis nian kolereton vidiĝi.

Ankaŭ Suliman estis kolera, eĉ furioze tia. "Mia Dio!" li kriis, "se mi sciis, ke ĝuste omarojn via moŝto deziras, vi havus tiom, kiom vi povus satmanĝi. Tiu policano, filo de hundo, Nigm Aoda, li estas pri tio kulpa! Li diris, ke li volas konkfiŝojn; mi do vojaĝis tutan nokton por porti al vi tiajn ĉi." Kaj li malŝate piedbatis la korbon en la direkto de Nigm.

Nigm, kompreneble, firme asertis, ke certe ĝi estis omaroj pri kiuj li petis al Suliman. Kolera disputo ekkazis. vorton

"Omaroj!" blekis Suliman furioze. "Se vi uxis al mi 'omaroj', pro kio vi staris sur la marbordo simile al maljuna virino, kiu domaĝas lasi la piedojn malsekiĝi, dum mi vadis kolektante tiajn ĉi? Kial vi ne informis min pri la eraro?"

Evidente estis unu el tiuj okazoj en kiuj tre simplaj aranĝoj komplete fiaskis, kaj ĉar pro principo neniu homo en Sinai konfesis kulpon aŭ eraron, plua dirado estus vana. "Ne ĝenu vin, Suliman," mi voĉis milde, "jam okazis ia eraro, sed vi povas ĝustigi la aferon. Post kvar tagoj ni revenos ĉi tien, kaj vi sendube aranĝos, ke omaroj estu tie ĉi tiam, ĉu ne?"

"Per Dio, jes," asertis Suliman, "mi ja aranĝos. Jam sciante bone, ke vi volas omarojn, kaj ke neniu azenkapa policano fuŝos la aferon kaj mensogos pri ĝi, mi certigas, ke vi vidos omarojn. Alie mi perdu la kapon!"

Alveninte al Taba post kvar tagoj, ni rimarkis, ke la malvigla policposteno ŝajnas esti pli homdensa ol kutime. Anstataŭ du-tri malenergiaj policanoj dormeme rigardantaj al maro, la loko estis plenplena de Araboj, kaj polvonuboj ĉie leviĝantaj indikis, ke multe da kameloj moviĝas. Oni tre malofte vidas kamelojn en Taba.

Suliman renkontis nin dum ni faris halton kaj per lia aspekto ni ekkonstatis, ke ĝuste li estas tiutage la plej impona figuro, kaj tute ne la serĝento de la policposteno aŭ la ŝejko de la loka gento, kiun li vigne kubutŝovis en la postan parton de la scenejo.

"Venu, moŝto!" li diris triumfe, prenante min per brako; "mi havigis por vi la deziratajn omarojn." Li kondukis min al la marbordo kaj fingre montris al la akvo. Tuj sub la supraĵo mi vidis multmulte da plektkorbejoj, kiuj ŝvelis-malŝvelis kaj elpuŝis vezikojn. Je proksimuma kalkulo mi peztaksis la kolekton je duono de tuno.

"Tiuĵn," li diris, fiere mangestante, "produktis la membroj de mia tribo el Nueiba; en la korboj sidas pli ol kvin cent. La Araboj el Dahab nun venas." Li montris al ĉeno da kameloj iranta laŭ la vojkurbiĝo: "Dahab estas pli riĉa loko je omaroj ol Nueiba. Sendube ili havas ankoraŭ pli ol mil. Mi vidas ses kamelŝarĝojn, el kio evidentas, ke la fiŝkapto estis bona. La mallonga tempo ne permesis fari la aferon tute laŭ via ordono," li aldonis senkulpige; "krome, la homoj de Ras Mohammed ĉiam estas mallaboremaj. Tamen por certigi, ke ili ne malkontentigos min, ilian ŝejkon mi bele regalis per bastono. Jen mi ekvidas la polvon de iliaj kameloj tie for ĉe la promontoro; la nubo estas longa, do la karavano granda. La omaroj ĉe Ras Mohammed similas al lokustoj de la dezerto, tial, se la homoj laboris laŭ mia ordono, sendube ili havas du mil, el kiuj ĉiu pezas minimume kvar funtojn---laŭ via ordono. Ĉu sufiĉe, moŝto, aŭ ĉu mi havigu ankoraŭ?"

Kalkulante, ke mi nun disponas je preskaŭ ĉiuj omaroj troveblaj sur cent mejloj da marbordo, mi humile esprimis kontenton.

----- F.R.BANHAM (Trad.)

Gramo da musko estas dividebla en tricent dudek kvadrilionojn, el kiuj ĉiu estas kapabla efiki sur la flarnervon.

MOND-FEDERACIO.

(La originala artikolo "World Federation", verkita de S-ro A. C. Boyle, Prezidanto de S.E.S., aperis en "Daily Telegraph," 3/5/43, kaj ricevis premion de £6. La temo de la konkurso estis: "Kion ni farus kun Germanujo kaj Japanujo post la milito?"

Ekonomie la nacioj nuntempe tiel dependas unu de la alia, ke ili efektive formas unu komunumon. Tiu dependeco daŭre pliiĝas. Tial forta centra registaro estas bezonata; sen ĝi estos ĉiam konflikto kondukanta finfine al ĥaoso en internaciaj rilatoj. Ĉiu komunumo bezonas kontrolan centron.

Pro tio mi invitus venkitajn Germanujon kaj Japanujon, sendi reprezentantojn al internacia kunveno, kies membroj promesis, kontinue kunsidi ĝis interkonsento pri konstitucio por efika mondregado. (Oni bezonis du jarojn, por ellabori la konstitucion de Usono.)

Al tia kunvenintaro mi proponus kiel fundamenton:

- (1) Elektitan registaron; superan parlamenton (kvar membroj per ĉiu nacio); malsupran parlamenton (nombro de membroj laŭ proporcio de la naciaj enspezoj; en parlamento de 500 membroj la nacioj havus laŭ antaŭmilitaj ciferoj, proksimume jenajn reprezentantojn: Usono 131, Granda Britujo 44, Germanujo 38, Francujo 25, Rusujo 35, Japanujo 16, Ĉinujo 45, Hindujo 30).
- (2) Sendependan ĉef-tribunalon subtenatan de la forto de l' mondregistaro.
- (3) Subtenon de sufiĉe granda militistaro, kiu rajtas, havigi al si la helpon de la naciaj armeoj; la mondregistaro registru kaj periode publikigu plenan statistikon pri la naciaj armeoj.
- (4) Liberan komercon.
- (5) Liberan migradon (kun protekt-aranĝoj).
- (6) Oficialan mondlingvon instruotan en ĉiuj lernejoj.
- (7) Mond-valuton.
- (8) Estrado de kolonioj, de internaciaj transportado kaj komunikado; minimumajn industriajn labor-kondiĉojn kaj salajrojn.
- (9) Garantion de la Rajtoj de l'Homoj.
- (10) Ke neniu mondleĝo maljuste diferencigu inter individuoj aŭ nacioj.

Tiu demokrata regado donus egalecon de ŝancoj, nuligus la ekonomiajn kaŭzojn de milito kaj, per la stimulado de komerco, plialtigus la viv-nivelojn. Se ĝi iam estus starigita, la forto de publika opinio favora al ĝi certigus ĝian konservadon spite de ĉiuj malfacilaĵoj. Neniu homo, havanta voĉon en la regado de la mondo, favorus nacian registaron, kiu instigus lin, partopreni malutilan militon kontraŭ siaj kunhomaranoj.

-----A.C.BOYLE.

ESPERANTISTOJ FLUGAS de EUROPO al AUSTRALIO.

Daurigo de la Julia numero de La Rondo.

Je la 5-a ni surteriĝas en la aerodromo, Mingaladon, kiu troviĝas tre malproksime de la urbcentro de Rangoon. Stranga aspekto atendas nin. Multego da indiĝenoj, vestitaj en festaj akrekoloraj vestoj, akceptas nian aeroplanon vigle gestante kaj babilante. Kune kun la tropike abunda vegetaĵaro ili prezentas bildon, kiu ravas kaj entuziasmigas nin per sia unika beleco.

La longa aŭtibuso veturo al la urbo donas al ni okazon, intense ĝui ĉiujn belaĵojn ambaŭflanke de la vojo. Pitoreskaj virinoj, ĉarmaj kun siaj migdal-formaj okuloj, monaĥoj kaj pilgrimoj budhanaj en flavaj roboj, primitivaj vendo-budoj, ĉaroj tirataj de zebuoj! Kiaj neforgeseblaj impresoj! Kaj ĉie la dometoj kaj kabanoj estas konstruitaj sur altaj fosto; en la ejo sub ili agemaj virinoj pendigas la malsekan tolaĵon; lignaj ŝtuparoj kondukas al la vera loĝejo supren, kiu tiel estas tute ĉirkaŭata de l'aer-fluo.

Kaj nun ni enveturas la urbon; kia kontrasto! Elegantaj klubdomoj kun parkoj, plej modernaj sportejoj, kolegio kun preĝejo, kaj luksa hotelo. Tiu estos nia hejmo por unu nokto, kiun ni trapasos unuafoje sub moskito-retoj. Post la vespermango ni riĉigas nian scion en longa kaj interesa konversacio kun la afabla hotelestro, anglo, kiu vivas de 25 jaroj en tiu loko. Li informas nin pri la strangaj kutimoj de la indiĝenoj kaj montras al ni iliajn majstre faritajn ligno-skulptaĵojn.

Ni finas la impres-riĉan tagon per vaga promenado; ĉiam denove frapas niajn okulojn la kolorriĉaj vestoj kaj pantalonoj de la indiĝenoj, la gracia paŝado de la virinoj. La aero estas sufoka, plenigita de dolĉetaĵoj odoroj, indiĝenoj kaŭras sur la tero en vigla babilado, dum aliaj plenkreskuloj ĵetegas flugdrakojn en la aeron aŭ montras parade siajn ĵus kaptitajn fiŝojn, kiuj pendas de iliaj ŝultroj.

Kaj nun ni estas ĉe la Ora Pagodo. Pli ol 400 futojn leviĝas tiu majstroverko, kies baza periferio laŭmezure estas 1500 futoj. La tuta konstruaĵo estas ekstere kovrita per pura oro, dum la pinto estas ornamita per arĝentaj sonoriloj kaj brilaj juveloj. Burma ja estas la lando de pagodoj ĉiuspecaj, de nov-konstruitaj ĝis

disfalintaj, tempo-difektitaj ~~naŭno~~ superkreskataj de l'ĝangalo. Kaj la Shwe Dagon Pagodo ĉi tie estas la plej fama en ĉiuj Sudhan-aj landoj. Jarcentojn antaŭ ol eĉ unu ŝtono de Rangoon estis metita sur la alian, tiu sankta pagodo sur sia monteto jam superregis la tutan ebenon de la delto.

Dum nun noktiĝas super Rangoon kaj la apuda Golfo de Martaban, niaj pensoj flugas al alia fama pagodo, situanta trans la golfo en Mulmein, je kies honoro Rudyard Kipling skribis siajn senmortajn versojn:

Ĉe Mulmein-pagod' antikva revas Burma belulin',
Vidas al la mar' orienten, certe rememoras min.
Kaj de l' templo sonoriloj vokas en sopira ve':
Venu reen, soldat'brita, venu vi al Mandalay!

-----Daŭrigota-----P.SCHWERIN.

USARO: KARTLUDO ESPERANTE.
Vidu "LA Rondo" de Julio.

This game may be played by 2, 3 or 4 persons, and partners MAY be selected when 4 people play.

GOAL. Players must decide before commencing play, which of three goals they will endeavour to attain:-

1. Goal to form a root word or primary word, e.g., SED, NI, POM, TRANĈ. No affixes or compound words are allowed.
2. Goal to form a primary word or a complete simple word:- e.g., NI, SED, BONA, BONON, POMOJN, KRAJONO, MANGIS. Words like amita, helpinte, patrino, forlasi, helplingvo, are NOT permitted because they contain an affix or more than one root word.
3. Goal to form complete words, simple or compound, with or without affixes---in fact, any Esperanto word---but the number of root words or affixes in any one word is limited to 4, excluding grammatical terminations.

NOTE. Players must select a text book or dictionary to act as umpire. For USARO 3 a large dictionary (preferably Millidge) is definitely desirable.

PREPARATION. Each player will select a card from a pack, face down, and the player who has the letter nearest the alphabet will deal first. In the event of players having the same letter, those concerned will select again. The dealer deals 13 cards to each player, including himself.

PLAY. The player on the left of the dealer places one card, face up, on the table. Each player in turn may add one card either to the right or left of that on the table. No spaces may be left be-

tween letters, and no card, except the one led first for each word, may be played unless the person playing it holds in his hand the other letters necessary to complete the word he has in mind. If it is found that a person has played a card without such licence, he will lose 5 points and be deprived of the right to win the cards on the table.

Example of play, assuming the players have decided on goal 3:-

First player leads U making U
 2nd " plays N " UN intending to make JUNA
 3rd " " U " UNU " " UNUOPE
 4th " " L " UNUL " " JUNULO
 1st " " J " JUNUL " " JUNULINO
 2nd " cannot play a card and is thereby disqualified.
 3rd " plays E making JUNULE intending to make JUNULEGO.
 4th " " T " JUNULET " " JUNULETO
 1st " " O " JUNULETO
 2nd " already disqualified.
 3rd " plays L making LJUNULETO " " MALJUNULETO
 4th " cannot continue, so is disqualified.
 1st " could continue but chooses to pass & is disqualified.
 2nd " disqualified.
 3rd " plays A making ALJUNULETO, intending to mak MALJUNUL-
 3rd " " M " MALJUNULETO. (ETO.

Note that the word MALJUNULETO has 3 affixes and 1 root word, the limit of 4 components (excluding grammatical ending) permitted in this game. No blank spaces are permitted, e.g., after UNU, the 4th player would not be allowed to play P making UNU-P.

A player may pass instead of playing a card if he wishes. He MUST 'pass' if he cannot play a card. After a 'pass' that player is disqualified from playing any more cards until the table is cleared.

In the above example, the first player 'passed' at LJUNULETO because he knew that if he played A, the 3rd player would play M, thus completing the word and having the first right to collect the cards. Consequently, the first player saved his card for a later word.

The player who completes a word says "Complete". The other players have the right to add further letters (one at a time) to build still further.

When no one can add any more letters, the person who played the last card MUST give the correct meaning of the word before he takes the cards to place them aside as winnings. If he is unable to give the correct meaning he loses 1 point for every letter in the word. The player on his left then has the right to try to give the correct meaning or to pass. If he tries and succeeds, he takes the cards; if he tries and fails, he also is penalised as above. If he passes or fails, the player on his left then

receives the right to try etc. If no player can give the correct meaning, the cards are discarded.

Working in a clockwise direction from the dealer, each player in turn will lead the first card for each word. When no more words can be built, each player scores one point for each card he has won and any penalties are then deducted. The player on the left of the previous dealer, then deals for the next game.

WIN. The first player to score 50 points wins the rubber. If partners are playing, the score required is 100.

ANTAU PLI OL JARO Hungarujo, Slovakujo kaj Rumanujo deklaris militon kontraŭ Usono. Laŭ sprita gazetisto la jena dialogo okazis, kiam Cordell Hull informis al Roosevelt pri la afero.

Hull: Sinjoro Prezidanto, Hungarujo ĵus deklaris militon kontraŭ ni. (ri.)

Roosevelt: Ĉu vere? Kio estas Hungarujo?

H.: Hungarujo estas malgranda reĝlando apud rivero Danubo.

R.: Reĝlando? Kiu estas la reĝo?

H.: Hungarujo ne havas reĝon. Admiralo regas ĝin.

R.: Admiralo? Kie estas lia ŝiparo?

H.: Li ne havas ŝiparon, nur armeon.

R.: Armeon? Kie ĝi batalas?

H.: Kontraŭ Sovetio.

R.: Sovetio? Pro kio ĝi batalas kontraŭ Sovetio?

H.: Por gajni pli da teritorio.

R.: De Sovetio?

H.: Ne. De Slovakujo kaj Rumanujo.

R.: Do, kial Hungarujo ne batalas kontraŭ Slovakujo kaj Rumanujo?

H.: Ili ne povas. Slovakujo kaj Rumanujo estas ĝiaj alianculoj.

"TIME" (Usono)

MORGENS STEH' ICH AUF UND FRAGE...

Frumatene mi demandas:

"Vencs Amatin' hodiaŭ?"

Mi vespere ĉiam plendas:

"Ŝi ne venis min hodiaŭ.

Dum la nokt' turmente longa

Kuŝas mi kun febra menso;

Dum la tag', kun kapo sonĝa

Vagas mi sen cel', sen penso.

-----HEINE. Tr. F.R.B.

VALSE, MATILDA!

Ĉi bone konata kanto de Banjo Patterson (ban-ĝo pater-sen), kiu mortis en 1941 ĉe la aĝo 77, tiomege populariĝis dum la unua mondmilito, ke ĝi tiam fariĝis kvazaŭ la marseljezo de la senzorgema aŭstraliano. Ĉi tiu esperantigo, verkita por La Rondo, estas de Joab Eljot, redaktoro de la Eta Heroldeko. Oni notu, ke S-ro Eljot ne provis enkonduki neologismojn, sed tamen enlasis kelkajn aŭstraliajn landslangaĵojn por redoni al la kanto ĝian propran apartan nacian karakteron.

Gaja vagulo kamps apud bilabong',
Ombre de kuliba', riĉa laŭ foli',
Kaj li kantas atende ĝis la bol' de l' bilipot',
"Venu, do valse, Matilda, kun mi!"

Rekantaĵo.

Valse, Matilda! Valse, Matilda!
Venu, do valse, Matilda, kun mi!
(La tria linio de la strofo kantata)
Venu, do valse, Matilda, kun mi.



Jen jam ĵamboko por trinki ĉe la bilabong',
Ek! ĝin li kaptis kun ĝojo-kri',
Kaj li kantas, kaŝante da ĝi en sia manĝosak',
"Venu, do valse, Matilda, kun mi!"
Rekantaĵo.

Alrajdis la eskvator' dorse de la purbredit',
Kun li ĝendarmoj, unu, du, tri:
"Nu, pri l' ĵamboko kaŝita en ĉi manĝosak' ..."
"Venu, do valse, Matilda, kun mi!"
Rekantaĵo.

Sed la vagulo, saltinte al la bilabong',
"Viva, neniu min kaptos," mokis li.
Kaj de tiam fantomo kantetas ĉe la bilabong',
"Venu, do valse, Matilda, kun mi!"
Rekantaĵo.

<u>Bilabongo</u>	(billabong): malgranda lageto, flankenfluo de rivereto.
<u>Kulibao</u>	(coolibah): arbo.
<u>Bilipoto</u>	(billy): malpeza stana bolsitelo, vaste uzata por la tepretigado.
<u>Matilda</u>	(matilda): la pakaĵo surdorse de migranta vagulo.
<u>Ĵamboko</u>	(jumbuck): ŝafo ia ajn.
<u>Eskvatoro</u>	(squatter): okupanto de larĝaj paŝtlandoj.
<u>Ĝendarmo</u>	(trooper): rajdanta policano.

LIBROSERVO. La mono ~~de la servo~~ estas sufiĉe granda nur por permesi al ni teni enprovize tiujn librojn necesajn por la movada laboro. Pre "Edinburgh" vortaro la bezono por grupaj lernantoj estas tiel granda, ke ni ne povas importi ĝin sufiĉe rapide kun nia limigita mono, kaj ĉiu ekzemplero estas jam destinita al lernanto antaŭ ol ĝi atingas nin. Pro tio ni ne anoncas ilin aĉeteblaj. Tamen dum B.E.A. ankoraŭ havas provizon ni importos ĝin por iu membro, se tiu antaŭpagos la mendon. La Asocio plene zorgas sed ne akceptos respondecon. Prezlisto de libroj tiel importeblaj sekvas. La tempo bezona por tia importo estas 5-6 monatoj sed se la mendanto pagus la koston de Aergrafa (airgraph) mendo-10 pencojn- la tempo estus 3-4 monatoj. Ĉiuj malsupraj prezoj enhavas afrankon.

British Esperantist - Organo de B.E.A.....	s3	-6d.
Esperanto Internacia - " " I.E.L.....	7	-0
Edinburgh Pocket Dictionary.....	4	-3
Fulcher & Long (Angla--Esp.Vortaro).....	12	-6
Millidge (Esp-Angla Vortaro).....	16	-6
Life of Zamenhof in English, Bound, an excellent gift for Non-Esp. friend.....	4	-0
Vivo de Zamenhof (Privat) Papero 4/-, bindita.....	6	-6
Viro el Francujo (Ivans) Bindita.....	6	-6
Ŝi (Rider Haggard) Bindita.....	6	-6
Fanny (Ferber) bindita.....	6	-6
Riĉa kaj Sen Mono (Oppenheim) bindita.....	6	-6
Luno de Izrael (Rider Haggard) Pap. 4/-, bindita.....	6	-6
Pinokjo (Pinocio) (Collodi) Papero 4/-, bindita.....	6	-6
Dormanto Vekiĝas (Wells) paper 4/-, bindita.....	6	-6
Petrolo (Sinclair) Vols. 1 kaj 2 ĉiu.....	6	-6
Aventuroj de Marteno Drake, Bindita.....	6	-6
Naiveco de Pastro Brown, Chesterton, Bindita.....	6	-6
La Vojo Returne (Remarque) Bindita.....	6	-6
La Biblio, bindita.....	8	-0
Terminaro - Aeronautika, Armea, Fervoje, por infanludoj ĉiu 1/6		

ESTRARANOJ. Bonvolu noti, ke ĉiu propono en la Prezidanta Cirkulero N-ro 3E jesigis.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de membro kun La Rondo, F-inoj Rosengrave, T. Bartley; S-inoj Grant, A.C. Wintze; S-roj E.Pryke, K.Linton; R.Worrall, A.Saar, Ballard, P.Hudson, Slavoff, E.McKenzie, E.Thomas, F.Halls; Lieut. Stephens. Donaco por propogando bonvole sendita de F-ino A.Curtis, 10/-.

KOTIZOJ. Membroj kaj legantoj bonvole notu, ke se via kotizo ne estos pagata kiam ĝi ŝuldiĝas ni ne plu povos elsendi la gazeton.

G.H.HILLERMAN (Sekretario)
Box 75, Devonport, TAS.

TRADUK-KONKURSOJ.TRADUKO de KONKURSO 1:

(Kompilita el kvin ensendaĵoj.)

La feliĉaj homoj de la mondo neniam estas liberaj. Estas nur junuloj, kiuj efektive deziras liberecon, aŭ tiuj, kiuj starigis defenzivan mekanismon kontraŭ la vivo; ĉar vivi signifas ankaŭ suferi. La pli aĝaj kaj pli saĝaj scias, ke nenio valoras, escepte se ĝi povas esti partoprenata, kaj ke la eterna sopiro de l' homa koro estas, aparteni al iu alia. Tio estas ĝia eskapo de soleco, ĝia subteno en malforteco, konsolo al ĝia fiero. Eĉ junuloj devus pripensadi antaŭ ol postuli liberecon. Certe, esti feliĉa estas pli bone ol esti libera; kaj esti bonkora al ĉiuj, ŝati multajn kaj ami kelkajn, esti bezonata kaj dezirata de tiuj, kiujn ni amas,tio certe estas por ni la plej ebla alproksimiĝo al feliĉeco.

Venkinta Grupo: Western Australian Esperanto League, Perth.TRADUKOTA TEKSTO KONKURSO 3:

Art is universal. Upon that much we can probably agree without any further argument. But when I say "Art is universal" there is an immediate danger that you will think of art (of either music or painting or sculpture or dancing) as if it were some sort of universal language, understood by everybody in every part of the world. Which of course is not true at all.

When I say that art is universal I merely mean that art is not bound to any particular country or to any particular period of time. For art is as old as the human race, and it is just as much part of man as his eyes or his ears or his hunger or his thirst. The lowest savage of the most desolate part of Australia, who has never even learned how to build himself a house or how to wear clothes, has developed a very interesting art of his own. And, while we have discovered several groups of natives who have no conception whatsoever of religion, we have never, as far as I know, come across a race that was completely without some form of artistic expression.

(H.W. van Loon: The Arts of Mankind.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.9.43.

P.E.SCHWERIN, Flat 1, Carabella Flats, McDougall St., Milsons
Point. N.S.W.

EN LA NUNA STATO de la scio, ŝajnas neeble doni kompletan kaj precizan difinon de tio, kion ni devas konsideri kiel beston, distinge al tio, kion ni devas rigardi kiel vegetaĵon.

- (1) Tio fine puŝis lin en fiaskon.
- (2) Ŝi kondukis laŭ siaj plej salonaj manieroj.
- (3) Sia mieno akceptis esprimon de malbenhumora ĉagreno.
- (4) Mi estas en tre malenviinda situacio.
- (5) Li ne inklinas singarde reteni aliĝon por vidi, kia partio
- (6) Ne por ĉiu homo tio estas plezuro. (ĝajnos.
- (7) Li estas nur ombro de sia antaŭa persono; aŭ, li estis jam de tiu tempo forte kadukiĝinta.

Per tio la serio finiĝas. Legantoj jam havas antaŭ si konstantan kurson provizitan de S-ro P. Schwerin. Numero 1 estis tre interese cerbostreĉa. Ĉiu individuo, eĉ negrupano, kompreneble rajtas fari tradukon por propraokula komparado kun la fine aperanta modele teksto de la gvidanto. Klare komprenu, ke tiaj tradukoj estas pure privataj kaj neniel koncernas la Kurson. Retenu viajn provojn ĉe vi, por povi profiti, komparante ilin kun tiuj de S-ro P. Schwerin.

LINGVAJ NOTOJ.

AFGHIR. Kion ĝi signifas? Ĝi estas formo per kiu iuj vortaristoj informas, ke certaj radikoj troviĝas en la lingvoj Angla, Rusa, Franca, Germana, Hispana, Itala. Ekzemple: Agit', akcent', bazalt', Eksport'. Tiaj vortoj do estas konataj almenaŭ tra Eŭropo kaj Ameriko. AFHI (ekzemple efik') indikas radikon kun malpli vasta komprentereno, ĉar Slavoj kaj Germanoj verŝajne ne ĝin konus. AG indikas pure Germanan (ekz. draŝ'). R. nur Slavan (ekz. vost'). Boirac en sia vortaro uzas la literojn por tiu celo.

Ĝermana: Teŭtona --- relates to all languages, peoples, etc. belonging to the Germanic or Teutonic branch, i.e., Scandinavian, Dutch, as well as German.

PRI IOJ, TIOJ, KIOJ, k.t.p.. "Teorie la ĵus diritaj formoj tute bone povas havi multenombroon tiel same, kiel ili havas akuzativon; sed en la praktiko mi ne konsilas al vi uzi la diritajn formojn en multenombro, ĉar laŭ mia opinio ilia senco tion ĉi ne permesas. TIO prezentas ja ne ian difinitan objekton, sed ian bildon (aŭ abstraktan ideon), kaj bildo restas ĉiam ununombra sendepende de tio, ĉu ĝi konsistas el unu objekto aŭ el multaj. Tamen se aperas ia tre malofta okazo, kiam la logiko postulas, ke ni uzu la diritajn vortojn en multenombro, tiam la gramatiko de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. Ekzemple: "Lia potenco konsistas el diversaj ioj, el kiuj ĉiu aparte per si estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton." (La Revuo 1907 Junio)

329
KASO DE LA RONDO.

ENSPEZOJ.

	£	s	d
Konta transpreno.....	2-	2-1	
S-roj F.Halls, K.Linton.....		7-0	
E.G.Thomas, E.Pryke.....		7-0	
G.Chatterton, F.R.Banham.....		7-0	
S-roj Casello, Ballard.....		7-0	
G.Schmidt.....		9-0	
R.Rawson, C.Kidd.....	10-6		
C.Kidd, donaco.....	10-0		
E.Hart, E.Buswell.....		7-0	
Knox, Walker.....		3-6	
J.H.Stevenson.....		3-6	
S-ino E.M.Grant.....		3-6	
F-ino I.James.....		3-6	
F-ino Blythe.....		7-0	
S-ino A.Groeneweg.....		3-6	
F-ino I.Mitchelson.....		3-6	
S-inoj E.M.Hill, O.Glenie.....		7-0	
Ges-roj Hanks.....		6-0	
S-roj O.Davies.....		3-0	
S-ino H.Davies.....		3-6	
S-ino T.Traill.....		3-6	
Por komencantoj.....		3-6	
	<u>£8. 1.1</u>		

ELSPEZOJ

	£	s	d
poŝto.....	1-	0-10	
papero.....	1-	2- 0	
sablonaĵoj.....		13- 4	
luo.....		5- 0	
bindpingloj.....		1- 6	
inko.....		12- 6	
kurso.....		2- 8	
okazaj elspezoj...		3- 0	
	<u>£4. -.10</u>		
En la Kaso	<u>£4.-. 3</u>		
	<u>£8. 1. 1</u>		

Rondo 3/6 jare.
Kurso 3/- jare.
Duobla kotizo (A.E.A
kaj Rondo) 5/- jare.

PLEASE leave all Postal Notes OPEN. that is, don't fill in the name of payee or of any post office. PLAIN P.N.'s facilitate our work.

W.A.ADDIS 25 Greville Avenue,
Flinders Park, Adelaide, S.AUS.

BONVOLE aldonu al KVITANCOJ de A.E.A.---S-roj C.Schmidt, Knox Walker, F.R.Banham, E.Buswell, R.Rawson J.H.Stevenson, S-inoj O. Glenie, A.Groeneweg, H.Davies, E.M.Hill, F-inoj J.Mitchelson, I.James.

ANKAŭ donacoj danke ricevitaj por efektiviĝi ideojn similaj al tiuj proponitaj de "USARO" (Junia Rondo), F-ino Curtis (Qld) 10/- Por malpliigi la koston de la Jarlibro, F-ino Trundle 10/-

Por ĉiu reklamo, oni petas donacon 1/- por la kaso de La Rondo.

WANTED:- Correspondent in Australia to correspond in Esperanto.
Stamp Collector preferred. F.A.W. Thomas, Burramaronga,
Avoca Beach, via Gosford, N.S.W.

MORTIS en Anglujo Pastro Ashley, tradukinto de King Lear, Book of
Common Prayer, fondinto de Eklezia Esperista Ligo. S-ro C. Stuart-
Menteth, membro de la Londona Klubo de ties starigo 1903, lingvem-
(ulo).

LA DUA ELDONO. (Heine)

Mi estas dankema homo; dum mi loĝis en la banlokoj de Lucca
mi laŭdis mian gastiganton, kiu al mi priservadis teon multe pli
bonan ol kiam mi ĝis tiam trinkis. Tiun laŭdon mi iafoje voĉis
ĉe Lady Woolen, kiu loĝis en la sama gastejo. Tiu ĉi sinjorino
iom miris pri ĝi, ĉar ŝi plendis, ke malgraŭ ĉiuj petoj al nia
gastiganto ŝi ne povis ricevi bonan teon. Tial ŝi mendis teon el
Livorno. "Kaj ĉi estas tre bonaĝusta!" ŝi aldonis.

"Milady," mi respondis, "mi vetas, ke mia estas multe pli
bona." La sinjorinojn tie hazarde ĉeestajn mi invitis al tetrinko,
promesante al ili mian aperon je la sesa horo apud Lucca en loko
monteta, kie oni povas intinkomforte sidadi kaj en la valon rigardi

La horo venis, sed nenia teo. Sesa, sesa kaj duono; la ves-
perombroj glitringigis kiel serpentoj je la montpiedoj, la arbar-
oj dolĉoŝoris ĉiam pli sopirinstige, la birdoj pepis ĉiam pli urĝe
---sed nenia teo venis. Fine, kun maltrankvila vizago vidiĝis nia
gastiganto, kiu demandis: ĉu ni trinkus ŝorbeton anstataŭ teo?

"Teon! Teon!" ni kriis unuvoĉe. "La saman, kiam mi havas
ĉiutage!" mi aldonis.

"La saman, ekscelenco? Tio ne estas ebla!"

"Pro kio?" mi kriis kolere. Ĉiam pli konfuziĝis nia gastig-
anto. Li balbutis, haltis, nur post longaj sinluktoj venis li al
konfeso---kaj la terura enigmo solviĝis jene:-

Mia sinjoro gastiganto bone sciis la arton plenigi per bonega
bolakvo la tepoton el kiu oni jam trinkis; la teo, kiu tiel bone
gustis al mi, kaj kiun mi tiel varme laŭdis, estis ĉiufoje la dua
infuzaĵo de tiu sama teo, kiun mia kungastino, Lady Woolen, venig-
adis al si el Livorno.

La arbaroj ĉirkaŭ Lucca havas eksterordinaran eĥon, tion mi
bele spertis en tiu vesperon.

----- F.R.BANHAM, (trad).

Kuracisto: Mi timas, sinjoro, ke vi estas martiro pro dispepsio.

Edzino: Tute ne, doktoro; konsentite, ke li havas dispepsion,
sed mi mem estas martiro. C.THOMPSON (trad).

POR KOMENCANTOJ. (7)

In ESPERANTO, the Accusative case serves various purposes.

- (1) It denotes the Direct Object, (Lesson 3)
- (2) It shows motion towards.
- (3) It is used for Time, Measure, Value, Weight.

(2) Two prepositions, ĜIS, and AL, which in themselves express "motion towards" do not take the accusative---LI KURIS ĜIS LA PONTO, he ran to (or as far as) the bridge, MI IRIS AL LA URBO, I went to the city. But the other prepositions, which ordinarily do not take the accusative, MUST do so if they are used to show "motion towards". Each of the following sentences gives a preposition twice, showing both uses:-

LI STARIS ANTAŭ LA FENESTRO, KAJ DE TIE LI IRIS ANTAŭ LA REĜON. he was standing before (in front of) the window, and from there he went before the king. LIA BRAKQ ESTIS CIRKAŭ LA DORSO DE LA SEĜO, SED SUBITE LI METIS ĜIN CIRKAŭ ŜIAN TALION, his arm was round the back of the chair, but suddenly he put it round her waist. LA INFANO DANCIS: EN LA KORTO, KAJ POSTE KURIS EN LA ĜARDENON, the child danced in the yard, and afterwards ran into the garden. NI ESTIS KONTRAŭ LA LAMPO KAJ VIDIS LA INSEKTON FLUGI KONTRAŭ LA REFLEKTORON, we were opposite the lamp and saw the insect fly into the reflector. LA MUSO KURIS SUB LA TABLO, KAJ DE TIE ĜI KURIS SUB LA SOFON, the mouse was running under the table, and from there it ran (to) under the sofa. LI KLINIS SIN SUPER LA INFANO KAJ LI JETIS SALON SUPER ĜIN, he was leaning over the child and he threw a shawl over it. LA AEROPLANO FALIS SUR LA TEGMENTON KAJ RESTIS SUR ĜI, the aeroplane fell on the roof and remained on it. TUTE TRA LA LIBRO TROVIGIS TRUETO KIE LIBROVERMO ESTIS MANGINTA VOJON TRA ĜIN, all through the book there was a little hole where a bookworm had eaten a way through it. LA KNABO VADIS TRANS LA RIVERON KAJ TRANS ĜI TROVIS ALIAJN KNABOJN, the boy waded across the river and across it found other boys.

Adverbs can also take the accusative of direction:- KIEN VI IRIS? MI IRIS HEJMEN KAJ RESTIS HEJME, Where did you go? I went home and stayed at home.

- (3) Time. MI RESTIS TIE KVAR SEMAJNOJN, I stayed there four weeks. LI VENOS DIMANĈON, he will come on Sunday.

Measure. TIU EŬKALIPTO ESTAS SESDEK FUTOJN ALTA, that gum tree is sixty feet high; LA STRATO ESTAS LONGA MULTAJN JARDOJN, the street is many yards long.

Value. ĜI KOSTIS TRI PENCOJN, it cost three pence.

WEIGHT. LA KESTO PEZAS TRI FUNTOJN, the chest weighs 3 pounds.

- (4) In exclamations and sometimes in reply to questions, a verb is omitted, but if so, the accusative must be used just as if the verb were there. (Mi petas) PARDONON! (I beg) Pardon! (Mi deziras al vi) BONAN TAGON!...VESPERON!...MATENON!...NOKTON! (I wish you) Good day! ..evening, morning..night! KION VI MANGAS? (Mi manĝas) POMON. What are you eating? An apple. KIAN POMON VI MANGAS? DOLĈAN. (a sweet one)

SI is a reflexive pronoun, it refers always to the subject of the sentence or clause in which it stands, and only when the subject is in the third person. It is never the subject, or even part of the subject. SIN and SIA are the acc. and adj. forms. LI FAVORAS POR SI BRUNAJN SUCJN, he prefers for himself brown shoes. ĈIU PAGAS SIAJN ŜULDOJN, everyone pays his debts. SAGA EDZINO ESTAS GOJO AL SIA EDZO, a wise wife is a joy to her husband.

MEM emphasises the noun or pronoun. MI MEM KLOPODIS AĈETI FIŜON, I myself took-steps to buy fish. LA PASTRO MEM BEZONIS VIZITI LA KUR-ACISTON, The clergyman himself needed to visit the doctor.

The suffix -ADO used with the name of an object implies action, KANTO, song, KANTADO, singing, SIA KANTADO ESTIS ĈARMA, her singing was charming. Used with a word already denoting action, it gives continuance to that action, DIRADI, to keep on saying.

KE, that, often used, is generally preceded by a comma. ŜI PRET-ENDIS, (claimed falsely) KE ŜI ESTAS REGIDINO (princess--reg-id-ino, king-child-female). It may be used with JES and NE:- ĈU LI ESTAS TIE? MI KREDAS, KE JES, I believe so. ĈU VI KOMPRENAS? MI TIMAS, KE NE, Do you understand? I am afraid not.


ĈI before or after T words changes that to this. ĈI TIO, this thing. ĈI TIE, this place, here. TIU...ĈI TIU, the former, the latter. With E or A added, a hyphen is used. ĈI-KUNE, herewith, LA ĈI-TIEA KUTIMO, the custom of this place.

Do not confuse this with ĈE, which means at, in the case of. ĈE LA FAJRO NI ESTAS VARMAJ, at (or by) the fire, we are warm. VI TROVOS TION ĈE LA APOTEKISTO, you will find that at the chemist's. ĈE NI, with us, in our case. ĈEESTI KUNVENON, to be at a meeting.

TRADUKU! La edzino de pastro estis tre malsana. Ŝi lile kuŝadis. La kuracisto diris, ke ŝi bezonas fiŝon por manĝi. La pastro, kiu ne estis sperta (experienced) pri la butika vizitado, tamen klopodis aĉeti fiŝon. Kiam li revenis (returned) hejmen, la edzino demandis kiom estas la prezo (price) de la fiŝo. Li informis ŝin. "Mia kara," Ŝi diris, "vi pagis tro, oni trompis (cheated) vin." Ĉiu penco multe valoris al la pastro kaj lia edzino, ĉar ili estis tre malriĉaj. Do li staris silente (silently). Tiam li levis la kapon (raised his head) kaj serioze (seriously) rigardis la edzinon kaj malrapide diris:- "Nu, mi prefere estus tiu kiu estis trompata ol (than) tiu kiu trompis!"

BLUA ĈIELO, blue sky; BLUETA, pale blue, BLUEGA, dark blue. FLAVA KANARIO, yellow canary. NIGRA KARBO, black coal; VERDA HERBO, green grass; PURPURA VESTO, purple coat; RUGEŬA, pink; GRIZA HARO, a grey hair, but, ŜI HAVAS GRIZAJN HAROJN, she has grey hair (grey hairs), & similarly, LI HAVAS LIPHAROJN, he has a moustache, (lip-hairs)

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.



Sept . 1943

4136
No.12.VOL.3.

ELDONITA de F.R.BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AUSTRALIA.

L A R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, A.AUS.

EL ESPERANTO INTERNACIA.

MONDA HELPLINGVO.

Jen tradukode ĉef-artikolo, kiu aperis en la grava brita scienca gazeto "Nature", 23an de Jan. 1943. Ĝi estas ĉi tie presita kun la afabla permeso de la Redaktoroj de tiu gazeto.

Estas bone dirite, ke ĉiuj homoj deziras pacon, sed tre malmultaj deziras tiujn aĵojn, kiuj alportas pacon. Inter "tiuj aĵoj" oni devas kalkuli internacian helplingvon, kiu, kvankam preskaŭ praantikva, neniam interesis pli ol oneto de la civilizita homaro. Ĉi tiu manko de intereso havas multajn kialojn, sed inter la ĉefaj estas: la malekvilibro inter la memtruda kaj batalema instinktoj unuflanke kaj la gregama kaj kunlaboremaj instinktoj aliflanke; mensa maldiligenteco; nacia antaŭjuĝo; kaj la obstineco kontraŭ reformoj; kiun montris lingvoelpensantoj.

Civilizitaj nacioj jam adoptis komunajn simbolojn kaj kodlingvojn por uzo en matematiko kaj scienco, muziko, marsignalado kaj radiokomunikado. Neniu hodiaŭ proponus, ke diversnacioj uzu malsamajn lingvojn por ĉi tiaj celoj, kaj pro tio muzikistoj povas kudi notarojn, kiujn komponis alilandanoj. Ŝipestroj povas fari komunikadojn sufiĉe longajn kaj komplikajn per la morsa kodo kaj per aliaj signaloj. Ĉiuj nacioj komprenas la samajn ciferojn, la samajn kemiajn, matematikajn kaj aliajn teknikajn simbolojn. Sed kiam la uzantoj de ĉi tiuj oportunaj elpensadoj deziras reciproke komunikadi, ofte ili ne povas, krom se ili hazarde komprenas la saman lingvon. Ĉu jam ne devas ĉi tiu situacio ŝanĝiĝi, kaj internacia komunikado iĝi facila kaj flua? La moderna mondo ja estas iom malpli bonŝanca ol la mezepoko, dum kiu speco de konversacia latino provizis perilon por rekta interkomunikado inter la kleruloj. Spite la diron de Hegel, ke la historio instruas nur, ke la historio instruas nenion, ŝajnas, ke post la fino de la nuna milito, ni preskaŭ certe rimarkos fortiĝon de demokratiaj interligiloj kaj emoj, kaj reviviĝon de la problemo de internacia lingvo, same kiel post la milito de 1914-18. La temo jam ektraktiĝis de Sir Richard Gregory en raporto de la komitato de la British Association pri Postmilita Universitata Edukado, kaj aliloke.

La historio de la movado estas tiel longa, ke oni povas pri-
skribi nur malmultajn el la ĉefaj punktoj. La unua konata provo
konstrui mondlingvon fariĝis antaŭ ĉirkaŭ ses jarcentoj de Abati-
no Hildegarde, el Rupertberg apud Bingen. Ŝi elpensis sistemon
havantan alfabeton de 32 literoj laŭ metodo, kiu ne reaperis ĝis
la lasta duono de la 19a jarcento. Sekvis Descartes en 1629, kiu
starigis seriojn de kondiĉoj, kiujn devas plenumi iu ajn univers-
ala lingvo. Li pripensis filozofian lingvon ne parencan al nat-
uraj lingvoj; kaj ĉi tiu estis ankaŭ la vidpunkto de Leibniz, kiu
elpensis sistemon por klasifiki ideojn laŭ ĉefgrupoj kaj subfakoj,
uzante kiel simbolojn, ciferojn kunigatajn kun 9 konsonantoj kaj
5 vokaloj; tiunmaniere li anticipis la modernan Dewey-sistemon por
biblioteka klasifikado. Ankaŭ verŝajnas, ke Leibniz unue antaŭ-
vidis la eblecon verki sintezan lingvon el vortradikoj de naturaj
lingvoj. En 1795, la tria jaro de la franca revolucio, Delormel
prezentis al la Nacia Konvencio projekton bazitan sur la decimala
sistemo, kiu celis "unuigi la popolojn per la delikataj ligiloj
de frateco" per komuna logika kaj regula lingvo, ĉar "naciaj ling-
voj ĉe ĉiu paŝo montras malregulaĵojn, kiuj malfaciligas ilin kaj
postulas longan lernadon." En pli modernaj jaroj, en la naŭa jar-
deko de la 19a jarcento, J.M.Schleyer, romkatolika pastro, sukces-
is konstrui novan lingvon, Volapuk, per vortradikoj el ekzistantaj
lingvoj, sed post iom da progreso la provo malsukcesis, ĉar la
gramatiko estis tre komplika; estis tre malfacile rekonii la dis-
torditajn unusilabajn radikojn kaj la elpensinto rifuzis toleri
iajn reformojn.

En 1887 aperis multe pli simpla kaj pli elasta lingvo Esper-
anto, kiu daŭris multe pli longtempe kaj atingis multe pli grand-
an sukceson ol iu el siaj antaŭantoj. Esperanto ĉerpas sian vort-
aron preskaŭ tute el okcidentaj lingvoj, ĝia gramatiko estas tre
simpla, ĝia elparolo belsona, kaj oni povas facile enkonduki nov-
ajn vortojn. Eble ĝi havas kelkajn malperfektaĵojn, ekzemple la
arbitran elekton de radikoj el ekzistantaj lingvoj, el kio rezult-
as, ke Esperanto estas pli facile legebla ol parolebla, tamen la
sperto montriĝis, ke ĝi estas perfekte praktika; ĉe Esperantaj kon-
greso homoj el ĉiuj partoj de la mondo interparoladas flue per
ĝi tuj post unua renkontiĝo. Oni sisteme kaj intensive propagand-
adis la lingvon jam dum 50 jaroj, plejparte sen grava malhelpo de
klopodoj de konkurencaj movadoj, ekzemple Ido, Esperantido, kaj
Occidental. Oni kalkulas, ke ĉirkaŭ 2 milionoj da homoj parolas Esp-
eranton, kvankam ekzistas neniu fidinda statistika materialo pri
la temo.

En 1919 la Internacia Esplora Konsilantaro rekomendis, ke oni
starigu internacian komitaton por esplori la problemon, kaj en la
sama jaro la British Association starigis la komitaton kiu, en
1921, raportis favore al neŭtrala sinteza lingvo. En 1920 oni
pritraktis la temon ĉe la Ĝenerala Kongreso de la Unuiĝo de Inter-
naciaj Asocioj, kiu rezoluciis favore al Esperanto, krom unu mal-

konsentanto. En 1922 prezentigis al la Tria Kunveno de la Ligo de Nacioj raporto, kiu konsentis la decidojn de la Komitato de la British Association, sed krome definitive akceptis Esperanton. Rugkruca konferenco en 1921 ankaŭ voĉdonis por Esperanto, kaj en novembro de tiu jaro la konferenco de la Internacia Labor-Oficejo rekomendis al la administra konsilantaro de la Internacia Labor-Oficejo, ke ĝi pli kaj pli uzu Esperanton kiel praktikan rimedon por faciligi internacian interkomunikadon. La registaroj de Hispanujo, Portugalujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Aŭstrujo, Finnlando, Brazilo, Ĉinujo kaj Japanujo oficiale rekonis kaj helpis la lingvon. Plue multaj urbaj, komercaj kaj akademiaj aŭtoritatoj rezoluciis favore al ĝi, kaj la Romkatolika Eklezio pli ol unufoje montris amikan sintenon al ĝi. Inter sciencaj asocioj, kiuj interesiĝis pri ĉi tiu lingvo, estas la Franca Akademio de Sciencoj, kiu en 1921 eldonis manifeston konsilantan al sciencaj laboristoj ekuzi ĝin; ĉi tiun subskribis 39 ĉefaj anoj inter kiuj estis Berthelot, Lumiere, Fainleve kaj la Princo de Monako. Sed rezolucioj ne faras revoluciojn.

Ĉar internacia lingvo estas esence demokratia idealo, ne estas mirige ke kiam la Nacisocialistoj akiris regpotencon en 1933, ili malaprobis la uzadon de Esperanto; fakte en 1936 Himmler eldonis polican dekreton, postulante la disigon de ĉiuj internacilingvaj societoj en la Reich, kaj poste oni faris same en Aŭstrujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Kiam venis la milito de 1939, internaciaj kontaktoj neeviteble rompiĝis, sed la fervoraj subtenantoj de Esperanto daŭrigis siajn klopodojn, kvankam oni aŭdis nenion pri aliaj lingvaj projektoj. Esperanto estas inter la temoj por korespondaj kursoj de la Armea Eduka Fakto, kaj dum pluraj jaroj la Royal Society of Arts aranĝis ekzamenojn pri la lingvo. Plue, oni instruas ĝin en pluraj unuagrada kaj duagrada lernejoj kiel devigan aŭ laŭvolan temon.

Kiel ni antaŭe diris, ĉe la fino de la nuna milito eble okazos reviviĝo de intereso pri internacia helplingvo; se la rezulto estos iel kiel ni esperas, okazos ĝenerala releviĝo de la demokratia spirito, kontraŭe al la aŭtoritateca, pli granda rekono de la avantaĝoj de interdependo, kaj de la neceso de pli libera internacia komercado kaj pli bona internacia komunikado. Aliflanke ekzistas danĝero, ke iuj el la liberigitaj nacioj eble estos tro pleniĝintaj de la nacieca spirito, t.e. de nacia antaŭjuĝo, kaj penados konservi sian sendependecon, siajn instituciojn kaj sian kulturon tiom, ke difektiĝos la spirito de reciproka dependeco (kaj precipe se la propono pri federiĝo ne efektiviĝos): sed ĉi tio devus ne malhelpi akcepton de mondlingvo, se oni klare komprenus, ke la lingvo neniukaze anstataŭus ekzistant nacian lingvon. Plue la efektiviĝo malhelpiĝus, se iu el la pli grandaj nacioj insistus, ke oni ĝenerale akceptu ĝian propran nacian lingvon. Dum la esplorado, kiun faris la Komitato de la British Association en 1919-21, oni trovis, ke krom ĉe kelkaj malgrandaj landoj en nordokcidenta

konsentanto. En 1922 prezentigis al la Tria Kunveno de la Ligo de Nacioj raporto, kiu konsentis la decidojn de la Komitato de la British Association, sed krome definitive akceptis Esperanton. Rugkruca konferenco en 1921 ankaŭ voĉdonis por Esperanto, kaj en novembro de tiu jaro la konferenco de la Internacia Labor-Oficejo rekomendis al la administra konsilantaro de la Internacia Labor-Oficejo, ke ĝi pli kaj pli uzu Esperanton kiel praktikan rimedon por faciligi internacian interkomunikadon. La registaroj de Hispanujo, Portugalujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Aŭstrujo, Finnlando, Brazilo, Ĉinujo kaj Japanujo oficiale rekonis kaj helpis la lingvon. Plue multaj urbaj, komercaj kaj akademiaj aŭtoritatoj rezoluciis favore al ĝi, kaj la Romkatolika Eklezio pli ol unufoje montris amikan sintenon al ĝi. Inter sciencaj asocioj, kiuj interesiĝis pri ĉi tiu lingvo, estas la Franca Akademio de Sciencoj, kiu en 1921 eldonis manifeston konsilantan al sciencaj laboristoj ekuzi ĝin; ĉi tiun subskribis 39 ĉefaj anoj inter kiuj estis Berthelot, Lumiere, Fainleve kaj la Princo de Monako. Sed rezolucioj ne faras revoluciojn.

Ĉar internacia lingvo estas esence demokratia idealo, ne estas mirige ke kiam la Nacisocialistoj akiris regpotencon en 1933, ili malaprobis la uzadon de Esperanto; fakte en 1936 Himmler eldonis polican dekreton, postulante la disigon de ĉiuj internacilingvaj societoj en la Reich, kaj poste oni faris same en Aŭstrujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Kiam venis la milito de 1939, internaciaj kontaktoj neeviteble rompiĝis, sed la fervoraj subtenantoj de Esperanto daŭrigis siajn klopodojn, kvankam oni aŭdis nenion pri aliaj lingvaj projektoj. Esperanto estas inter la temoj por korespondaj kursoj de la Armea Eduka Fakto, kaj dum pluraj jaroj la Royal Society of Arts aranĝis ekzamenojn pri la lingvo. Plue, oni instruas ĝin en pluraj unuagrada kaj duagrada lernejoj kiel devigan aŭ laŭvolan temon.

Kiel ni antaŭe diris, ĉe la fino de la nuna milito eble okazos reviviĝo de intereso pri internacia helplingvo; se la rezulto estos iel kiel ni esperas, okazos ĝenerala releviĝo de la demokratia spirito, kontraŭe al la aŭtoritateca, pli granda rekono de la avantaĝoj de interdependo, kaj de la neceso de pli libera internacia komercado kaj pli bona internacia komunikado. Aliflanke ekzistas danĝero, ke iuj el la liberigitaj nacioj eble estos tro pleniĝintaj de la nacieca spirito, t.e. de nacia antaŭjuĝo, kaj penados konservi sian sendependecon, siajn instituciojn kaj sian kulturon tiom, ke difektiĝos la spirito de reciproka dependeco (kaj precipe se la propono pri federiĝo ne efektiviĝos): sed ĉi tio devus ne malhelpi akcepton de mondlingvo, se oni klare komprenus, ke la lingvo neniukaze anstataŭus ekzistant nacian lingvon. Plue la efektiviĝo malhelpiĝus, se iu el la pli grandaj nacioj insistus, ke oni ĝenerale akceptu ĝian propran nacian lingvon. Dum la esplorado, kiun faris la Komitato de la British Association en 1919-21, oni trovis, ke krom ĉe kelkaj malgrandaj landoj en nordokcidenta

konsentanto. En 1922 prezentigis al la Tria Kunveno de la Ligo de Nacioj raporto, kiu konsentis la decidojn de la Komitato de la British Association, sed krome definitive akceptis Esperanton. Rugkruca konferenco en 1921 ankaŭ voĉdonis por Esperanto, kaj en novembro de tiu jaro la konferenco de la Internacia Labor-Oficejo rekomendis al la administra konsilantaro de la Internacia Labor-Oficejo, ke ĝi pli kaj pli uzu Esperanton kiel praktikan rimedon por faciligi internacian interkomunikadon. La registaroj de Hispanujo, Portugalujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Aŭstrujo, Finnlando, Brazilo, Ĉinujo kaj Japanujo oficiale rekonis kaj helpis la lingvon. Plue multaj urbaj, komercaj kaj akademiaj aŭtoritatoj rezoluciis favore al ĝi, kaj la Romkatolika Eklezio pli ol unufoje montris amikan sintenon al ĝi. Inter sciencaj asocioj, kiuj interesiĝis pri ĉi tiu lingvo, estas la Franca Akademio de Sciencoj, kiu en 1921 eldonis manifeston konsilantan al sciencaj laboristoj ekuzi ĝin; ĉi tiun subskribis 39 ĉefaj anoj inter kiuj estis Berthelot, Lumiere, Fainleve kaj la Princo de Monako. Sed rezolucioj ne faras revoluciojn.

Ĉar internacia lingvo estas esence demokratia idealo, ne estas mirige ke kiam la Nacisocialistoj akiris regpotencon en 1933, ili malaprobis la uzadon de Esperanto; fakte en 1936 Himmler eldonis polican dekreton, postulante la disigon de ĉiuj internacilingvaj societoj en la Reich, kaj poste oni faris same en Aŭstrujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Kiam venis la milito de 1939, internaciaj kontaktoj neeviteble rompiĝis, sed la fervoraj subtenantoj de Esperanto daŭrigis siajn klopodojn, kvankam oni aŭdis nenion pri aliaj lingvaj projektoj. Esperanto estas inter la temoj por korespondaj kursoj de la Armea Eduka Fakto, kaj dum pluraj jaroj la Royal Society of Arts aranĝis ekzamenojn pri la lingvo. Plue, oni instruas ĝin en pluraj unuagrada kaj duagrada lernejoj kiel devigan aŭ laŭvolan temon.

Kiel ni antaŭe diris, ĉe la fino de la nuna milito eble okazos reviviĝo de intereso pri internacia helplingvo; se la rezulto estos iel kiel ni esperas, okazos ĝenerala releviĝo de la demokratia spirito, kontraŭe al la aŭtoritateca, pli granda rekono de la avantaĝoj de interdependo, kaj de la neceso de pli libera internacia komercado kaj pli bona internacia komunikado. Aliflanke ekzistas danĝero, ke iuj el la liberigitaj nacioj eble estos tro pleniĝintaj de la nacieca spirito, t.e. de nacia antaŭjuĝo, kaj penados konservi sian sendependecon, siajn instituciojn kaj sian kulturon tiom, ke difektiĝos la spirito de reciproka dependeco (kaj precipe se la propono pri federigo ne efektiviĝos): sed ĉi tio devus ne malhelpi akcepton de mondlingvo, se oni klare komprenus, ke la lingvo neniukaze anstataŭus ekzistan nacian lingvon. Plue la efektiviĝo malhelpiĝus, se iu el la pli grandaj nacioj insistus, ke oni ĝenerale akceptu ĝian propran nacian lingvon. Dum la esplorado, kiun faris la Komitato de la British Association en 1919-21, oni trovis, ke krom ĉe kelkaj malgrandaj landoj en nordokcidenta

Europa, komercistoj ĉiuj favoras la akcepton de sia propra lingvo. Estas tre oblo, ke oni renkontos ĉi tiun baron ĉu la anglo-saksoj pageloj, kio prestantoj kaj influon multo plilugas sukcese milito. La ĉiela lingvo, spite aliaj neevidentajn barojn, estas multe tre utila al ĉi tiuj internaciaj helpilugoj, kaj la ĝenerala akcepto de ĉi tiu lingvo, sed fela ferno de ĉi, ĉi tiu militigas la marion ilonon nun.

Car la problema estas crente internacia, estas plej bone ke ĝia
 privilegia Internacia asocio, ekzemple reformita Ligo de Nacioj, sed
 tia asocio estas efika nur se ĝi gajnas la plenan subtenon de siaj
 membroj, kaj tial flanke de privataj klopodoj estas neceso, ke unuopaj
 registaroj agu por stimuli intereson pri la afero kaj fine esplori
 popolan opinion. Ivenkum la fina decido pri la desirindeco de in-
 ternacia helplingvo kaj pri la lingvo akceptota postulo de la internac-
 la aŭtoritato, ĝia nacia reprezentanto devus havi la plejon voĉdoni
 definitive favore al tiu, kiu elektis lia propra lando.

La problemoj, kiel gravas ĉiuj aliaj problemoj, kiaj rilatas al bona plibonigo, estas fundamente edukado. Ĝi precipas koncernas registarajn edukadajn fakojn, kaj ĝi tiujn evidus sentendenca kondiĉo konsistanta el reprezentantoj de ĉiuj ĉefaj socialaj agadoj: industrio kaj komerco, scienco kaj siaj aplikadoj, literaturo kaj lingvistiko, lernejoj kaj universitatoj, kaj la gravaj profesioj. Post la elekto de interkonsila helplingvo estas necese deĉirigi ĉiujn kaj kiam kondukoti ĝin, kaj ankaŭ ĉu fari ĝian lernadon ĉiujn, kaj se post difinita tempo, ĉu la lingvo estas vere simpla, la skribado en uzbekadajn kaj uzbekadajn lernejojn ne kaŝas pluan troplacemon en la temaro. Ĝuste infanoj ordinare tro facile lernas perokli novan lingvon, se ili vivas en ĝia atmosfero, sed ili baldaŭ forgesas ĝin se tute, kiam ili ne plu trovas uzon por ĝi. Giefundon solon de nova lingvo tre malrapida-akiras lernejoj guknaboj, kiuj havas malpli ol 16-17 jarojn: la pli aĝaj, precipas kiam ili konstatas la bezonon kaj havas okazojn eksteri ĝin, multe pli rapide lernas. Tiel, subteninda estas la propono, kiam fari la komitato de la British Association, ke la lernado de interkonsila helplingvo fariĝu studado dum la longa somera ferio en la universitatoj (kaj verŝajne en vojaraj kursoj de neuniversitataj lervantoj). Sed per atingi deĉiran progreson kaj sukceson estas nepre necesi provizi tadsajn okazojn esti la lingvon, per legado, korespondado el interparolado, plejbone kun alilanduloj.

Tiaj, kies fido al milito por ĉiuj militen terore konsolidiĝis, kaj tiaj, kiaj kredas, ke la homa batalema instinkto estas nek elradikoble nek ĉuĉetle, tamen estas konvinkitaj pri la praktika ŝtato utiloso de internacia lingvo. Ĉu sciencoj, esploristoj an bone konvenas gaston akceptantan en una internacia lingvo ĉiujn resumojn de originalaj traktaĵoj kaj ankaŭ kopiojn de gravaj artikoloj, ĉiujn ili eble bezonas! Akademioj kaj teknikaj asocioj povas ĉiuj la bestoj de fremdaj gazetoj, kaj la uzo de internacia lingvaĵo de internaciaj sciencaj kongresoj pligrasas en nur recip-

rokan interkomprenon sed ankaŭ la amikecon, kiu estis tiel karakteriza eco ĉe tiaj kunvenoj dum la lastaj jaroj. La fino de la nuna milito devus prezenti unikan okazon por la efektivigo de ĉi tiu sescentjara idealo.

(Tradukita de G.R.Primavesi kaj E.W.Woodruff)

The above article in its original English, together with an article, also in English by F.R.BANHAM which appeared in the Queensland Countrywoman, giving information about Esperanto, can be had from the undersigned for 3d. a copy, post free. These two articles are very suitable as propaganda, to hand to friends who, we find, have never considered the subject of an international language and who, even if they know what Esperanto is, are quite unaware of the important extent to which it is already being used in that respect.

----- L.E.BAILEY.

J.H.Sullivan reports by airgraph from the Middle East that he is conducting an Esperanto class by order of the C.O. Attendance is obligatory.

"Brit. Esp."

REDAKTORA BABILADO.

Jen la lasta numero de nia tria vivjaro. Jam ebligas bindo de impona volumo dika du colojn. Ĝiaj 36 aperoj efikis ne malmulte ardigi la flamon de Esperanta vivo en Aŭstralio; ĉe la amantoj de nia afero ili disŝutis instigon, helpon, amuzon.

La pasinta eldona jaro estis nefacila. Kostoj leviĝis, materialo plivaloriĝis, vivcirkonstancoj, laborkondiĉoj de niaj amikoj neniel pliagrabliĝis, sed konvinkite pri la farindeco de nia tasko kaj la fidela subteno de niaj bondezirantoj, ni daŭrigas senskue la vojon elektitan.

Komence de la venonta volumo nia organo portos novan nomon, "The Australian Esperanto Monthly", kun traduko Esperanta en ne-grandaj literoj. La nomo "La Rondo" taŭgis por la gazeteta ligilo inter Aŭstraliaj Esp-istoj, modeste, senpretende, intimronde, kia ĝi estis en 1940. Sed jam nun nia revuo kreskis ĝis atentinda gravo; ĝia vendnombro altiĝas ĉiumonate, kaj ĝi rajtas al titolo, kiu frape informas pri ĝia rolo aktuala. Kun la veno de la paco, ĝi disiros vaste en fremdajn landojn; tiam estos dezirinde, ke ĝi havu jam en sia nomo la bazaĵn sciigojn: (1) ĝi estas Aŭstralio; (2) ĝi estas Esperanta; (3) ĝi aperas ĉiumonate. Por Anglalingvanoj, inter kiuj ĝi ankoraŭ en tiu tempo trovos la plejmulton de siaj legantoj, ĝi donos senfinajn oportunojn por silenta sed impresa reklamo. Kiom mile da fojoj en la pasinteco ni perdis tiajn bon-

okazojn ĝuste pro la Esp-lingvaj titoloj "La Suda Kruco", "La Rondo", enigmaj por eksteruloj.. Por ne-Esperantistoj tiaj vorto signifas nenion, se ne eble ian Italaĵon aŭ similan. En vagono, parko, teatro, ekvidante la vorton "Esperanto" sur nia legataĵo, verŝajne multaj homoj ekkuraĝos demandi pri nia lingvo, kiu per tio povos gajni al si ankoraŭ da adeptoj kaj amikoj.

Ni elkore dankas al ĉiu homo, kiu, per sia helpo verka, traduka, raporta aŭ alimaniere, kontribuis al la sukceso de nia komuna organo.

LETERO de S-ro G.H.Hillerman pri la ŝanĝo de Nomo de la Rondo:-

La Estraro de "La Rondo",

Rezulte de voĉdonado de la Estraro de la Asocio la jena propono jesigis: "La titolo de la oficiala organo estu ŝanĝita al nova titolo laŭ la bontrovo de la Estraro de La Rondo."

Voĉdonante, kelkaj estraranoj faris notojn sur la voĉdonilo, kaj, kvankam tiuj notoj estas neniel devigaj, mi avizas al vi pro ilia ebla intereso al vi. Jen:-

Eble Anglalingva titolo kun Esperanta traduko pli taŭgus--- Robo kaj liaj helpantoj en Adelaide bone laboras---ili decidu laŭplaĉe---La antaŭvidemo estas gratulinda.

Kun sinceraĵ bondeziroj al vi ĉiuj,

Samideane via,

G.HILLERMAN, Sekretario de A.E.A.

LA HISTORIO de MUGGS, de JAMES THURBER.

Sendube nenia viro kutimiĝis havi tiom da hundoj en sia vivo, kiom mi havis, sed restis pli da plezuro ol malfeliĉo en tio por mi, escepte la aferon de Airedale nomita Muggs. Pro li mi ricevis pli da ĉagreno ol pro la ceteraj kvindek kvin hundoj. Fakte li ne estis vere mia hundo. Mi revenis de ferio unu someron kaj trovis, ke mia frato Roy aĉetis lin dum mi forestis. Granda, larĝkorpa, kolerema hundo, li ĉiam agis kvazaŭ li pensis, ke mi ne estas ano de la familio. Ion profitis esti ano de la familio, ĉar li ne mordis la familion tiom ofte, kiom li mordis nekonatojn. Ni ĉiam manĝigis lin laŭvice por esti ĉe lia amika flanko, sed ne ĉiam prosperis al tia ideo. Dum la jaroj kiam ni posedis lin li mordis ĉiun krom la patrino, kaj li eĉ unufoje faris provmordon al ŝi sed maltrafis. Kolerigite unu tagon ĉar Muggs rifuzid ĉasi ratojn en la manĝilejo, patrino frapis lin, kaj li faris krakon al ŝi sed ne

sukcesis. Li ĝin tuj bedaŭris, patrino diris; li ĉiam estis bedaŭrema, ŝi asertis, post kiam li iun mordis, sed ni ne povis kompreni, kiel ŝi elkalkulis tion. Li neniam agis bedaŭreme. Patrino kutimiĝis sendi en ĉiu Kristnasko skatolon da sukeraĵo al ĉiu persono, kiun Muggs mordis. La listo fine enhavis pli ol kvardek nomojn. Neniu povis kompreni, kial ni ne forigis Muggs. Mi pensas, ke unu-du personoj penis venenigi lin; li agis kvazaŭ venenigita unu-dufoje, sed li vivis ĝis dek unu jaroj, kaj eĉ kiam li preskaŭ ne povis promeni li mordis kongresanon, kiu vizitis mian patrinon oficiale. Mia patrino neniam ŝatis ĉi tiun kongresanon: ŝi diris, ke la signoj de lia horoskopon montras, ke li ne estas fidinda, tamen ŝi sendis al li skatoleton da sukeraĵo tiun Kristnaskon. Li tuj resendis ĝin, eble ĉar li suspektis, ke ĝi estas ŝerca sukeraĵo. Patrino persvadis sin, ke ĉio aranĝiĝis plejbone, eĉ kvankam la patro perdis valoran komercan kunigon pro ĝi. "Mi ne kunestus kun tia viro," patrino diris, "Muggs povis legi lin kiel libron." Muggs neniam mordis iun pli ol unufoje samtempe. Patrino ĉiam menciis tion por montri lian meriton. Ŝi diris, ke li havas subitan koleron, sed li neniam konservas malbonvolon. Ŝi estis ĉiame lia defendanto. "Li ne estas forta," ŝi diris kompateme, sed tio estis malĝusta. Eble li ne estis sana aŭ bona, sed li estis tre forta. Iufoje patrino vizitis virinon, kiu nomis sin mensa sanigistino. Ŝi lekciis pri la temo de harmoniaj vibradoj. Patrino volis scii, ĉu eble estas enmeti harmoniajn vibradojn en hundon. Li estas granda bruna Airedale, patrino klarigis. La virino diris, ke ŝi neniam antaŭe kuracis hundon, sed ŝi konsilis mian patrinon, ke ŝi tenu la penson, ke li ne mordos---sub tiu kondiĉo li tute ne mordos. Patrino estis tenanta la penson la proksiman matenon, kiam Muggs atakis la glaciiston, sed ŝi kulpigis la glaciiston pri tio. "Se vi ne pensus, ke li vin mordos, li vin ne mordus," ŝi diris al li. Li piedbatis sian vojon el la domo en terura malakordo de vibradoj. Unu matenon kiam Muggs mordetis min, etendis mi la manon kaj kaptis lian stumpforman voston kaj levis lin en la aeron. Tio estis tre malsaga faro. Dum mi tenis la hundon supre la plankon per lia vosto li tute ne povis tuŝi min, sed li tial volviĝis kaj spasmiĝis, graŭlante la tutan tempon, kaj mi komprenis, ke mi ne povas tiel teni lin tre longe. Mi portis lin al la kuirejo, ĵetis lin sur la plankon, kaj fermis la pordon ĝuste kiam li krakfalis kontraŭ ĝin. Sed mi forgesis pri la malantaŭaj ŝtupoj. Muggs suprenkuris ĉi tiujn, malsuprenkuris la antaŭajn ŝtupojn kaj min kaptis en la manĝoĉambro. Mi sukcesis eksalti sur la kamenbreton super la fajrujo, sed ĝi kolapsis kaj defalis kun terura bruvo, ĵetante grandan marmoran horloĝon, du vazojn kaj min peze al la planko. Muggs estis tiel timigita de la tumulto, ke kiam mi min levis li jam malaperis. Ni ne povis lin trovi, kvankam mi fajfis kaj ekkriegis, ĝis la maljuna sinjorino Detweiler vizitis nin post la vespermanĝo tiunokte. Muggs antaŭ ne longe mordis ŝin sur la kruro, kaj ŝi eniris la domon nur post ni cert-

igis al ŝi, ke Muggs foriris. Ŝi nur ĵus sidiĝis, kiam kun granda graŭlado kaj gratado de ungoj Muggs aperis de sub la kanapo, kie li kviete estis kuŝanta la tutan tempon, kaj ree ŝin mordis. Patrino serĉe rigardis la vundon kaj surmetis sur ĝin arnikon, kaj diris, ke ĝi nur estas kontuzo. "Li nur batetis vin, ŝi diris. Sed S-ino Detweiler lasis la domon en malagrabla mensostato. Multe da personoj plendis al la policianoj pri la hundo, sed mia patrino tenis municipan oficon tiutempe kaj amikiĝis kun la policianoj. Ili sugestis, ke eble estus bona afero se ni alligus la hundon, sed patrino respondis, ke li sentas humiligon kiam oni lin alligas, kaj ke li rifuzas manĝi. Dum liaj lastaj jaroj, Muggs kutimiĝis pasigi sian tutan tempon ekstere. Ial aŭ nenial li ne ŝatis resti en la domo kaj rifuzis enveni: sekve la rubisto, la glaciisto kaj la lavaĵportisto ne konsentis alproksimiĝi la domon---ni devis porti la rubon al la stratangulo, preni la lavotaĵon al la lavejo kaj repreni ĝin, kaj renkonti la glaciiston ĉirkaŭ kvindek jardojn for de la domo. Tio daŭris dum iom da tempo; ni elpensis genian arangon por allogi la hundon en la domon por ke ni povu enŝlosi lin dum oni kontrolas la gasmezurilon k.t.p. Muggs timis nur unu aferon---elektran ŝtormon. Tondro kaj fulmo forprenis de li la nervregadon. (Mi pensas, ke li imagis, ke ŝtormo eksplodas en la tago, kiam falis la kamenbreto). Li ĉiam kurigis en la domon kaj sin kaŝis sub lito aŭ en vestŝranko. Do ni faris tondromaŝinon el longa nallarga peco da lamenfero kun tenilo unuflanka. Patrino skuadis tiun energie, kiam ŝi volis logi Muggs en la domon. Ĝi certe bone imitis tondron sed tre tedis patrinon.

Kelkajn monatojn antaŭ ol Muggs mortis ŝajne evoluĝis en li ia kapablo vidi fantomojn. Li malrapide sin levadis de la planko, mallaŭte graŭlante, kaj marŝadis, rigidkrura kaj minaca, al efektiva nenio. Kelkfoje la fantomo ŝajne estis iomete al la dekstra aŭ maldekstra de iu vizitanto. Unufoje vendisto, kiu venis al la domo, histeriĝis. Muggs eniris, vagante en la ĉambro kiel Hamlet serĉanta sian patran fantomon, kun siaj okuloj fiksitaj ĝuste maldekstre de la vendisto, kiu toleris ĝin ĝis Muggs estis proksimume tri paŝojn de li. Tiam li histeriĝis. Muggs skue marŝis preter li, grumblante, sed patrino devis ĵeti malvarman akvon sur la vendiston antaŭ ol li ĉesis ekkriegi.

Muggs mortis tute subite unu nokton. Patrino volis, ke ni enterigu lin en la familia tombo, sub marmora plato kun iaspeca surskribo, kia ekzemple: "Anĝelaro portu vin al via ripozo," sed ni persvadis ŝin, ke tio estas kontraŭleĝa. Fine ni ŝtarigis glatan tabulon super lian tombon sur izola loko. Sur la tabulo ni engravurigis neforigeble: "CAVE CANEM." (Avertiĝu pri hundo). Tre plaĉis al patrino la simpla klasika digno de la Latina epitafio.

----- F-ino E.GODFREY. (Trad)

KASO DE LA RONDO.ENSPEZOJ.

Konta transireno.....	£4- 0- 3
S-ro Illingworth two years.	7- 0
S-ro G. Miller "	7- 0
S-ro Hadley.....	3- 6
F-ino O'Connor.....	3- 6
S-ro L. Fekonja.....	3- 6
S-ro Dornbusch.....	3- 6
S-ro Leighton.....	3- 6
D-ro McLurkin.....	3- 6
	<u>£5-15- 3</u>

ELSPEZOJ.

poŝto.....	£1- 0-10
papero.....	1- 2- 0
stencils.....	14- 8
staples.....	1- 6
hire.....	5- 0
inko.....	12- 6
O.E.....	3- 0
Kurso.....	2- 8
	<u>£4- 2- 2</u>
En la kaso	
£1-13-1	
	<u>£5-15- 3</u>

F-ino W.ADDIS, 15 Greville Ave.,
Flinders Park,
Adelaide, S.AUS.

ASOCIAJ AFEROJ.

PROPAGANDAJ SEKRETARIOJ: La jenaj jam enoficiis:- S-ino A. Douglas (Tas), S-ro A.C.Boyle (N.S.W.). Tiuj personoj havas titolon Publicity Secretary for Tasmania (aŭ N.S.W.) kaj rajtas propagandi en la Asocia nomo laŭ sia bontrovo. Se trovas bonokazon por propagandi iu membro, kiu bezonas oficialan leteron aŭ similan, li alskribu al la plej apuda prop. sek. Espereble aliaj grupoj baldaŭ nomos reprezentanton por ebligi organizitan propagandon laŭ tutlanda skalo.

SPECIALA EKZAMENISTO. Kun plezuro ni anoncas, ke la Konsilantaro de B.E.A. nomis S-ron P.Schwerin (NSW) Speciala Ekzamenisto por iliaj ekzamenoj. Tio faciligos la okazigon de ekzamenoj en Sydney, kaj espereble S.E.S. baldaŭ povos starigi kurson kun tiu celo.

GRATULON. Al S-ino A.Douglas (Tas.) kiu defendis Esp-on kontraŭ atako de D-ro L.A.Triebel de Tas. Universitato. La D-ro forte subtenas la Francan Lingvon kiel internacian. Al la nova W.A.E.L. pro sia lastatempa propagando inter politikistoj.

LIBROSERVO. Pro personaj kialoj nia atestimata Peranto en Vik. devis elficiĝi. La Asocio volas publike danki ŝin pro pasinta laboro. Ni scias, ke alimaniere ŝi daŭrigos la bonan laboron. La nova Peranto estas S-ro F.Fitt, 3 Rupert St., Elsternwick, S4 Vic.

KVITANCOJ. Ĝis 11/8/43. Bonvole (1) realiĝis S-ro O. Davies (2) pagis kotizon de Membro kun Rondo, S-ino J. Trail, S-roj E.Hart,

C. Kidd, W.L. Illingworth, L.G. Hadley, D-ro A.R. MacLurkin.

G.H. MILLERMAN, (Sekretario)
Box 75, Devonport, TAS.

RESPONDO de la REDAKTORO :-

Tia "oficialigo" de "piĝin Angla" ankoraŭ ne trovis eĥon en la Melburne gazetaro. Sed ni devas agnoski la verŝajnecon de tia decido, ĉar jam de longe ekzistis bazo por plimalpli ĝenerala akcepto de piĝin kiel komuna parolmedio inter la diversaj indiĝenoj de tiu Pacifika mondparto. Pli primitiva popolo alprenas la lingvon de siaj estroj, sed simpligas kaj modifas ĝin, entrudante sian propran parolmanieron kaj stilon, ĝis estiĝas tute nova kompromislingvo. Manke de vasta akcepto de Esp-o inter la civilizitaj nacioj, nur nature estas, ke oni penas alveni al ia rimedo tuj komprenigi sin ĉe la insulanoj, kaj alpreno de ekzistanta materialo por tia ŝajnas la plej evidenta paŝo. Ni povas senti plaĉon, ke almenaŭ per tiu adopto de piĝin estas atingita unu celo de Esp-o mem---interkomprenigo de homoj inter si, kaj forigo, en ia grado, de la terura lingva baro. La indiferenteco de misiistoj koncerne Esp-on estas la ĉefa kaŭzo de nia nesukceso en tiu kampo.

Ne ekzistas, kiom ni scias, verko pri "simpligita" Esp-o, kiu en si mem estas sufiĉe simpla, se ni limigas nin je bazaj nocioj, evitante literaturajn, teĥnikajn aŭ abstraktajn terminojn.

Nepre vidu "British Esp-ist" Nov. 1942, en kiu Prof-o Collinson traktas pri la demando

Pri "SOLA", "SOLE": Kiu formo estas korekta en la frazo, "Mi povas ludi tiun ludon sola---aŭ sole"?

Kiam ajn oni trovas, ke en iu frazo la vorto "sole" estas ekvivalenta al "nur", la formo "sole" estas korekta. Angloj povas diferencigi la du formojn, dirante, ke "sola" signifas "alone", kaj "sole" signifas "solely".

Plena Vortaro sub "sola": Promeni sola (to walk alone, by oneself). Mi mortigos la reĝon solan (the alone king, the king when alone). La sama frazo kun "sole" signifas "solely the king," "the king only". Mi faros ĝin sola (alone, by myself). Mia brako sola sufiĉos (my arm alone, by itself); "sole sufiĉos" signifus "will solely suffice". "Sole mia brako sufiĉos" signifus "it is solely my arm that will suffice." Mi estas la filo sola de mia patrino (the alone son, the only son). "Sole" en tiu ĉi frazo signifus "I am solely the son of my mother". Malfeliĉo malofte venas sola (alone, by itself), "Sole" en tiu ĉi frazo signifus "misfortune rarely solely comes", i.e., it does something else as well as come.

Rilate al la radikala diferenco inter adjektivo kaj adverbo, rimarku la diferencon en la signifo de la jenaj frazoj---Restu kviete---quietly remain. Restu kvieta---Remain (so that you are) quiet, keep quiet. Tenu vin forte---hold yourself strongly, keep strong hold on yourself. Tenu vin forta---hold yourself (so that you are) strong, be strong.

Pastro W.J.DOWNES.

(En ĉapitro 29 "Jane Eyre" C.Bronte skribis: "She closed the door, leaving me solus with Mr. St. John..." Bulthuis tradukis tion per "Ŝi fermis la pordon, lasante min duopa kun...." Sed Zamenhof en Hamleto p.112: "lasu nin solajn por momento."

(Redaktoro.)

E.P. en S. Zamenhof en sia verko "Lingvaj Respondoj" permesas uzadon de CH, SH (kaj ceteraj) por montri la supersignitajn literojn en okazoj de nepra neceso aŭ pro dezirinda oportuneco, ekzemple en la telegrafado aŭ ĉe presejoj, kie la uzado de tiaj specialaj literoj estas nebla. Li nomas tion "unuatempa rimedo" kaj fide esperas al la tempo, kiam "la plej granda parto de la presejoj kaj telegrafejoj proviziĝos je nia alfabeto" (1891). Bedaŭrinde li ne komentas pri la stranga aspekto de "hhemio, hhorio, hhaoso" kaj aliaj kun komenca Ĥ. Tamen la permeso estas kompreneble valida kaj valora. Anstataŭigi la supersignitajn literojn per aliaj (neĉapelhavaj) necesigus radikalan reformon de la tuta vortaro, kaj pro tio estas ekster la povo de individuaj Esperantistoj aŭ grupoj. Tia ŝanĝo povus fari nur monde reprezenteca Lingva Akademio post zorga studado.

F-ino P.Warden, (Adelaide) rimarkigis pri romano de Hispano, Miguel de Unamuno, "Mist" (Angla traduko), en kiu unu el la roluloj estas E-isto.

ERAROJ en la Aŭgusta Numero: P. 326/26 Pinocchio; 6 de mals. propagando; 328/13 modela; sub artikolo AFGHIR metu "Rusa" post "Itala"; 329/4 de mals. similajn; 6 de m. Groeneweg; 330/5 Esperantista; lasta paĝo, linio 16, forstreku "falsely".

Typing errors in this number will be corrected in our next.

EN LA NUNA STATO de la scio, ŝajnas neeble doni kompletan kaj precizan difinon de tio, kion ni devas konsideri kiel beston, distinge al tio, kion ni devas rigardi kiel vegetaĵon.

TRADUK-KONKURSOJ.Traduko de Konkurso 2:

(Kompilita el ses tradukoj.)

Kiam ajn ni malsupreniris, por ludi ĉe la bordoj de tiu rivero, la freŝa penetraodoro de l' malseketa grundo havis strange gajigan efekton farante nin senbride ĝojaj. Mi povas nun rememori tiujn sentojn kaj mi opinias, ke la flarsenso---kiu ŝajnas malpliigi dum ni maljuniĝas, ĝis ĝi fariĝas io, kio apenaŭ indas la nomon "senso"---estas en etaj infanoj preskaŭ same vigla kiel en malsuperaĵoj bestoj kaj, kiam ili vivas en nature, kontribuas sammulte al ilia plezuro kiel vidadado kaj aŭdado.

Mi ofte rimarkis, ke junaj infanoj, kondukitaĵoj de alta nivelo al malalta malseketa grundo, cedas al subita spontanea gajeco, kurante, kriegante kaj rulante sin sur la herbaro tutsame kiel hundoj, kaj mi ne dubas, ke la freŝaodoro de la grundo estas la kaŭzo de ilia ekscitiĝo.

Venkinta Grupo: Sydney Esperanto Society.

TRADUKOTA TEKSTO KONKURSO 4.

Above the southern portal of St. Paul's Cathedral, London, is an old stone upon which is graven the one word "Resurgam". The story is that when the great dome was about to be built the architect, Sir Christopher Wren, asked for a stone to mark the centre as a guide for the workmen. From a rubbish heap was brought a piece of old tombstone which bore that one Latin word. Its significance---"I shall rise again"---so impressed the architect that he decided to give the stone a permanent place in the structure. There it has remained ever since, a source of stimulating optimism for all who see it. And to us who witness our people being slain and maimed and our country desolated the word should possess special inspiration and cause us to brand it upon our hearts and emblazon it upon our banners.

(Madame Chiang Kai-Shek: China Shall Rise Again.)

Tradukoj devad atingi la subskribinton antaŭ la 10.10.43.

P.E.Schwerin, Flat 1, Carabell Flats, McDougall St., Milsons Point, N.S.W.

German: Teŭtona (relates to languages, peoples etc. beonging to the Germanic or Teutonic branch, i.e. Scandinavian, Dutch and German.)

PRINTEPAJ FANTOMOJ (von Sturm)

Mi sidiĝis en ĉambro ĝis horo malfrua,
 Studante per flagro de lamplumo skua.
 La lacaj palpebroj sin tre volis fermi,
 Persistis mi tamen la paĝojn plu turni.

Jen! Kio sur mia fenestro batetas?
 Koboldojn, fantomojn mi tute ne kredas.
 Sed ĉar la fenestro tre alte troviĝas,
 Demandas mi: Kia ekstere moviĝas?

Mi grimpis fenestron: kaj el ĝi rigardis---
 Tra branĉoj de l'arboj la luno lum-ardis;
 En funda arbaro birdkanto triltuna,
 Nur tio: silentis kamparo sensona.

Apenaŭ sidiĝis mi ree tablete,
 Denove batetoj, sed jam pli impete.
 Por solvi misteron mi finfaris draste---
 Malfermis fenestron, invite, tre vaste.

Paf! tra la fenestro, per flugo kaj salto,
 Envenis skaraboj kun zumo sen halto.
 Insektoj amikaj, kiu menso perturba,
 Malplaĉis al ili min vidi streĉcerba,
 Tro ema al studo, dum sub la ĉielo
 Por ĝui Naturon min vokis la belo,
 La dolĉa varmeto de Maja vespero,
 Odoro de floroj, arĝent-atmosfero.

-----F.R.BANHAM (trad)

De JOAB E. En la Maja numero de La RONDO troviĝis bela angla traduko de "Du Bist Wie Eine Blume". Bedaŭrinde, sen la muziko la delikataj vortoj de tiu ĉi traduko emas lami. Mi do kuraĝis kunmeti liniojn, kiuj eble iom redonos la aromon poezian de Heine, la germana Shelley. Jen ili :-

Like to a tender flow'ret,	And, hands I'd fain, in blessing,
So pure, so fair, so sweet,	Spread o'er thy sunkist hair,
For thee, so all unsullied,	With prayer that God preserve thee
My boding pulses beat.	As sweet, as pure, as fair.

Per kio diferencas talentulo de geniulo?
 Talentulo ricevas salajron ĉiusemajne.

POVO, VOLO, DEVO, mean respectively ability, willingness, duty, and are often used as verbs. MI POVAS SENDI, I can, am able to send. MI VOLAS SENDI, I want to send, MI DEVAS SENDI, I ought to send, it is my duty to. Again NE must precede the word it negates because its position makes a difference to the sense. MI NE POVAS SENDI, I cannot send, but MI POVAS NE SENDI, I am able not to send, i.e., I can choose whether I will send or not. MI NE VOLAS SENDI, I don't want to send, but MI VOLAS NE SENDI, I want not to send, MI NE DEVAS SENDI, I am not obliged to send, but MI DEVAS NE SENDI, it is my duty not to send. We can also have the double negative. MI NE POVAS NE SENDI, I cannot not send, i.e., I must send MI NE DEVAS NE SENDI, I am not obliged not to send. These three verbs are always followed by the infinitive.

Sometimes the verb following is omitted. KIEN IRI? Where (am I) to go? KIAL SONORI? Why (should we) ring? KIEL HELPI? How (can we) help?

There is another way in which the verb is omitted. The English phrase "I love you as much as my brother" might mean (1) I love you as much as I love my brother, or (2) I love you as much as my brother loves you, but in Esperanto the verb can be left out without any such ambiguity owing to the use of the accusative N. (1) MI AMAS VIN TIEL MULTE KIEL (mi amas) MIAN FRATON, (2) MI AMAS VIN TIEL MULTE KIEL MIA FRATO (amas vin).

PLI TEDA, more tiresome, MALPLI TEDA, less tiresome, **PLI-MALPLI** TEDA, more-or-less tiresome.

The Comparative is formed with PLI...OL, more than; MALPLI OL, less than; LA DEKSTRA MANO ESTAS GENERALE PLI UTILA OL LA MALDEKSTRA, The right hand is generally more useful than the left. TIU SONO ESTAS MALPLI LAŬTA OL LA ALIA, that sound is less loud than the other.

PLEJ, MALPLEJ, give the Superlative. LA LASTA POMO ESTIS LA PLEJ GRANDA EL ĈIUJ, SED ĜI ESTIS LA MALPLEJ DOLĈA, the last apple was the largest of all, but it was the least sweet.

PLEJE, PLEJMULTE, mostly, for the most part. KIEL EBLE PLEJ BONE, as well as possible (as possible, most well).

JU PLI...DES PLI, the more...the more; JU MALPLI...DES MALPLI, the less...the less. JU PLI LI MOKAS MIN, DES MALPLI MI AMAS LIN, the more he mocks me, the less I love him. JU PLI ĜI PALIGAS, DES PLI MI MALĜOJAS, the paler she becomes, the sadder I am. JU MALPLI LI DORMAS, DES PLI LI LABORAS, The less he sleeps, the more he works. DES PLI BONE! So much the better!

While PLI means more in quantity, PLU means more in duration. MI CERTIGAS VIN (assure), KE MI NE PLU POVAS TIRI (pull) LA ĈARETON, (small cart). PLUE, MI NE DEZIRAS PLU PRIZORGI VIAJN AĤEROJN, furthermore, I do not wish to look after your affairs any longer.

Adverbs can be made from prepositions by adding E to the root. APUDE, near by; ANTAŬE, in front; KONTRAŬE, on the contrary; SUBE underneath; DUME, meanwhile, from the preposition DUM, while, and LAŬ meaning "according" gives us the adverb LAŬE, it's all according. LAŬ MIA OPINIO, in my opinion, LAŬ LA VOJO, along the road, LAŬLONGE, lengthways. The following also are useful adverbs: ALIE, otherwise, SEKVE, accordingly, FINE, at last; POSTE, afterwards; VOLE-NEVOLE, willy-nilly; KAJ SIMILE, and the like, ESPERANTE, in Esperanto.

ESPERANTO uses several words to avoid a constant repetition of the verb ESTI---TROVIGAS SORCISTO KUN ĈIU TRIBO, there is a wizard (witch-doctor) with every tribe. SIDAS KUIRISTO EN LA KUIREJO, there is a cook in the kitchen, LIBRO KUŜAS SUR LA TABLO, there is a book on the table.

LA MONATOJ. JANUARO, FEBRUARO, MARTO, APRILO, MAJO, JUNIO, JULIO, AUGUSTO, SEPTEMBRO, OKTOBRO, NOVEMBRO, DECEMBRO. LA tagoj:- Sunday is DIMANĈO, LUNDO, MARDO, MERKREDO, ĴAŬDO, VENDREDO, SABATO.

KORNO, horn; ELEKTI, to choose; PRENI, to take; DONAĈO, a gift; RICEVI, to obtain; TERO, earth; FALI, to fall; ARANĜI, to arrange; KONKURO, competition; ORIENTA, East, OKCIDENTA, west; NORDA, north; SUDA, south. KIO ESTAS AL VI? What is the matter with you?

TRADUKU (Esperantan kaj Anglan) tiun ĉi legendon (legend) de la Wakamba Tribo de Orienta Afriko. (Africa). (ricevi, to get, obtain)

KIEL FAJRO UNUE APERIS.

La unua homo ne havis fajron. Poste, kiam loĝis multaj homoj sur la tero ili elektis ĉefon. En unu tago la ĉefo vidis rinoceron kiu poluras sian kornon sur ŝtono. Kiam la rinocero preterpasis la ĉefon, la ĉefo vidis ion kiu brilas sur la pinto de la korno de la rinocero. Do, li prenis donacon de ŝafo kaj kapro al ŝorĉisto, kaj demandis al li kio estas tio kiu brilas. La ŝorĉisto informis lin ke ĝi estas fajro kaj ke neniu povas ricevi ĝin de la rinocero krom se (except) li igas ridi la rinoceron. Tiam la ĉefo kune alvokis sia popolo kaj promesis sian filinon por edziĝo (marriage) al kiu ajn ridigos la rinoceron. MUZEMI, la filo de la ŝorĉisto de la tribo studadis bestojn, kaj decidis, ke li gajnos la premion. Do li vizitis la elefanton kaj diris al li, ke la hipopotamo pretendas esti multe pli forta en akvo ol la elefanto estas sur tero. Then he visited the hippotamus and said to him that the elephant claimed to be much stronger on land than the elephant in water. Poste li aranĝis konkurson por la sekvanta tago, kiam la ĉefo kaj ĉiuj siaj homoj kaj ĉiuj bestoj, kaj ankaŭ la rinocero decidis kiu el la du estas la pli forta.

(daŭrigota, will be continued)